


# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

11 1983





En la kongresejo


# EN LA 68-a



Hungara postmarko emisi-  
ta okaze de la 68-a Univer-  
sala Kongreso de Esperanto

Ĉina ambasadoro al Hungario s-ro Ma Lie salutas la inaŭguron.





# UNIVERSALA KONGRESO

Fotoj de LIAO ZHIGEN

Esperantisteto salutas la kongreson post prezento de bukedo.

Foto de DAI SONG'EN





Estraranoj de UEA donas la pokalon Fyne al la estro de la ĉina delegacio.



Denaska esperantisto Gabriele Corsetti, kongresano n-ro 5 000 (la tria de maldekstre)





Kunsido aranĝita por legantoj kaj perantoj de «El Popola Ĉinio»

Gaja vespero



La Ĉina Esperanto-Delegacio antaŭ la kongresejo de la 68-a UK

Esperanta konversacio  
aranĝita de la kongreso



Hungara danco gajigas la adiaŭan bankedon.

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

**SUR LA KOVRILO:**

1. La kongresejo de la 68-a UK
2. La pokalo Fyne
3. La Ĉina Esperanto-Delegacio kaj prezidanto de UEA G. Maertens

Fotoj de **LIAO ZHIGEN**

**SUR LA DORSKOVRILO:**

La Granda Muro

Fotoj de **YAN JIN, LAO BAI**  
kaj **RU SUICHU**

**KOLORAJ SERIOJ:**

- En la 68-a Universala Kongreso
- Huashan-monto
- Fotoj faritaj de esp-istoj
- Ĉinaj pladoj
- Vojaĝo laŭ Songhua-rivero (2)
- Pentraĵoj de Li Kuchan

**NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:**

- Elektra industrio en Shandong, Zhejiang kaj Ŝanhajo
- Ĉina pentristo Li Kuchan

## Enhavo

En la rekorde granda 68-a UK . . . . .	2
Komunikado sur la bazo de lingva egaleco . . . . .	6
SUR NIA LIBROBRETO: La Esperanta Don Juan' Tenorio . . . . .	8
POR KOMENCANTOJ: Letero al la Avino . . . . .	9
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	10,27
Elektra industrio de Shandong, Zhejiang kaj Ŝanhajo . . . . .	16
Vojaĝo laŭ Songhua-rivero (2): Saluton, Harbin! . . . . .	50
Vicprofesoro kaj kamparanoj . . . . .	12
Enketo pri amo kaj geedziĝo de junaj laboristoj . . . . .	20
Gajaj grupaj aktivadoj de junpioniroj . . . . .	22
Li Kuchan, majstro de ĉinstilaj pentraĵoj . . . . .	34
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	19, 24, 48
La ĉina antikva filozofio (2) . . . . .	28
MIA VIVO: Pli forte brilu la Tang-dinastia ceramiko . . . . .	31
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La 24 sunperiodoj de Ĉinio . . . . .	36
VIDINDAJ LOKOJ: Bela sed krutega monto Huashan . . . . .	25
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Rilatoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj en la antaŭa periodo de Tang-dinastio . . . . .	38
Pri vizito al Jugoslavio . . . . .	42
Brita Reĝa Balet-trupo en Ĉinio . . . . .	46
TRA LA MONDO . . . . .	40
ĈINAJ PLADOJ: Kvar bongustaĵoj en koka graso . . . . .	27
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	19, 21

JARABONTARIFO		FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugaliao	Esc.	500.00	
Aŭstralio	\$A	7.00	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00
Aŭstrio	Sch	100.00	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00
Belgio	BF	230.00	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50
			Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	2.80	US\$	4.00

# EN LA REKORDE GRANDA 68-a UK

de RAPORTISTO DE EPĈ

**N**OKTOMEZE de la 28-a de julio, post laciga, 21- hora veturado per aviadilo, ni, dek membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio kaj du ĵurnalistoj de Radio Pekino, venis al la patrolando de Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay, al la fama metropolo Budapeŝto, kiu triafoje donis lokon al niaj Universalaĵ Kongresoj. La Loka Kongresa Komitato speciale sendis sian reprezentanton al la flughaveno por nin bonvenigi, kaj tio tuj forpeligis nian lacecon.

Budapeŝto, konata kiel "Perlo de Danubo" kaj "Malgranda Parizo", estas bela. Kiam ĝiaj ĉefaj stratoj estis dekoraciitaj per rubandoj horizontale pendantaj kaj paneloj speciale starigitaj por bonvenigi la diverslandajn kongresanojn, per flagoj ruĝ-blank-verdaj kaj verdstelaj, ĝi aspektis aparte ĉarma kaj intima en niaj okuloj.

## SOLENA INAŬGURO

La 31-an de julio, je dudek minutoj post la deka antaŭtagmeze, sub la prezido de Grégoire Martens, prezidanto de UEA, la 68-a Universala Kongreso de Esperanto komenciĝis per solena inaŭguro en la Salono Zamenhof de la grandioza Sporthalo

Budapeŝta. Preskaŭ 5 000 kongresanoj el ĉirkaŭ 50 landoj ĉeestis la inaŭguron. Laŭ la nombro de partoprenantoj ĉi-jara kongreso estis la plej granda en nia kongresa historio ekde la jaro 1905. Tio montras, ke Esperanto, kiel lingvo kun granda vivipovo, estas atentata kaj uzata de pli kaj pli multaj homoj.

En tutsalona aplaŭdo, Sándor Gáspár, alta protektanto de la 68-a UK kaj vicprezidanto de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko, donis entuziasmajn salutvortojn. Li deziris al la kongreso kreaĵ, rezultplenan kaj bonan laboron.

Sinjoro Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de la Internacia Telekomunika Unio, kiu estis invitita al la inaŭguro, prezentis longan prelegon. Li diris, ke la mondo de la komunikado estas akre konscia, ke nuraj teknikaj rimedoj ne donas efikan komunikadon; devas troviĝi almenaŭ du homoj por ekkomuniko, kaj ni ĉiuj scias, ke se tiuj du homoj ne komprenas la parolojn unu de la alia, ne realiĝas komunikado. Li emfaze aldonis: "Esperanto havas unikan pozicion inter la internaciaj lingvoj."

Ma Lie, ĉina ambasadoro al

Hungario, laŭinvite ĉeestis kaj salutis la inaŭguron. Li diris, ke la ĉina registaro ĉiam alte taksas Esperanton kaj subtenas la Esperanto-movadon enlandan kaj internacian. En la lasta decembro la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko revolidigis la sciigon pri la instruo de Esperanto kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj en altlernejoj de Ĉinio, kio certe akcelos la progreson de la ĉina Esperanto-movado. Liaj vortoj estigis entuziasman aplaŭdon ĉe la aŭskultantoj.

Posttagmeze de la sama tago, kiam Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, anoncis ĉe la malfermo, ke la Ĉina Esperanto-Ligo nun konsiliĝas kun UEA pri okazigo de UK en Ĉinio en 1986, tial li deziras bonvenigi ĉiujn kongresanojn en Pekino post tri jaroj, la tuta salono ekbolis, kaj per daŭra aplaŭdo la kongresanoj esprimis sian plenan konfidon al la ĉina popolo, al la ĉina esperantistaro. La sceno nin forte emociis kaj kuraĝigis.

## AKADEMIAJ INTERŜANĜOJ KAJ ALIAJ

Por la sekvaj 6 tagoj post la inaŭguro la 68-a UK preparis



enhavo-riĉan programon. Laŭ nia ne-ekzakta kalkulo, dum la kongresa semajno okazis ĉirkaŭ cent fakaj kunvenoj pri sociologio, kulturo, eduko, scienco kaj tekniko, pri instruado de Esperanto, pri junulara kaj virina agado.

Sub la gvidado de Renato Corsetti kaj Humphrey Tonkin, du membroj de la Estraro de UEA, pli ol dudek prelegoj estis prezentitaj ĉe la kunsidoj pri la kongresa temo — “Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado”. Ili vekis ĝeneralan intereson, kvankam kelkaj el ili estis iom malfacile kompreneblaj por ordinaraj esperantistoj. Ĉina juna esperantisto Jiang Hongzhang interalie donis prelegon sub la titolo “Komunikado sur la bazo de lingva egaleco”, kiu rikoltis aprobon de la aŭskultantoj.

En la Internacia Kongresa Universitato, kies rektoro estis prof. Ottó Haszpra, bone konata hungara erudiciulo, multe da famaj fakuloj, sciencistoj kaj



*Zen Hojaŭ (dekstre), vicestro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, kaj G. Maertens tostas unu al la alia ĉe bankedo.*

profesoroj prezentis prelegojn kun variaj temoj.

La diskutado pri la apliko de Esperanto en scienca kaj teknika kampo estis unu el la akcentitaj agadoj de ĉi-jara UK, en kiu ak-

tive partoprenis Ouyang Wendaŭ, ĉina sciencisto-esperantisto. Li faris kontaktojn, interŝanĝis spertojn kaj starigis amikajn rilatojn kun diverslandaj sciencistoj, precipe kun hungaraj komputistoj.

Krome, la kongreso faris abundan kulturalan oferton: teatraĵoj, artaj vesperoj, korusa konkurso... ĉiu en Esperanto. Neforgeseble impresa estas la prezentado donita de hungaraj, polaj, bulgaraj kaj sovetiaj esperantistoj. Geaktoroj de la Bulgara Esperanto-Teatro ludis “Epifanio”, faman komedion de Shakespeare, kaj ĝuigis al ni sian rafinitan lingvon kaj lertan prezentadon.

### AMIKECO

La unu-semajna UK de Esperanto estis kongreso de amikeco. Per siaj riĉaj aranĝaĵoj ĝi ebligis al esperantistoj el diversaj lan-

*La ĝiĉeto por ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj*





*Ĉina esperantisto Ning Shouren kaj polaj geesperantistoj*

goj de la ĉina socialisma konstruado.

Aparte neforgesebla estas la amika kaj intima konversacio inter István Sarlós, vicprezidanto de la Ministro-Prezidio de Hungario, kaj Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, kiu okazis ĉe la akcepto aranĝita de la Registaro de la Hungara Popolrespubliko por reprezentantoj de la 68-a UK. Kamarado István Sarlós esprimis la deziron disvolvi la ekonomiajn kaj kulturajn interŝanĝojn kaj plifortigi la amikan kunlaboron inter la popoloj de Hungario kaj Ĉinio.

Invitite de d-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, kaj ŝia edzo d-ro Pál Felső, ni vizitis ilian hejmurbon Pécs post la fermo de la kongreso. Tie ni estis varme kaj familiare akceptitaj, ke ni pli profunde sentis la sincerecon kaj amikecon de la hungara popolo al la ĉina popolo.

### **EPC EN LA KONGRESO**

En la kongresejo troviĝis giĉeto aranĝita de nia delegacio por eksponi la gazeton «El Popola Ĉinio» kaj ĉinaj Esperantaj librojn. Ĉiutage kelkcent, iafoje eĉ pli ol mil kongresanoj vizitis la giĉeton por ricevi prov-ekzemplerojn aŭ informiĝi pri la detaloj de abonado. Antaŭ ol la kongreso fermiĝis, elĉerpiĝis jam la tuta stoko de la giĉeto, kiu konsistis el pli ol mil ekzempleroj.

Posttagmeze de la 2-a de aŭgusto la Ĉina Esperanto-Delegacio okazigis en la Salono Lengyel kunsidon, kiun ĉeestis pli ol 100 legantoj kaj perantoj de EPC. La salono bedaŭrinde ne estis sufiĉe granda por enteni



*“Bonvolu doni al mi viajn nomon kaj adreson!”*

doj kaj nacioj interŝanĝi opiniojn kaj starigi amikecon inter si. Kien ajn ni iris en la kongresejo, ni povis vidi, ke la komuna lingvo kunligas homojn el malsamaj anguloj de la mondo.

Ĉiutage dum la kongreso ĉiu membro de nia delegacio interparolis kun kelkdekoj, eĉ centoj

da fremdlandaj esperantistoj pri plej diversaj temoj. Parto de ili estas niaj malnovaj amikoj, sed pli granda parto estas novaj. Kun ni multe kontaktiĝis esperantistoj el orienteŭropaj landoj, kiuj montris grandan intereson ne nur pri la Esperanto-movado en Ĉinio, sed ankaŭ pri la atin-

ĉiujn ĉeestantojn, tial pluraj el ili devis kontentiĝi je starado ekster la pordo. Ĉe la kunsido oni laŭdis la principon praktikan de EPC en la lastaj jaroj kaj esperis, ke ni ĝin daŭrigos en la estonteco. Amikoj el Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Bulgario kaj aliaj landoj parolis unu post alia. Multaj el ili esperis, ke Ĉinio ludos ankoraŭ pli grandan rolon en disvastigo de Esperanto.

## HONORO KAJ ESPERO

Antaŭtagmeze de la 6-a de aŭgusto, post streĉa kaj fruktodona agado dum la kongresa semajno, ĉiuj kongresanoj lastafoje kolektiĝis en la Salono Zamenhof por ĉeesti la imponan fermon. Nun ilia nombro, anstataŭ "preskaŭ 5 000" ĉe la inaŭguro, estis jam pli ol 5 000.

Je la 11-a horo granda emocio ekkaptis la koron de ĉiuj esperantistoj el Ĉinio. D-ro Renato Corsetti paŝis al la oratora pupitro kaj oficiale anoncis en la nomo de UEA, ke la Estraro de UEA decidis, ke la pokalo Fyne, kiu en alternaj jaroj estas atribuita al la plej bona landa asocio, estos atribuita ĉi-jare al la Ĉina Esperanto-Ligo pro jenaj motivoj: unue, la Ĉina Esperanto-Ligo en relative mallonga tempo sukcesis vaste pliigi la agadon por disvastigo de Esperanto tra la tuta lando, tiel ke en la lastaj jaroj ĝi fariĝis la plej dinamisme kreskanta landa movado; due, la Ĉina Esperanto-Ligo estis unu el la landaj asocioj plej modele kunlaborintaj kun UEA en la lastaj jaroj. Apenaŭ li finis siajn vortojn, la tuta salono eksplodis per varma aplaŭdo, en kiu Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj vete-



*Ĉe kunsido de Ĉeĥ-Seminario*

rano senlace batalinta por Esperanto dum duon-jarcento, paŝis sur la podion kaj forte premis la manon al Grégoire Maertens kaj Renato Corsetti, prezidanto kaj vicprezidanto de UEA. Kiam la lasta oficiale donis al li la brilantan arĝentan pokalon, ĉirkaŭ 100 ĵurnalistoj kaj kongresanoj svarmis antaŭ la podion por foti tiun ĉi kortuŝan scenon.

Zhang Qicheng improvizis simplan paroladon. Li esprimis elkoran dankon al la Estraro de UEA en la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj aldonis, ke la diro "Rifuzi ne estas dece, sed akcepti embarase", kiun oni ofte uzas en Ĉinio, akceptante premion aŭ honoron, validas ankaŭ por la nuna okazo, ĉar en la laboro de la Ĉina Esperanto-Ligo ankoraŭ troviĝas multe da mankoj. "Tamen mi kredas, ke la pokalo instigos nin al pli bona laboro," li diris.

Sendube, estas granda honoro por la ĉinaj esperantistoj ricevi la pokalon Fyne, kiu ne nur simbolas la prizorgon kaj subtenon de UEA al la ĉina Esperantomovado, sed ankaŭ la grandan esperon, kiun diverslandaj sam-

ideanoj metas sur la ĉinajn esperantistojn.

Post kiam Hungario, ĉi-jara kongreslando, transdonis la kongresan flagon al Kanado, kiu gastigos ĉe si UK-on en la venonta jaro, la kongreso solene fermiĝis en kantado de "La Espero". Post tio la kongresanoj iris el la salono kaj adiaŭis unu alian kun bedaŭro.

Nun, Budapeŝto estas je miloj da kilometroj for de ni, sed ĝi lasis al ni multe da agrablaj rememoroj. Ni tutkore kredas, ke post tri jaroj, kiam la 71-a UK okazos en Ĉinio, ni havos ŝancon revidi niajn amikojn, kun kiuj ni konatiĝis dum la Budapeŝta kongreso. Karaj amikoj, sukceson al vi en via laboro por la progreso de nia komuna afero!





La aŭtoro

# Komunikado sur la bazo de Lingva egaleco

*Tiu ĉi prelego estis prezentita de la aŭtoro en unu el la kunsidoj pri la kongresa temo "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" dum la 68-a Universala Kongreso de Esperanto.*

— La Red.

Kiel juna esperantisto el Ĉinio, mi tre ĝojas ĉeesti tiun ĉi kunsidon kaj, des pli, iom paroli pri la sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado. Min forte kuraĝigas la konscio, ke, eĉ se mi estus tro sensperta por trakti la temon, mia partopreno en la diskuto tamen iom helpus konvinki la publikon, kiel bone komuniĝas la esperantistoj inter si kaj, sekve, kian rolon ludus Esperanto, se ĝi estus akceptita kiel komuna lingvo por la moderna internacia komunikado.

En la nuna epoko, kiam la scienco kaj teknikoj progresas preskaŭ ĉiumomente, la komunikado fariĝas aparte grava. Ĝi estas ne nur la "nerva sistemo" aŭ, kiel iuj diras, "unu el la bazaj ŝtonoj" de la nacia ekonomio, sed ankaŭ nemankigebla ponto por plifortigi la kunlaboron kaj interkompreniĝon inter diverslandaj popoloj. La kurlanta jaro estas deklarita de la Unuiĝintaj Nacioj kiel Monda

Komunika Jaro, kiu celas evoluigi la komunikan substruktuaron, precipe en la landoj de la tria mondo.

Kiel ni ĉiuj scias, dank' al la apliko de la komputilo, lasero, mikroondo, artsatelito kaj aliaj novaj scienc-teknikaj fruktoj, la moderna komunikado rapide disvolviĝas. Hodiaŭ oni ne nur povas tuj informiĝi pri tio, kio ĵus okazis en la aliaj kontinentoj, sed eĉ televidi hejme matĉon de futbalo okazantan en la alia hemisfero. La moderna komunikado interproksimigas la popolojn kaj progresigas la mondon. Tamen, restas pluraj problemoj, kiujn la modernaj teknikoj ne kapablas radikale solvi, ĉar tiuj problemoj ne estas nur teknikaj.

La lingva malegaleco en la komunikado estas unu el tiuj problemoj. Kiel oni scias, ĝis nun eĉ la plej grandaj radiostacioj en la mondo disaŭdigas per nur kelkdek lingvoj maksimume, dum en la mondo ekzistas minimume du mil lingvoj, el

kiuj ĉiu estas uzata de almenaŭ miliono da homoj. Rilate al televido, kiu, pere de artsatelitoj, povas sendi siajn programojn preskaŭ al ĉiu angulo de la tero, la lingvoj uzataj estas des pli limigitaj. Fakte, la lingva problemo malhelpas al multaj homoj eniri en la medion de la moderna komunikado, precipe al la popoloj de la tria mondo, kiuj plejparte parolas ne-hindeŭropajn lingvojn. Tio kaŭzas al ili perdon de tempo, miskomprenojn, ĝenajn barilojn por libera komunikado kaj antaŭ ĉio tio estigas lingvan diskriminacion. Ĉar se tiuj homoj deziras iom profiti el tiu komunikado, ili povas fari nenion alian ol humile kaj pene adapti sin al tiuj "grandaj lingvoj", ekz., la angla kaj la franca, kiujn trudas al ili la tiel nomata "moderna komunikado".

Permesu al mi ĉi tie citi la vortojn de sinjoro John Wells:

"Ni supozu, ke ekzistas du grupoj, grupo A kaj grupo B,

difinitaj per la karakterizaĵo, ke grupo A parolas kiel gepatran lingvon la A-an, kaj grupo B la B-an. Okazas lingva diskriminacio, se grupo B devas lerni kaj uzi la A-an lingvon por iuj sferoj de la vivo, dum grupo A ne bezonas simile lerni kaj uzi la B-an.”

Hodiaŭ pli kaj pli multaj landoj sendependiĝis politike kaj ekonomie. Ili deziras ankaŭ lingve kaj kulture meti finon al sia dependeco de aliaj landoj aŭ potencoj. Ili rajtas postuli, ke aliaj lernu iliajn lingvojn, se tiuj volas komunikiĝi kun ili. Tiu postulo estas tute justa kaj racia.

Sed aliflanke, en la mondo estas tiom da landoj kun tiom da lingvoj, ke praktike oni apenaŭ povus traduki ĉiujn internaciajn parolojn aŭ skribaĵojn en ĉies lingvojn. Eĉ nun, ĉe ĉiuj internaciaj organizoj kaj renkontiĝoj, la elspezo por ne-produktivaj aferoj, antaŭ ĉio por tradukado, estas terure granda. Oni taksis, ekz., ke la sumo de “rekta lingva kostaro” ĉe la Unuiĝintaj Nacioj delonge superis 100 milionojn da usonaj dolaroj ĉiujare. La Monda Sanec-Organizo, pro pliiĝo de siaj laborlingvoj, elspezis grandan sumon da mono por la tradukado, sed samtempe ĝi devis rezigni helpoprojektojn pro manko de mono. La samo okazas ankaŭ al la Eŭropa Komunumo, kie ĉiu tria oficisto ja laboras en funkcio rilatanta al la uzado de lingvoj. Analogaj ekzemploj estas ja sennombraj.

Nun oni povas facile veni al la konkludo, ke la plej ideala solvo de la lingva problemo en

la internacia komunikado estas apliki unu neŭtralan lingvon. Esperanto, kiu ne nur vivas, sed senĉese kreskas dum preskaŭ cent jaroj, ĝuste estas tia lingvo. Se oni prenis Esperanton kiel komunan lingvon por la internacia komunikado, ĉiuj parolantoj kaj skribantoj havus la saman zorgon respekti ĝin, ĉar ĝi aperus al neniu kiel fremda lingvo, sed ja kiel komuna posedaĵo; kaj aliflanke ĉiu havus multe pli da faciligo por lerni ĝian simplan sintakson kaj ĝian raciigitan vortaron. Hodiaŭ en la mondo troviĝas miloj kaj miloj da Esperantaj eldonaĵoj kaj pluraj Esperantaj disaŭdigejoj, interalie, la ĉina monata gazeto El Popola Ĉinio, kiu daŭre prezentas la aktualan vivon de la ĉina popolo en pli ol 30 jaroj, kaj Radio Pekino, kiu disaŭdigas diverstemajn programojn kvarfoje en ĉiu tago. Per sia preskaŭ centjara praktiko la esperantistoj de diversaj landoj jam klare kaj elokvente pruvigas la taŭgecon de Esperanto por la internacia komunikado.

Estimataj amikoj, kvankam la aktivadoj ligitaj al la Monda Komunikado Jaro multe koncentriĝas sur la starigo de pli bonaj telekomunikaj sistemoj en la evoluantaj landoj, ni esperantistoj uzu la okazon atentigi la eksteran mondon, ke por la dezirinda senpera kontakto inter homoj ne nur gravas teknikaj instrumentoj, sed ankaŭ neŭtrala komuna lingvo. Ni ja povas diri, ke ju pli evoluas la teknikoj de komunikado, des pli la popoloj interproksimiĝas kaj des pli la lingvaj baroj sentiĝas. Hodiaŭ, se ni tion neglektus, niaj posteuloj iutage demandus sin en konfuzo, kial iliaj antaŭuloj,

tiel saĝaj kaj inteligentaj rilate al teknikoj, estis tiel blindaj kaj ignoremaj kontraŭ la lingva problemo.

Kompreneble, ni ne devas imagi, ke iun matenon la komunikaj departementoj, la registaroj de ĉiuj landoj subite akceptos Esperanton kiel komunan lingvon por la internacia komunikado. La realiĝo de nia bela idealo dependas de la longa kaj persistema laboro de la diverslandaj esperantistoj.

Tial, kun granda ĝojo ni vidis, ke ĝuste en Budapeŝto, la bela urbo, kie ni nun kunvenas, stariĝis la Scienca Eldona Centro de UEA antaŭ du jaroj kaj okazis multe da fruktodonaj agadoj, ekz., la Internacia Komputosciencia Simpozio kaj Ekspozicio antaŭ pli ol duonjaro; kun granda ĝojo ni rimarkas la progreson de Esperanto-movado en ĉiuj anguloj de la mondo; kaj kun same granda ĝojo ni vin sciigas, ke ankaŭ en Ĉinio pli kaj pli vigliĝas nia laboro, precipe post kiam la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko revalidigis la sciigon pri la instruo de Esperanto kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj en altlernejoj.

La ĉinaj esperantistoj, la ĉina popolo nepre faros sian kontribuon en la opono kontraŭ diversformaj diskriminacioj, inkluzive la lingvan. Mi esperas, ke dank’ al la klopodo de diverslandaj esperantistoj Esperanto ludos pli kaj pli gravan rolon en la internaciaj kontaktoj kaj finfine starigos la modernan komunikadon sur la bazo de lingva egaleco.

Dankon!

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekom-pencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiar-taĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kri-tikoj de la recenzantoj.

LA RED

**DON JUAN' TENORIO** (1844), José Zorrilla (1817-1893). El la hispana trad. Luiso Mimo Espinalt. Eldono Gabrielli, Italujo, Anscoli Piceno 1981. 188 p. 14 × 20 cm.

En la kroniko de Sevilo ni legas, ke sĵor'\* Juan' Tenorio, el unu de la dudek kvar altrangaj familioj de Sevilo, iun nokton mortigis la komandoron Ulĵoo forrabinte ties filinon. La komandoro estis enterigata en la monaĥejo de Sankta Francisko, kie lia familio posedis kapelon. La Franciskanaj monaĥoj, dezirante ĉesigi la diboĉojn de sĵor' Juan', kies influhava deveno ŝirmis lin kontraŭ la ordinara justico, sub trompa preteksto altiris lin iun nokton en sian monaĥejon kaj mortigis lin. Ili cirkuligis la famon, ke sĵor' Juan' estis veninta insulti la komandoron sur lia tombo kaj ke la statuo de 1' mortinto enabismigis lin kaj trenis lin en la inferon.

La poetoj ne hezitis priverki tiun historion. Malfermas la longan vicon Tirso De Molino per sia komedio LA VIRINDELOGISTO DE SEVILO KAJ LA INVITITO EL ŜTONO. Multaj aliaj lin sekvis, inter ili Kornejo, Moreto, Mocarto, Moliero, Goldono kaj lordo Bajrono, kies protagonisto apenaŭ ankoraŭ spegulas la originan sĵoron Juano, tute same kiel unu el la lastaj, nome tiu de Maks' Friŝ'.

## La Esperanta Don Juan' Tenorio

Apartan famon gajnis SJOR' JUAN' TENORIO, sep-akta dramo de Ĥoseo Soriljo (Jose Zorrilla). Tiu verko restas intime ligita al la tradicio de Tirso. Ĝi estas vigla esprimo de la malfrua romantikismo. Eniĝis en la teatraĵoj kelkaj novaj figuroj kaj trafaj motivoj, kies precizeco konvene interplektas la diversajn aspektojn de la okazaĵoj. Speciale la scenoj kun la statuo ligiĝas pli firme en la konek-sion de la tutajoj. Inter la unua parto (aktoj unu ĝis kvar) kaj la dua (aktoj kvin ĝis sep) estas in-tertempo de pluraj jaroj kaj ankaŭ klare sentebla diferenco en la dra-meca stilo. La dua parto estas plena de melodramaj efektoj laŭ la gus-to de la deknaŭa jarcento. Tio

tamen ne malutilas al la forma unueco de la teatraĵo. La morna etoso de la tombejo heliĝas fine per la sava potenco de la amo. La populareco de la dramo konserviĝis ĝis niaj tagoj. Oni surscenejigas ĝin "senkompare pli multfoje ol iu ajn alia en la hispanlingvaj landoj", diras la antaŭparolo.

La traduka lingvaĵo de Luiso Mimo Espinalt' estas tiu de lia re-volucia KOMPLETA LERNOLI-BRO DE REGULA ESPERANTO, do regulita, sen neologismoj de dubinda neceso, libera de tradiciaj eraroj kaj de individuaj strangaĵoj.

Recenzis RIKARDO ŜULCO

(FR Germanio)

## Nove ricevitaj libroj

**BAZA LITERATURA KRESTO-MATIO** dua ampleksigita eldono, 1982, redaktita de Vilmos Benczik. Formato: 12 × 17 cm. 282 p. 135 pecoj, kun biografiaj notoj pri la 58 aŭtoroj. Prezo: 13.8 gld.

**KATOJ KAJ ĈEVALOJ** poemaro de Adalberto Huleŝ, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio, 1982, Formato: 14 × 20 cm. 80 p. Prezo: 12 gld.

**GRAMATIKA DEMANDARO RESUMA** kompilita de Julio Baghy, eldonita de la Hungara Es-peranto-Asocio, 1982. Formato 14 × 20 cm. 40 p. Prezo: 6 gld.


**KION SCII POR ORGANIZI NIAN MOVADON** eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio, 1982.

Formato: 14 × 20 cm. 30 p. Prezo: 3 gld.

**LA NOVA TESTAMENTO** eldonita de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo. Formato: 12.5 × 19 cm. 226 p. Prezo: bind. £ 1.60. Mendeb-la ĉe la Brita Esperanto-Asocio.

**LA VERDA RELO** beletra anto-logio pri la fervojo, eldonita de Kooperativo de Literatura Foiro. Formato: 14.5 × 20 cm. 68 p. Pre-zo: 12 svisaj frankoj aŭ 15 germa-naj markoj. Havebla de la eldonejo (adr.: CP 417, CH 2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Poŝtĉeka konto 23-6636).

**LA AVENTUROJ DE HUCKLE-BERRY FINN** bildrakonto laŭ verko de M. Twain, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio, 32 p.



*"Don Juan' Tenorio" eldonita en Esperanto en 1981*

**LA NAŬA KANALO** 31 originalaj rakontoj de Istvan Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio, Formato: 14 × 20 cm. 106 p. Prezo: 13.8 gld.

**ĈU VI VIDIS JAM LA PIEDSIGNON DE L' PROFETO?** dramo de Elem János kun Esperanta tradukajo de Vilmos Benczik. Eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio.

**LA ROZO DE L' SULTANO** de Gyula Krudy, bildrakonto eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato 12 × 18 cm. 54 p. Prezo: 9.0 gld.

\* "sjor" glatiga mallongigo de "sinjoro", analoge kiel la hispana "don" de la latina "dominus", kiu signifas "sinjoro". "Don" estas tre malkonvena fremdvorto en Esperanto. Ĝi estas identa kun la radikoj "don" (= tio, kion oni donas) kaj ĝia akuzativa uzado estas apenaŭ bela, ekz. "Dio punis don-on Juano", sed tre Esperante "Dio punis sjoron Juano". Sed oni tre konvene povas konservi la unuvorte skribitan "donjuano" en la ĝenerala senco de "delogisto".

Por komencantoj

## Letero al la Avino

Kara avino,

Via letero bonorde atingis min. Depost kiam mia patrino mortis, vi ofte skribis kaj donis al mi multajn konsilojn. Elkoran dankon al vi! En via letero mi sciigis, ke vi ankoraŭ maltrankviliĝas pro mia vivo. Vi aparte atentigis min, ke la duonpatrino neniel povas esti pli bona ol la propra patrino. Verdire, en la komenco ankaŭ mi havis tiun antaŭjuĝon. Sed, nia lastatempa kunvivado sentigis al mi, ke la duonpatrino amas min same kiel mia propra patrino. Nun mi denove ricevis la patrinan amon!

Mi ankoraŭ memoras tiun tagon, kiam mia patro kondukis ŝin hejmen. Falis neĝo. Kvazaŭ infano ŝi ensaltis en la domon kaj deskuis de si la neĝerojn. Ŝiaj vangoj ruĝiĝis de frostoj, kaj ŝi blovis sur siajn manojn por ilin varmigigi. Ŝi ridetis al mi, sed mi ĵetis al ŝi abomenan ekrigardon. Ho, modaj bukloj sur ŝia kapo! Al la diabloj! Kiam mia patro proponis min voki ŝin "Panjo", ŝi sentis grandan embarason. Mi diris al mi mem: "Ĉu ŝi meritas la sanktan titolon 'panjo'?!"

En mia imago la duonpatrino ĉiam estas malica. Mi malbenis mian sorton, kiu tiel maljuste traktas min. Mi ofte staris meditante antaŭ la foto de mia patrino kaj rememoris belajn tagojn, kiujn mi pasigis kune kun ŝi. Sed, al tiu bela duonpatrino mi estis malvarma kiel glacio.

Kun tempopaso pli kaj pli boniĝis mia impresoj pri ŝi. Ĉiutage, tuj post sia hejmenreveno de la fabriko ŝi ekokupas sin per kuirado,

vestolavado kaj aliaj domlaboroj, kaj kelkfoje ankaŭ iom amuziĝas kun mi. Estas strange, ke ŝi povas prepari kelkajn pladojn, kiujn mi tre ŝatas, same lerte kiel mia propra patrino. Vidante, ke mi manĝas ilin kun granda apetito, rideto aperis sur ŝia vizaĝo.

Foje, mi havis fortan febron pro malvarmumo kaj kuŝis en la lito. Pluvigis ekstere, kaj min kaptis granda soleco. Tiam mi pensis: "Se mia patrino ankoraŭ vivus. . ." Pro kora malĝojo mi eklarmis. Ĝuste tiam malfermiĝis la pordo. Mi haste forviŝis la larmerojn. "Xiaoqin, mi jam petis por vi forpermeson en la lernejo. Nun mi dorsportu vin al malsanulejo." Dirinte tion, la duonpatrino metis pluvmantelon sur min kaj ekiris el la domo dorsportante min. Ŝia malforta korpo pene sin klinis antaŭen en la pluvado. Mi sentis tremadon de ŝia korpo kaj estis kortuŝita ĝis larmoj. Mi forte premis min al ŝi, kaj en tiu momento mi ekhavis la senton, ke niaj koroj kunfandiĝis. Kiam ŝi metis min en la malsanulejon, mi nereteneble ĵetis min en ŝian sinon kaj vokis ŝin "Panjo", vorto kiun mi jam longe ne uzis. Kara avino, vi certe komprenas mian koron!

Ĉiuj niaj najbaroj diris, ke mi denove havas bonkoran patrinon. Kara avino, kiam vi scios tion, vi certe sentos grandan ĝojon. Nun, mi, en la nomo de la patro kaj patrino, salutas vin, kaj invitas vin al ni.

Bonan sanon,

Via Xiaoqin

## LA NINGXIA-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

La 28-an de julio naskiĝis la nomita asocio, kies inaŭguron ĉeestis pli ol cent esperantistoj novaj kaj veteranaj. La kunveno elektis veteranan esperantiston Wang Yanxin, vicprezidanton de la popola registaro de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, kiel honoran prezidanton de la asocio kaj Liu Shan, vicprezidanton de la Scienca kaj Teknika Asocio de la regiono, kiel ĝian prezidanton. Wang diris en sia saluta parolado: "Esperanto estas utila al la homaro por atingi la ĝeneralan celon de la lingva unuiĝo de la mondo. Ĝi ludos pli kaj pli gravan rolon en la progressa afero de la homaro kaj efektiviĝo de ĝia komuna nobla idealo." Li proponis, ke diversnivelaĵoj registaroj varme subtenu tiun aferon kaj aktive kulturu Esperantajn fakulojn.


### NOVA ESPERANTO-KURSO EN RADIO

Chongqing, unu el la grandaj urboj de Ĉinio, ekfunkciigis Esperanto-kurson en sia radio ekde la 10-a de julio. La kurso daŭris kvar monatojn. Tiu loka radio funkciigis Esperanto-kurson nur post la radio de Taiyuan, la ĉefurbo de Shanxi-provinco, kiu la unua tiel faris. Oni elsendis la kurson trifoje ĉiutage inter lundo kaj sabato kaj en dimanĉo faris unuhoran ripeton de la lecionoj. Koncerna informilo diris, ke en apenaŭ dek tagoj ekde la komenco de la kurso pli ol kvin mil aŭskultantoj mendis lernolibrojn.

### ĈINIO INFORMIS PRI LA 68-A UK

La 2-an kaj 9-an de aŭgusto «Renmin Ribao», la plej influa ĵurnalo de Ĉinio, raportis la inaŭguron kaj fermon de la 68-a UK. La 17-an de la sama monato la ĵurnalo publikigis la artikolon "Internacia Kunveno sen Interpretis-

Wang Yanxin, vicprezidanto de la popola registaro de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono surskribas okaze de la fondiĝo de la Ningxia-a Esperanto - Asocio: "Disvastigu Esperanton por fari kontribuon al la progressa afero de la homaro!"



toj", verkitan de Zen Hojaŭ, membro de la Ĉina Esperanto-Delegacio.

Alia influa ĵurnalo «Guangming Ribao» publikigis la raporton pri la kongreso kun titolo "Honoro kaj Espero", verkitan de Zhou Dongyue, ĵurnalisto de la Novaj-agentejo Xinhua en Budapeŝto.

Ankaŭ la Novaj-agentejo Xinhua elsendis informon kaj specialan artikolon pri la inaŭguro kaj fermo de la kongreso.

### SOMERA SEMAJNO DE ĈINAJ ESP-ISTOJ

Aŭguste ĉi-jare la Esp-asocioj de Pekino, Kunming, Wuhan, Chang-

sha kaj aliaj urboj okazigis someran semajnon aŭ somerajn tagojn por levi la lingvan nivelon kaj plifortigi la rilatojn inter esperantistoj de tiuj lokoj. La Pekina Esperanto-Asocio invitis samideanojn el aliaj provincoj kaj municipoj al sia semajno. Dank' al enhavoriĉaj aktivadoj la partoprenantoj lertigis sian konversacion, vigligis sian vivon kaj plifortigis la amikecon inter si.

### ESPERANTO EN LA BILDGAZETO "QIUZHI"

En la bildgazeto "Qiuzhi", n-ro 3, 1983, sub la titolo "Promesplena Lingvo Esperanto" publikigis sep

*Pekinaj esperantistoj plezurveturas en la akvorezervejo Miyun dum la Somera Semajno.*





bildoj, per kiuj oni konigis nian lingvon la unua post la naskiĝo de la nova Ĉinio. La gazeto estas eldonata en Shandong-provinco.

### LA 35-A KONGRESO DE IFEF

Belgio invitis ĉi-jare la 35-an Kongreson de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) al la ĉemara havenurbo Oostende. La kongreson ĉeestis 435 personoj el 19 landoj. De la 4-a ĝis la 10-a de junio ruliĝis interesa, varia programo.

Parolis en la inaŭguro E. Flachet, ĝenerala direktoro de la belgaj fervojoj. Salutis esperantolingve la ĝenerala prezidanto de la "Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj" (FISAIC), F. Schmit (Luksemburgo) kaj la urbestro de Oostende, J. Goekint. Bonvena parolanto estis la prezidanto de UEA, G. Maertens.

Kunvenis kelkaj komisionoj inkluzive de la Terminara Komisiono, kiu post jaroj da streĉa laboro alproksimiĝas al sia celo: kreado de Esperanto-terminaro paralela al la oficiala seslingva terminaro de la Internacia Fervoja Unuiĝo (UIC),

kiu enhavas pli ol 11 000 terminojn.

Ĉiu kongresano trovis en sia materialo la numeron 4 de El Popola Ĉinio kun interesaj prifervojaj artikoloj, bonvenan donacon de ĝia redakcio.

IFEF-prezidanto J. Giessner fermis la kongreson dankante al la organizantoj kaj per resumo de la farita laboro. L. de Sutter, prezidanto de LKK, transdonis la federacian flagon al M. Marinov, prezidanto de la bulgara asocio de IFEF, kiu invitis la 36-an kongreson por majo 1984 al Slanĉev Brjag ĉe la bordo de la Nigra Maro.

### ALPAROLO DE EŬROPA PARLAMENTANINO PRI ESPERANTO

La 1-an de julio la eŭropa parlamentanino Mechthild von Alemann de la Germanaj Liberaluloj estis publike demandata pri problemoj en la Eŭropa Komunaĵo. Inter la 35 ĉeestantoj, kiuj venis tial al la distrikta ĉefurbo Steinfurt, estis 8 esperantistoj sub la gvido de s-ro Helmut Klünder, la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio. S-ino von Alemann informis, ke ne

plu imageblas, ke la angla aŭ franca lingvo estos la oficiala lingvo por la Eŭropa Komunaĵo, kontraŭe al tiaj revoj antaŭ nur 4 jaroj. Ĉar la diversaj lingvoj devas resti egalrajtaj, ekzistas nur neŭtrala solvo kiel Esperanto. Ŝi volis scii pli pri la nova Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo kaj post kontrolo de la celoj aliĝi al ĝi. La lokaj partianoj anoncis specialan eŭropan vesperon por aŭtuno kun nura temo "solvo de la lingva problemo por Eŭropo". Ŝajnas, ke la esperantistoj dum la venontaj monatoj en la landoj de la Eŭropa Komunaĵo kaptos sian ŝancon por sukcese alparoli pliajn politikistojn antaŭ la baloto por la Eŭropa Parlamento venontjare.

### LA 43-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 20-a ĝis la 25-a de julio, en la urbo Zaragoza en la Aŭtonoma Aragona Regiono okazis la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto. Ĝin ĉeestis ĉ. 400 esperantistoj. Dum la kongreso 12 fakaj kunvenoj estis aranĝitaj. Estis starigita la Hispana Jubilea Komisiono por la 100-jara datreveno de Esperanto.

*S-ro E. Flachet, ĝenerala direktoro de la Belgaj Stataj Fervojoj, alparolas la kongreson.*



*La insigno de la 35-a Kongreso de IFEF*



# VICPROFESORO KAJ KAMPARANOJ

**I**UN tagon Yang Jingming, estro de Dongshuangtang-brigado, Jinghai-gubernio, Tianjin, gastis ĉe Wang Lianchun, vicprofesoro de la brutobreda fakultato de la Pekina Agronomia Universitato.

Ekvidinte lin, la grizhara Wang Lianchun ĝojigis kiel infano. Li tenis lin je la manoj kaj sidigis lin ĉe tablo por regali lin per vino.

Kiel ili fariĝis tiel intimaj? Aŭskultu jenan rakonton pri travivaĵoj de Wang Lianchun de antaŭ ok jaroj.

## “RIĈIGAJ DIOJ” VENIS AL DONGSHUANGTANG

En la vintro de 1975, kiam Ĉinio alfrontis grandan tumulton de la kultura revolucio, la Pekina Agronomia Universitato devigite ĉesigis la lecionojn. Tio ebligis al la 46-jara Wang Lianchun, estro de la instrua kaj esplora sekcio pri porkobredado de la brutobreda fakultato de la

universitato, resti hejme por legi librojn kaj eviti la tumulton. Tamen la konscienco kaj devo de intelektulo maltrankviligis lin. Fine li konsiliĝis kun aliaj instruistoj de la fakultato kaj decidis elekti vilaĝon kiel bazon por fari sciencajn eksperimentadon kaj doni agrikulturajn sciojn al kamparanoj.

En marto, kiam la glacio kaj neĝo en la norda parto de Ĉinio ekdegelis, li forlasis sian komfortan hejmon kaj venis al Tianjin. Lia malnova kunlernanto diris al li: “Iru al Dongshuangtang-vilaĝo de Jinghai-gubernio. Tie la kamparanoj vivas mizere, sed forte deziras ŝanĝi la fizionomion de sia hejmloko.” Tiel Wang Lianchun venis provmotive al Dongshuangtang, la plej malalta loko en la baseno de Haihe-rivero, kie la enteno de salo en la grundo atingis eĉ 0.8%.

Tiam ankaŭ aliaj ses vicprofesoroj kaj docentoj de la fakul-

tato kune kun li venis al tiu malgranda vilaĝo. Li ne estis certa, ĉu la kamparanoj bonvenigos ilin.

Brigada respondeculo Wang Dianchen akceptis ilin. Wang Lianchun ne atendis, ke ekridis tiu modesta kaj malkaŝema kamparano, informiĝinte, ke venis instruistoj de la brutobreda fakultato de la Pekina Agronomia Universitato por doni al ili agrikulturajn sciojn. “Tre bone!” Wang Dianchen ĝojis. “Nia brigado bredas pli ol dumil porkojn, el kiuj multaj mortis de malsano. Ni havas malprofiton de 50 000-60 000 juanoj en jaro, kaj la problemo restis nesolvita, malgraŭ ke ni lernis sperton en multaj lokoj.” Li tuj kondukis ilin al la porkobredejo. Dudek jarojn Wang Lianchun dediĉis al studo de porkobredado, sed li preskaŭ ne kredis siajn okulojn, kiam li vidis la porkojn bredatajn de la brigado. Ili estis tiel malgrasaj, ke elstariĝis ĉiuj iliaj ripoj. La koro de Wang Lianchun estis peza kiel plumbo.

Kiel soifas sciencon la kamparanoj! Sed estas tre malfacile ŝanĝi iliajn tradiciajn ideojn kaj kutimojn longe ekzistantajn. La kamparanoj povas konvinkiĝi nur tiam, kiam ili propraokule vidas fakton.

Wang Lianchun kaj liaj kolegoj decidis komenci sian laboron per instruado de porkobreda tek-

*Abunda rikolto antaŭvidebla*



niko. Ili kaj organizis rondiran kuracadon por sanigi la porkojn kaj proponis ŝanĝi la bredan metodon kaj konsiston de nutraĵo. Por konvinki la kamparanojn, ili faris kontrastan eksperimentadon pri la bredaj metodoj nova kaj malnova per ses porkoj respektive. La efikoj estis tute malsamaj. Poste ili faris artefaritan fekundigon al porkinoj, kio altigis ilian graved-procentaĵon. Ili proponis ankaŭ, ke oni reduktu la nombron de generaj porkoj de 20 al 4, tiel ke oni povos ŝpari pli ol 10 000 kilogramojn da nutraĵo en jaro. La nova bredmetodo faris sensacion en Dongshuangtang. La vidkampo de la kamparanoj larĝiĝis, eĉ tiuj kamparanoj, kiuj iam dubis pri la laboro de Wang Lianchun kaj liaj kolegoj, akceptis la novan metodon.

Zhang Deyin, kiu edziĝis en la aĝo de pli ol 40 jaroj, prunteprenis 1 500 juanojn pro sia mizera vivo kaj ne povis liberigi sin de la ŝuldo. Post kiam li ekuzis la sciencan metodon por bredi porkojn, li jam vendis en la unua jaro sep grasajn porkojn kaj en la dua jaro ne nur kvitiĝis, sed eĉ konstruis kvar brikajn domojn kaj aĉetis brakhorloĝon kaj biciklon.

Wang Lianchun kaj liaj kolegoj enradikiĝis en Dongshuangtang kaj ankaŭ en la koroj de la kamparanoj. Ĉi tiuj laŭdis, ke ili estas "Riĉigaj Dioj".

### NOVA FIZIONOMIO DE DONGSHUANGTANG

En 1977, unu jaron post la fino de la kultura revolucio, Wang Lianchun zorgeme projektis por Dongshuangtang belan planon, idealan por disvolvi produktadon aplikante sciojn de moderna agrikulturo. La plano celas disvolvi ne nur porkobre-



*Vicprofesoro Wang Lianchun (maldekstre) esploras la tritikon de Dongshuangtang-brigado.*


dadon, sed ankaŭ bredadon de laktobovinoj kaj laktokaprinoj, produktadon de greno kaj kultivadon de fruktarboj. Por efektiviĝi la planon, Wang Lianchun invitis al Dongshuangtang pli ol cent instruistojn el la fakultatoj agronomia, grund-kemia, hortikultura kaj agrikultur-ekonomika kaj el la esplora instituto kaj eksperimenta stacio de la universitato por doni lecionojn al la kamparanoj kaj gvidi ilin en ilia produktado. Inter tiuj instruistoj troviĝis pli ol 30 vicprofesoroj. La intelektuloj persistis jam sep jarojn ĝis nun.

Nun la fizionomio de Dongshuangtang tute aliĝis: Ambaŭflanke de la rekta asfaltita strato staras magazeno, sanitarejo kaj vicoj da loĝdomoj el ruĝaj brikoj.

Sur la alkala tero ĉe vilaĝfino fondiĝis agrikultur-sciencia taĉmento. Tie funkciis grund-analiza kaj vegetal-protekta laboratorio kun instrumentoj kaj ins-

talajoj valorantaj pli ol 30 000 juanojn. La analizistoj estas vilaĝanoj. Ili elektis en la vilaĝo 26 lokojn, kiujn ili esploris trifoje en printempo, somero kaj aŭtuno por koni la acidecon de grundo kaj la kvanton de organikaĵo, nitrogeno, fosforo kaj kalio kaj ellabori racian projekton de sterkado. Tie la akvo havas teruran alkalecon, tial la analizistoj ofte analizas akvon, por ke oni povu irigacii kampojn per plej bona akvo.

Oriente de la grund-analiza laboratorio estas la brigada porkejo, kie oni bredas porkojn per sciencaj metodoj. Nun oni studas kiel bredi porkojn kun malgrasa viando ŝatata de urbanoj. Sub la gvido de Wang Lianchun kaj aliaj specialistoj la porkobredistoj tenas la porkejon en bona ordo. Ili preparas miksitan nutraĵon konsistantan el proteino, klorofilo k. a. Dank' al la apliko de la sciencaj metodoj al bredado de porkoj, la porkidoj, hibrid-



*La lakto-pulvora laborejo de Dongshuangtang-brigado*

doj de virporko el Changbai kaj nigra porkino el Pekino, maturiĝis nur post ses monatoj, kaj la procentaĵo de ilia malgrasajo atingis 56%. La kosto por bredado reduktiĝis je duono kompare kun tiu antaŭ apliko de la sciencaj metodoj. Nun en la brigado troviĝas ok tiaj kolektivaj porkobredejoj kun pli ol 2 000 porkoj. Krome, pli ol 2 600 porkoj estas private bredataj. En Dongshuangtang jam ne troviĝas tia familio, kiu ne bredas porkojn.

La brigado bredas ne nur tiom da porkoj, sed ankaŭ pli ol 2 000 laktokaprinojn, plene utiligante sovaĝajn herbojn. En la vilaĝo estas unu bovejo kun 27 lakto-bovinoj, kies lakton oni regule liveras al la urbo Tianjin, unu laktajfabriko kun jara produktokvanto de kvarcent tunoj da laktopulvoro kaj unu fiŝbredejo kun du-hektara akvosurfaco. La enspezo de la brutobredado de Dongshuangtang jam okupis 23% de la totala enspezo de la vilaĝo.

Antaŭ 1970 en Dongshuangtang estis 306.6 hektaroj da mal fekundaj alkalaj agroj, kies grena produktokvanto estis malalta kaj nestabila. Dank' al la popularigo de la agrikulturaj scienco kaj tekniko, la hektara produktokvanto de greno en 1982 kreskis 3-oble, la totala produktovoloro de agrikulturo kvarobliĝis kompare kun tiu en 1967, kaj la vilaĝanoj enspezis po pli ol 500 juanojn, 5-oble kiom antaŭ 12 jaroj. 60% de la familioj loĝas en novaj domoj, kaj pli ol 100 familioj aĉetis televidilojn.

Ankaŭ la instruistoj de la Pekina Agronomia Universitato multe rikoltis en la praktiko, kiu riĉigis ilian instruan enhavon, akcelis ilian sciencan esploradon kaj plirapidigis ilian progreson.

### **MALAPERIS "RIKOLTO DEPENDA DE LA ĈIELO"**

Frue en 1977 Wang Lianchun proponis al Yang Jingming, ke Dongshuangtang sendu kamparanojn al la Pekina Agronomia

Universitato por kulturi ilin en teknikistojn. Li diris: "Ni restas ĉi tie portempe, vi devas kulturi viajn proprajn specialistojn por science disvolvi la terkulturon kaj brutobredadon de via brigado, kaj tiam ni havos helpantojn por la scienca eksperimentado." Yang Jingming trovis lian ideon bona. Tamen la brigado devas pagi sumon da mono por tio, necesas konsiliĝi kun la vilaĝanoj.

Post la interkonsiliĝo la respondeculoj de la brigado decidis sendi taŭgajn personojn ne domaĝante monon. Ili kune kun Wang Lianchun elektis 12 certgrade klerigitajn junulojn, neniam forlasontajn la kamparon sed havantajn fortan deziron ŝanĝi ĝian fizionomion, kaj sendis ilin lerni en la universitato. Post unu aŭ duona jaro ili finis sian lernadon en la fakultatoj grund-kemia, agronomia, brutobreda kaj agrikultur-ekonomika. Nun ili ĉiuj faris kontribuon al la disvolviĝo de agrikulturo kaj brutobredado de la brigado.

Han Derong, estro de la agrikultur-sciencataĉmento, estis elstara el ili. Tiu junulo kun modesta laborstilo de tipa kamparano trovis ŝaton ĉe Wang Lianchun. Li lernis sciencan pri terkulturo duonjaron en la agronomia fakultato de la universitato. Dum libertempo li lernis kiel kromstudento de la grundkemia fakultato. Reveninte al Dongshuangtang, li starigis en la vilaĝo 30 grundobservejojn por bone analizi la terkonsiston, kio donis sciencan bazon por racia sterkado. Ekzemple, en la pasinteco oni sciis nur, ke al la grundo de Dongshuangtang mankas fosforo, sed post sterkado de kalcia superfosfata sterko la efiko ne estis rimarkinda. Kio es-

tis la kaŭzo? Neniu povis klarigi tion. Kiam Han Derong lernis en la Agronomia Universitato, li komprenis, ke la efiko de fosfora sterko dependas de pH de grundo kaj estas plej alta je 7 gradoj de pH. Post analizo de la grundo Han Derong trovis, ke pH de la grundo de Dongshuangtang estas inter 8 kaj 8.3 gradoj, kio superis la neŭtralecon, tial fosfora sterko malbone efikis. Li do ŝanĝis la metodon sterki fosforan sterkon, dank' al kio fosfora sterko ekefikis plene. Nun Han Derong povas iam ajn fari sciencan analizon en sia grund-analiza laboratorio. La popoldiro "rikolto dependa de la ĉielo", kiu cirkulis milojn da jaroj inter la kamparanoj, ne plu estas kredata, ĉar nun la kamparanoj ekhavis agrikulturajn sciojn.

En la lastaj jaroj Dongshuangtang kulturis por si 20 junulojn, kiuj atingis la nivelon de teknika mezlernejo en fakaj scioj pri brutobredado aŭ grund-kemio. El ili tri funkcias kiel ĉefaj respondeculoj de la vilaĝo, kvar kiel fakestroj kaj la ceteraj dek tri kiel teknikistoj pri grund-kemio, vegetala protekto, bestokuracado, brutobredado kaj brutofekundigo. Sub la gvido de instruistoj de la Pekina Agronomia Universitato kaj surbaze de sia multjara sperto en studado kaj laborado, brigada respondeculo Liu Jinhai verkis "Peridotabelon de Evoluo de Maizlarvoj de Diversaj Generacioj". Brutobreda teknikisto Jin Baoyi nun estas specialisto pri artefarita fekundigo al porkinoj. Dank' al la gvido de Wang Lianchun kaj aliaj instruistoj la gravedprocentaĝo de la porkinoj superis 95%. Specialistoj diris, ke lia sukceso jam atingis la avangardan nivelon de nia lando.

## ABONTARIFO DE EPĈ

(Validas ekde 1. 11. 1983)

Lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	7.00	11.00	15.00
Aŭstrio	Sch	100.00	170.00	240.00
Belgio	BF	230.00	390.00	550.00
FR Germanio	DM	14.00	24.00	34.00
Britio	£	4.00	6.50	9.00
Finnlando	FMK	30.00	51.00	72.00
Francio	FF	40.00	86.00	96.00
Hispanio	Pts	700.00	1200.00	1700.00
Italio	Lit	6000.00	10000.00	14400.00
Japanio	Yen	1400.00	2400.00	3400.00
Jugoslavio	Din.	200.00	340.00	480.00
Nederlando	Gld.	16.00	27.00	38.00
Nov-Zelando	NZ\$	8.00	14.00	20.00
Portugaliao	Esc.	500.00	850.00	1200.00
Svisio	SF	12.00	20.00	28.00
Usono	US\$	6.00	10.00	14.00
Kanado	Can\$	7.50	13.00	18.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	4.00	6.50	9.00
	US\$	6.00	10.00	14.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	2.80	4.60	6.50
	US\$	4.00	7.00	10.00

Antaŭ nelonge Wang Lianchun estis nomumita vicguberniestro de Jinghai (kumule). Li prenis sur sin la taskon disvastigi la sperton de Dongshuangtangbrigado en dek malsamtipaj re-

gionoj de la gubernio. La Pekina Agronomia Universitato difinis la gubernion kiel unu el siaj bazoj por fari sintezan eksperimentadon de agrikultura modernigo.

# Elektra Industrio de Shandong, Zhejiang kaj Ŝanhajo

**L**A elektra industrio de Ĉinio havas senperan influon sur la efektiviĝo de la plano de la nacia ekonomio kaj la socia disvolviĝo, kaj estas tre zorgata de personoj en- kaj eksterlandaj.

En majo kaj junio ĉi-jare, kun kolegoj de la ĉefurba ĵurnalismo mi faris esploradon pri la elektra industrio de la provincoj Shandong, Zhejiang kaj la urbo Ŝanhajo. La ekonomio de la nomitaj provincoj kaj urbo okupas gravan lokon en la nacia ekonomio de Ĉinio. Tra tiu "fenestro" oni povas vidi la staton de ĉina elektra industrio, ties problemojn kaj influojn al la ĉina prosperiĝo.

## LA RAPIDECO DE DISVOLVIĜO DE LA INDUSTRIO

Ni veturis de Pekino suden per trajno kaj faris esploradon unue en Shandong, poste en Ŝanhajo kaj Zhejiang. En la lokoj ni havis interparoladon kun gvidantoj de elektroindustria departementoj kaj pririgardis kelke da elektrejoj, transformatoraj stacioj kaj konstruejoj. Nin unue impresis profunde tio, ke tre rapide disvolviĝas la elektra industrio de tiuj provincoj kaj urbo.

Ŝanhajo estas la plej granda urbo de Ĉinio. Ankaŭ ĝia elektra industrio estis la plej frue nas-

kita en Ĉinio. En 1882 britoj establis tie la unuan elektrejon. Kiel la unua granda elektrejo en la Ekstrema Oriento en 1923, la fama elektrejo Yangshupu de Ŝanhajo havis tiam kapaciton de 121 000 kilovattoj. Kaj en majo de 1949, t. e., ĝis la liberiĝo de Ŝanhajo, la tuta urbo havis kapaciton de 259 600 kilovattoj. Nun la urbo havas kapaciton de 3 553 000 kilovattoj, nome 13-oble kreskis produktopovo kompare kun tiu en 1949.

La elektra industrio de la provincoj Shandong kaj Zhejiang disvolviĝis pli rapide ol tiu de Ŝanhajo post 1949. Ĝis 1949 Shandong havis nur dek tri elektrejojn super 500 kilovattoj, kaj la totala kapacito estis 109 000 kilovattoj kun jara produktopovo de 200 milionoj da kilovattohoroj. Nun en la provinco estas 119 elektrejoj kun totala kapacito de 3 893 000 kilovattoj kaj la jara produktopovo estis 20.347 miliardoj da kilovattohoroj en 1982. La elektra industrio de Zhejiang progresas pli rapide. En 1949 la produktopovo de la provinco estis nur 33 000 kilovattoj, dum en 1982 tiu kreskis ĝis 2 950 000 kilovattoj, t.e. meznombra kresko de 14.6% ĉiujare.

Samtempe kun disvolvo de la elektra industrio, rimarkinde progresis la konstruado de elektrotansmisiaj instalaĵoj de la

provincoj kaj la urbo. En Shandong oni starigis 7 041 kilometrojn da altensia transsenda lineo de 110 000 kaj 220 000 voltoj, en Zhejiang 3 800 kilometrojn kaj en Ŝanhajo 1 564 kilometrojn. Antaŭ 1949, en la ĉina kamparo oni neniam uzis elektron. Nun 95% de la komunumoj en Shandong kaj Zhejiang kaj la tuta kamparo ĉirkaŭ Ŝanhajo estas elektrizitaj.

Antaŭenpuŝo de la elektra industrio pretigis necesajn kondiĉojn por disvolvo de industrio kaj agrikulturo kaj plibonigis la materian kaj kulturalan vivon de la tuta popolo. Ekz., en komparo kun 1972, la elektroenergio konsumita en 1982 por industrio de Shandong pliiĝis je 129%, sekve la produktovaloro je 185%. Dum tiuj dek jaroj, la elektroenergio konsumita por agrikulturo pliiĝis 4.62-oble, la areo irigaciata per elektraj pumpiloj kreskis de 90 000 hektaroj ĝis 2 117 000. Malgraŭ sekeco en pluraj sinsekvaj jaroj la provinco gajnis bonajn rikoltojn de greno kaj kotono.

## KONSTRUI ELEKTREJOJN LAŬ LOKAJ KONDIĈOJ

Dum esplorado mi trovis ankaŭ, ke la elektra industrio de la provincoj kaj urbo havas sian propran trajton.

Shandong, al kiu mankas akvoenergio, havas abundan karbokonservejojn kaj estas proksime al la karboriĉa provinco Shanxi. Tial disvolvo de la elektra industrio de Shandong estas bazita ĉefe sur multigo de termoelektoj. En la sepdekaj jaroj la konstruado de termoelektra centralo estis multe rapidigita. En la dek jaroj oni konstruis ses grandajn kaj mezajn termoelektojn Laiwu, Xindian, Jining, Zhanhua, Huangdao kaj Shiliquan. La totala kapacito de la provinco kreskis je 2 720 000 kilovattoj, preskaŭ kvaroble pli granda kompare kun tiu en 1970.

Estas tute malsame por Zhejiang, al kiu mankas karbo. La pluvoza provinco abundas je montoj kaj riveroj, kiuj liveras potencon akvoenergie. Tamen ĉe la marbordo de Zhejiang estas multe da bonaj havenoj, kio faciligas karbo-transportadon. Tial la provinco prenis la principon "konstrui kaj hidroelektojn kaj termoelektojn, konstrui samtempe grandajn, mezajn kaj malgrandajn". En 1960 estis finkonstruita la hidroelekto Xin'anjiang kun kapacito de 662 500 kilovattoj, en 1977 la hidroelekto Fuchunjiang kun kapacito de 297 200 kilovattoj. Kaj antaŭ nelonge la hidroelekto Wuxijiang kun kapacito de 170 000 kilovattoj jam komencis liveri elektron. Ĝis 1982 la grandaj, mezaj kaj malgrandaj hidroelektoj de la provinco havas totalan kapaciton de 1 747 000 kilovattoj. En la pasintaj kvin jaroj estis finkonstruitaj ankaŭ du termoelektoj Zhenhai kaj Taizhou, tiel la totala kapacito pliiĝis je 665 200 kilovattoj.

Ŝanhajo, la plej granda industria urbo de Ĉinio postulas gran-

dan kvanton da elektro. Ĝi konstruis ĉefe grandajn termoelektojn. En la pasintaj 30 jaroj Ŝanhajo konstruis kaj rekonstruis la termoelektojn Yangshupu, Zhabei, Wujing, Minhang kaj Nanshi. Iuj grandaj entreprenoj, kiuj multe konsumas elektron, havas dependajn elektojn grandajn aŭ malgrandajn. Por liveri elektron al Ŝanhajo, la ŝtato konstruis kelke da grandaj elektoj en ĝiaj najbaraj regionoj. 70% de la elektra ekipaĵo de la urbo estas grandaj kaj altfikaj termoelektraj generatoroj.

### EKSPLUATADO DE DIVERSASPECAJ ENERGIOJ


Shandong kaj Zhejiang sukcesis en ekspluatado de diversspecaj energioj.

Ĝis 1982 Zhejiang konstruis pli ol 6 000 diversajn malgrandajn hidroelektojn kun totala kapacito de 550 000 kilovattoj. En Zhejiang ni rigardis la ŝtuparan hidroelekton Panxi en la gubernio Jinyun. Panxi estas

rivereto en monto fontanta el la montregiono Dayang. La lokanoj konstruis la akvokonservejon Dayang sur la monto, fosis tunelon longan pli ol 3 km. por konduki akvon. Profitante de niveldiferenco de 653 metroj kaj la fluintensoj, oni konstruis ŝtupare kvin malgrandajn hidroelektojn kun kapacito de 7 565 kilovattoj. En 1982 ili jam liveris elektron de 30 310 000 kilovattoj. La malgrandaj hidroelektoj ne nur plenumis la bezonon de la popola vivo, sed ankaŭ akcelis la industriojn kaj flankokupojn de la komunumoj kaj produktaj taĉmentoj de la montregiono.

Shandong kaj Zhejiang havas longan marbordon, kaj oni konstruis kelke da eksperimentaj tajdoelektoj ĉe havenoj. La eksperimenta tajdoelekto Jiangxia, kiun ni rigardis, troviĝas en la haveno Jiangxia de la golfo Yueqing en la gubernio Wenling de la sudorienta parto de Zhejiang-provinco. Ĝi produktas elektron en fluso kaj malfluso. Laŭplane oni devas instali tie ses elektrajn generatorojn 500-

*La hidroelekto Fuchunjiang*





*Hu Xihui, direktorino de la termoelek-  
trejo Zhabei, parolas kun juna laboristo.*

kilovattajn. La generatoro n-ro 1 ekfunkciis maje de 1980 kaj ĝis 1982 ĝi liveris 10 400 000 kilovattohorojn da elektroenergio. Dank' al la eksperimenta elektrejo oni multe sukcesis en esplorado pri tajda energio, en provfarado de du-direkta elektra generatoro, en mara inĝenierado kaj sinteza utiligo de riĉfontoj de marborda etendaĵo. Ekz., estis farita elektra generatoro, kiu donas elektron dum fluso kaj malfluso, estis fundamente solvitaj la problemoj de rustiĝo de la eksperimenta tajdoelektrejo kaj de polucio al maraj estaĵoj, kaj estis akirita riĉrikolto de salikokoj, pektenoj kaj laminario produktataj interne de baraĵo. La Elektroindustria Buroo de Zhejiang-provinco planis konstrui en la golfo Yueqing plurajn eksperimentajn tajdoelektrejojn kun kompare granda kapacito.

La marbordaj insuloj de Zhejiang estas la plej riĉaj lokoj je venta energio de Ĉinio. La elek-

troindustriaj departementoj de Zhejiang donas grandan atenton al plejbla utiligo de venta energio. Jam ekfunkciis ventoelektraj generatoroj kun kapacito respektive de 1 kilovatto, 18 kilovattoj kaj 40 kilovattoj. Oni raportis, ke tia generatoro kun kapacito de 40 kilovattoj, instalita en Shengsi de la insularo Zhoushan en 1980, post multfoja plibonigo kaj provado, ek liveris elektron marte de la kuranta jaro. Bedaŭrinde, ni ne transveturis la maron por rigardi ĝin pro malbona vetero. Ni vizitis la ventoelektrejon Lishan en Zhenhai. En la pasintaj du jaroj la elektra generatoro kun kapacito de unu kilovatto funkciis 11 000 horojn, elprovite de ventego. Nun oni pogrande produktas tiaspecajn generatorojn.

#### **MEMSTARA KAPABLO EN KRESKADO**


Tiu kapablo rimarkinde altiĝis en disvolvo de la elektra industrio de la provincoj kaj urbo.

Ciuj generatoroj kun kapacito de 125 000, 200 000 aŭ 300 000 kilovattoj estis fabrikitaj de Ĉinio mem. La elektrejo Wangting proksime de Ŝanhajo estas granda termoelektrejo kun kapacito de 800 000 kilovattoj. Tie estas du generatoroj kun kapacito de 300 000 kilovattoj fabrikitaj en Ŝanhajo. De 1979 ĝis 1982 la efikeco de la du generatoroj ĉiam estis 85-90%. Unu el ili funkciis 7 788 horojn jare, tiu cifero multege superis la normon difinitan de la Ministerio pri Akvomastumado kaj Hidroelektro.

Ambaŭ provincoj kaj la urbo povas plenumi la prospektadon, projektadon, muntadon, provadon kaj funkciigadon de grandaj termo- kaj hidroelektrejoj kaj transsendaj instalaĵoj por kurento de 220 000 voltoj. En la konstruejo de la termoelektrejo Huangtai de Shandong ni vizitis la unuan inĝenieradan sekcion, kiu havas 3 487 membrojn. Ekde 1971 la sekcio jam konstruis kvar termoelektrejojn kun kapacito super 250 000 kilovattoj kaj ilia totala kapacito estis 1 525 000 kilovattoj. La sekcio ĉiujare superplenumis sian taskon, malaltigante la koston kaj garantiante altan kvaliton. Ekde 1977 la sekcio estis sepfoje premiita de provincaj kaj superprovincaj instancoj, kaj en 1979 ĝi estis honorita de la Ŝtata Konsilantaro per titolo de tutlanda antaŭiranta entrepreno. Nun ĝi konstruas kaj plivastigas tri grandajn elektrejojn, inter kiuj estas la elektrejo Lunan, kiu havas kapaciton de 2 400 000 kilovattoj kaj estas unu el la ĉefaj ŝtataj konstruaĵoj.

Por rapidigi la modernigan konstruadon, la elektroindustriaj branĉoj importis avangardajn







# **Elektra Industrio en Shandong, Zhejiang kaj Ŝanhajo**

Fotoj de Xu Shenggong


La tajda elektrejo Baishakou en Shandong-provinco estas ekipita per ses generatoroj ĉiu kun kapacito de 160 kilovattoj, el kiuj kvar komencis produktadon.




La moderna termoelektrejo Wangting estas ekipita per du generatoroj kun kapacito de 300 000 kilovattoj. La produktivo de la elektrejo superas la ŝtatan normon ekde 1979.




Eksperimenta vento elektrejo sur la monto  
Lishan en Zhenhai, Zhej'ang-provinco



Muntado de generatoro en la elektrejo Huangtai




La plikonstruata elektrejo Huangtai en Shandong-provinco havas pliajn generatorojn kun kapacito de 500 000 kilovattoj. Jen parto de la konstruejo.




La elektrejo Xindian kun kapacito de 600 000 kilovattoj en Shandong-provinco estas alte aŭtomatigita termoelektrejo. La foto montras la regadejon de la generatoro n-ro 4.

La barajo de hidroelektrejo ĉe Wuxi-rivero en Zhejiang-provinco. La barajo, alta je 129 metroj kaj longa je 440 metroj, povas enteni 1.134 miliardojn da kubmetroj da akvo. La unuaparto de la elektrejo sur la unua ŝtupo havas kapaciton de 170 000 kilovattoj kaj la dua de 30 000.





La elektrejo de la ŝtala uzino Baoshan en Ŝanhajo havas kapaciton de 700 000 kilovattoj. La tutan kompletan da ekipaĵoj oni aĉetis de Japanio.



La triŝtupa hidroelektraro Panxi en Jinyun, Zhejiang-provinco

teknikojn kaj instalaĵojn de eks-terlande. Kia mi estis en Ŝanhajo, ni rigardis la elektrejon de la Fera-Ŝtala Uzino Baoshan, kun kapacito de 700 000 kilovattoj. La elektrejo ekipita per avangarda tekniko de la sepdekaj jaroj havas du generatorojn kun kapacito de 350 000 kilovattoj aĉetitajn de Japanio. Estis informite, ke la instalaĵoj bezonis teknikan reformon. Ekz., dum iliaj muntado kaj provfunkciado ĉinaj teknikistoj prezentis pli ol 80 gravajn raciajn proponojn por reformo. Dank' al reformo de la bruligilo oni povas ŝpari ĉiujare 438 tunojn da oleo. Por akceli teknikan interŝanĝon koncernaj departementoj de Ĉinio kaj Japanio interkonsentis pri establo de komitato por plibonigado de instalaĵoj.

## PROBLEMOJ KAJ PERSPEKTIVO

Kvankam la elektra industrio de la provincoj kaj la urbo akiris grandajn sukcesojn, tamen ĝi alfrontas nemalmultajn problemojn.

Unue, la ekzistantaj elektrejoj ne povas plenumi la bezonon de rapida disvolviĝo de industrioj kaj agrikulturo kaj rapida kresko de elektrokonsumo en popola vivo. Laŭ statistiko de 350 elektrokonsumentaj entreprenoj de Shandong, en 1983 mankas al ili tri miliardoj da kilovattohoroj da elektro, kvankam la produktivo de elektro trioble pliiĝis dum la pasintaj 11 jaroj. Pro manko de elektro tiuj elektrokonsumentaj entreprenoj ne povas plene utiligi siajn ekipaĵojn.

Due, en nemalmultaj entreprenoj, la elcento de fakuloj es-

tas tre malgranda kontrastante la totalan nombron de la laborantaro. Kun evoluo de sciencoj kaj tekniko kaj apero de pli kaj pli multaj generatoroj kun kapacito de kaj super 300 000 kilovattoj kaj supertensiaj lineoj de 500 000 voltoj, la teknika kaj administra nivelo de la nuna laborantaro jam ne povas adaptiĝi la bezono. Tial fariĝas tre urĝa la kulturado de taŭgaj fakuloj.

Trie, ĉie troviĝas konsiderinda kvanto da malnovaj elektraj generatoroj, kiuj multe konsumas sed ne multe donas elektron. Tiukaze oni devas renovigi ilin. Pro granda bezono je elektro kaj granda ŝarĝo de la lineoj, la malaltensiaj lineoj jam estas ne tre taŭgaj, tial estas necese starigi pli da supertensiaj lineoj de 220 000 kaj 500 000 voltoj. Kaj cetere, nombro da malnovaj elektrejoj bezonas novajn ekipaĵojn por eviti polucion al la atmosfero kaj akvo.

Vizaĝe al la supre menciitaj problemoj la provincoj kaj la urbo prenas multajn rimedojn por solvi ilin. Ni vidis en Shandong, ke nombro da grandaj kaj mezaj termoelektrejoj estas konstruataj aŭ plivestigataj. En Zhejiang estas konstruotaj ses grandaj kaj mezaj hidroelektrejoj. Samtempe kun tio, utiligante bonajn kondiĉojn de havenoj oni konstruos aŭ plivastigos kelke da termoelektrejoj. Laŭ plano de la provincoj kaj la urbo oni konstruos ankaŭ nuklean elektrejon. Kaj krome, oni planas plene profiti de tajdo, vento kaj tervarmo. Estas antaŭkalkuleble, ke ĉe la jaro 2 000 la elektroproduktado de la provincoj kaj la urbo plurobliĝos, konforme al la kvarobliĝo de la totala produktovalorado de la industrioj kaj agrikulturo.




## STARIGIS PARALIZULOJ

La esplora grupo pri paraplegio de la Dua Medicina Instituto de Ŝanhajo sukcese faris elektrostimulilon kaj rulseĝon por restarigi funkciojn de paralizuloj. Helpate de tiuj aparatoj kvin malsanuloj, kiuj suferas gravan paraplegion kaŭzitan de ekstera vundo, povas starigi kaj fari paŝetojn. Lastatempe tiuj kvin malsanuloj ĝoje forlasis la hospitalon, kunportante po unu tian aparaton.



- \* 16-j. Radufy Ella, (Joc. Lazarea — Ghiduci No. 1423, Str. Ghiduci, Fud. Harghita, Cod. 4215, Rumanio) kaj 16-j. Olah Jloliko, (Str. Nagypatak No. 114, Joc. Lazarea, Harghita, 4215, Rumanio, deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj.
- \* 14-j. knabo Przemyslaw Ogrodowski, ul. Bolesława Smiętego, PL 63-500 Ostrzeszów, Pollando, bele kantas, bone dancas kaj korespond-deziras pri biologio, turismo kaj lingvo-lernado.
- \* 14-j. lernanto Michael Ziegler, Hegnstofthen 18, DK-2630 Taastrup, Danlando, dez. praktiki Esperanton per korespondado kun samaĝa ĉino, kaj ion lerni pri Ĉinio.



# ENKETO PRI AMO KAJ GEEDZIĜO DE JUNAJ LABORISTOJ

*Kiel ĉinaj gejunuloj pensas pri siaj amo kaj geedziĝo? Kiel ili elektas al si amat(in)on? Kaj kiel ili traktas la geedzajn rilatojn? La aŭtoroj, studentoj de iu altlernejo de Pekino, faris enketon, kiu eble interesas niajn legantojn.*

— La Red.

Antaŭ nelonge ni venis al la Ĉefurba Fera kaj Ŝtala Kompanio, la Pekina Kvina Konstrua Kompanio, la Pekina Kvina Administracio de Aŭta Transportado, la televidil-fabrika Dongfeng, la Pekina Unua Kotonteksejo kaj la Pekina Dua Kotonteksejo, kaj faris tie enketon pri amo kaj geedziĝo de 504 junaj laboristoj, inter kiuj estas 250 viroj kaj 254 virinoj (221 jam geedziĝis kaj 283 estas fraŭloj kaj fraŭlinoj).

1. Ĉu gejunuloj geedziĝas laŭ sia propra volo? Kiamaniere ili enamiĝas?

El 283 gefraŭloj 138 havas amat(in)on. El ili 135 diris, ke ili mem rajtas decidi sian geedziĝon. Ili ĉiuj opiniis, ke mem elekti al si amat(in)on estas la plej bona vojo al feliĉa geedziĝo. Sed nuntempe mankas al gejunuloj ŝancoj por kontaktiĝi kaj interkonatiĝi, tial multaj gejunuloj, kiuj jam atingis aĝon por geedziĝo, devas tamen sin turni al sia amiko aŭ parenco por peti lian svatadon. El la supre menciitaj 135 gejunuloj, 75 tiel faris.

2. Kiajn kondiĉojn oni postulas por elekti al si amat(in)on?

Ĉirkaŭ 65% el la 504 junaj ge-laboristoj prenas internajn faktorojn kiel ĉefajn kondiĉojn, kiuj estas: (1) bona kvalito; (2) bona temperamento; (3) zorgemo; (4) samaj interesoj; (5) progresemo; kaj (6) alta klereco. Kompreneble ili ankaŭ donas grandan atenton al la aspekto kaj konduto de sia amat(in)o. Sed troviĝas iuj gejunuloj, kiuj prenas eksterajn kondiĉojn de ekonomia situacio, politika pozicio kaj bonkvalitaj mebloj por geedziĝo kiel ĉefajn kondiĉojn. Ĝenerale tiaj gejunuloj vivas en malbonhavaj familioj, havas malaltan edukitecon kaj simplajn travivaĵojn kaj estas iom pli junaj.

3. Kiel oni festas sian geedziĝon?

El la demanditaj gejunuloj 85% opiniis, ke oni devas simpligi sian geedziĝan ceremonion —

ne aranĝi luksan festenon. Sed la ceteraj 15% opiniis, ke oni devas okazigi luksan ceremonion por ĝojigi sin kaj siajn gepatrojn, ĉar la geedziĝo estas grava por la homa vivo. Nun en la urbo tiel faras nur malmultaj gejunuloj.

4. Kiajn objektojn oni aĉetas por sia geedziĝo?

Kun disvolviĝo de la nacia ekonomio, altiĝis la nivelo de la popola vivo. Por sia geedziĝo la gejunuloj, kiujn ni demandis, aĉetis novajn meblojn, televidilojn, lavmaŝinojn kaj aliajn mas-trumajn aparatojn. Ili ĉiuj volas fari sian loĝejon kiel eble plej komforta kaj bela laŭ sia ekonomia kondiĉo.

## II. PRI RILATOJ INTER GEEDZOJ

Ni interparolis kun 221 geedziĝintaj laboristoj kaj informiĝis pri la jeno:

1. 35.2% de la familioj tenas bonajn geedzajn rilatojn kaj vivas harmonie; 62.9% vivas mezharmonie kaj 1.9% ne harmonie — la geedzoj konfliktas pro hejma ekonomio, malsamaj interesoj kaj interveno de aliaj.

2. 62.8% de la familioj plenumas hejmajn aferojn laŭ la komuna volo de la geedzoj; 28% laŭ tiu de la edzino; kaj 9% laŭ tiu de la edzo. La hejma financo de 66.6% de la familioj estas kune tenata de la geedzoj; tiu de 9.3% — de la edzo; kaj tiu de 24.1% — de la edzino.

3. La hejmlaboroj de 68% de la familioj estas kune farataj de la geedzoj kaj aliaj familianoj; tiuj de 28% — de la edzino; kaj tiuj de 4% — de la edzo.

En la urbo, la virinoj ĝenerale havas profesion kaj estas salajrataj, tial ili kiel la viroj havas egalan rajton mastrumi hejman ekonomion.

Por detale koni opiniojn de junaj laboristoj pri traktado de la rilatoj inter geedzoj, ni okazigis en la televidil-fabriko Dongfeng kunsidon kun la temo "Kiaj estas idealaj geedzaj rilatoj". La plejparto de la kunsidantoj opiniis, ke por vivi ĉiam en harmonio dum longa tempo, la geedzoj devas ne nur havi noblan amon, samajn interesojn kaj idealon, sed ankaŭ respekti, prizorgi kaj helpi unu la alian. Iu laboristo diris: "Gejunuloj enamiĝis, geedziĝis kaj fondis familion, el kio sekvis devo. Ilia amo kaj ilia devo influas unu la alian."

### III. PRI GEEDZA MORALO

1. Opinioj pri la eksteredzeca seksa vivo:

El la 504 gelaboristoj 66% opinis kontraŭ eksteredzeca seksa vivo. Ili opiniis, ke la seksa vivo devas esti limigita nur je la geedzoj kaj la eksteredzeca seksa vivo estas malvirta. 9.3% kontraŭdiris. 24.7% silentis.

2. Opinioj pri amo ekster la geamantoj aŭ geedzoj:

Ni starigis du demandojn. Unu estas: Kiam paro da gejunuloj jam enamiĝis sed ne geedziĝis, ĉu iu tria povas ami unu el ili? 69% de la laboristoj donis nean respondon. 19.4% jesan kaj 11.6% necertan.

La alia estas: Ĉu unu el la geedzoj povas ami alian vir(in)-on? 87.9% de la laboristoj kapneis, 3.7% kapjesis kaj 8.4% ne esprimis sian opinion.



**Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* 26-jara Kubica Stanislaŭo, 32-650 Kety, Os. 700-Lecia 18/21, Pollando, deziras korespondi tm., precipe kun ĉinoj pri budhismo, Tai-ji-quan kaj ĉiutaga vivo.

\* Mi dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kaj interŝ. cigared-skatoletojn. Sino Nadezda Nudlova, Reznicka' 20, 11000 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

\* Mezaĝa pola instruistino deziras korespondi kun s-anoj pri turismo, historio kaj geografio. Danuta Kwiatek, 41-800 Zabrze, Skr. Pocz. 60, Pollando.

3. Opinioj pri eksedziĝo:

Kiel oni opinias, ke unu el la geedzoj ekvizitis altlernejon aŭ transloĝiĝis al urbo aŭ promociiĝis kaj tial ne plu amas la alian kaj petas eksedziĝi? 83.5% de la laboristoj rigardas tion malmorala, 5.7% esprimis aprobon kaj 10.8% hezitis doni sian opinion.

Pri la demando ĉu la geedzoj devas eksedziĝi aŭ ne, kiam ilia

\* 60-jara emerita instruisto kaj novebakita esperantisto deziras korespondi tutmonde: Jean Bertrand, 83, Rue Henri Dillies, 59790 Ronchin, Francio.

\* Itabuna Esperanto-Asocio serĉas gejunajn korespondantojn por siaj gejunulaj esperanto-lernantoj (ekde 18-j. ĝis 30-j.). Estas bonvenaj leteroj tutmonde pri ĉiuj temoj. Bonvolu skribi al Itabuna Esperanto-Asocio -Baza Kurso- Rua Ruy Barbosa, 23-Caixa Postal 87-BR-45600, Itabuna-Bahia-Brazilo.

\* 45-j. agronomia inĝeniero/agrikultura ekonomikisto, Hilmar Ilton Santana Ferreira, Rua Alexandre Fleming, 210, Goes Calmon, BR-45600 Itabuna Bahia Brazilo, deziras korespondi kun tuta mondo, pri ĉiuj temoj.

\* Robert W. Allen (35-jara instruisto), P.O. Box 98, Northfield Falls, Vermont, 05664, U.S.A., dez. kor. kun tm. samideanoj, pri muziko, astronomio, literaturo, kaj interŝ. bk.

\* 20-j. fraŭlino Ewa Kulesza, 78-560 Kalisz Pom, ul. Dworcewa 13/6, woj. Koszalin, Pollando, ŝatas bonan muzikon, sondiskon kaj pm., kaj deziras sciigi pri vivmaniero de aliaj landanoj.

amo perdiĝis, 56% de la laboristoj opiniis, ke ili devas rompi la geedzecon; 29.5% diris, ke ili devas daŭre teni la rilatojn inter si; kaj 14.5% ne esprimis sian opinion.

La plejparto de la laboristoj povas serioze trakti sian geedzecon. Ili oponis kontraŭ facilanima rompo de la geedzeco, opinante, ke oni devas konsideri la interesojn de siaj gefiloj.

# GAJAJ GRUPAJ AKTIVADOJ DE JUNPIONIROJ

*“De kokosland’ Hainan-  
insulo,  
de jurtoj en la step-naturo,  
alvenas miloj da kolegoj gajaj*

*Pekinon por tendumaj agoj.*

*Ni kantu kaj dancadu!*

*Kaj semu amikecon en la be-  
laj tagoj.”*

Tio estas la kanto de la tutlanda somera kampado de “Gajaj Grupaj Aktivadoj de Junpioniroj”, kanto el la koro de la infanoj.

En januaro ĉi-jare la redakcio de la gazeto «Ĉinaj Geknaboj» iniciatis al la junpioniroj de la tuta lando grupan konkurson lerni sciojn, lerni laboron kaj akiri talenton por servi al la popolo. La konkurso estis titolita “Gajaj Grupaj Aktivadoj de Junpioniroj”. La iniciaton varme aprobis la junpioniroj tra la lando. En ferioj la junpioniroj faris bonojn, malgrandajn inventaĵojn, ekspediciojn, kolektadis drogherbojn kaj ekskursis al pitoreskaj vidindejoj kaj historiaj lokoj, kaj poste raportis siajn aktivadojn al la redakcio de «Ĉinaj Geknaboj». Laŭ la grandnombraj leteroj la redakcio elektis mil elstarajn junpionirajn grupojn, el kiuj 40 ricevis premion de “Plej Bona Grupo”. 166 reprezentantoj de tiuj grupoj kaj iliaj direktantoj de diversaj naciecoj partoprenis en la somera

kampado de “Gajaj Grupaj Aktivadoj de Junpioniroj” en Pekino en la unua tagdeko de aŭgusto.

Ankaŭ mi ĝoje partoprenis en la somera kampado. Dum la ok tagoj de la kampado la geknaboj estis multe prizorgataj de diversaj flankoj. La respektata ŝtata gvidanto Chen Yun bruligis la torĉon de la kampado. Fama verkisto pri popularaj sciencoj Gao Shiqi faris surskribon por ili, esperante ke ili klopodos sur la vojo al la kulmino de sciencoj. La onkloj kaj onkloinoj de la redakcio gastigis ilin en sia oficejo kaj invitis ilin viziti ilian presejon. La organizantoj de la kampado aranĝis por la geknaboj veturadon per militŝipo, tendumadon, piknikon kaj amuzan vesperon. La diversaj enhavoriĉaj aktivadoj larĝigis la vidkampon de la geknaboj kaj plimultigis ilian scion.

Estis tre interesa la kunloĝado. Mi dancis kaj kantis kune

kun ili, kvazaŭ mi rejuniĝus. Dum libertempo ili rakontis al mi siajn interesajn aktivadojn.

## SEKRETA GRUPO

“Se vi demandus, kial nia grupo estas tiel gaja, la respondo estas, ke ni ĉiam sekrete agis”, diris al mi junpioniro de la urbo Chengdu en Sichuan-provinco. Lia grupo havis dek du membrojn. En la konkurso de “Gajaj Grupaj Aktivadoj” ili donis bonfarojn al la popolo, kaŝante sian nomon. Sekve ili nomis sian grupon grupo “543”.

La aktivadoj de tiu grupo estis tre variaj. Ili sendis per poŝto monon kaj konsolan leteron al la onkloj kaj onkloinoj de «Ĉinaj Geknaboj», por ke ili transdonu la monon kaj leteron al orfoj. En hospitalo ili helpis gravajn malsanulojn en ilia vojirado kaj eskortis ilin hejmen. Ili purigis domojn de maljunaj soluloj kaj aĉetis por ili manĝaĵojn. Ankaŭ en siaj lernejo kaj klaso ili sekrete faris bonojn. Se oni demandis pri iliaj nomoj kaj lernejo, ili ĉiam respondis per la sama vorto: “Ni estas junpioniroj de grupo ‘543’” kaj tuj forkuris fulmrapide.

La farojn de tiu grupo oni trifoje informis en la vespera ĵurnalo de Chengdu, sed neniu sciis, kiuj ili estas. Ili ĝojis pro ĉiu sia bonfaro.

*Pikniko*






## APERIS LA PERIODAĴO «RUĜA KRAVATO»

La junpioniroj de la kvara grupo de la 5-a brigado de la Langyalu-a Elementa Lernejo en Nankino decidis eldoni dum la konkurso de "Gajaj Grupaj Aktivadoj" periodaĵon sub la titolo de Ruĝa Kravato. Sed tuj post la komenco ili jam trovis, ke eĉ eldoni plej simplan kaj malgrandan mimeografan gazeton estas nefacile.

Antaŭ ĉio oni devas scipovi skribi sur stencilo ideografi-ajojn nete kaj klare, kaj ankaŭ ornamu gazetkapon kaj fari ilustraĵojn. La junpioniroj renkontis nemalmultajn malfacilojn. Sed ili, plenaj de fido, sin turnis al siaj najbaroj kaj parencoj por konsulti. Ili vizitis la redakcion de «Nankina Ĵurnalo» kaj akiris multajn sciojn pri eldonado. La onkloj kaj onklinoj de la redakcio humure diris: "Ili estos daŭrigantoj de nia afero."

Dank' al ilia kuna penado aperis la unua periodaĵo spegulanta ilian vivon kaj lernadon. Vidinte sian frukton de laboro, la geknaboj ekhuras dancante.

Por pliriĉigi la enhavon de la periodaĵo, ili organizis ankaŭ aliajn aktivadojn: viziti la Astronomian Observatorion de Zijinshan kaj ekskursi al Meihua-monto. Ili kolektis multajn specimenojn de ercoj kaj vizitis famajn modelajn laboristojn en



*Tendumado en antaŭurbo*

Jiangsu-provinco, de kiuj ili akiris sciojn pri produktado. Ili raportis diversforme siajn agadojn en «Ruĝa Kravato».

Dank' al la kuna penado de la grupanoj «Ruĝa Kravato» fariĝis pli kaj pli alloga legaĵo por iliaj samklasanoj. Tuj kiam aperis nova numero, la samklasanoj kolektiĝis por legi ĝin. Tio tre ĝojigis la grupanojn.

### DISTRO SUR STRANDO

Iu junpionira grupo vivanta ĉe marbordo de Beidaihe rakontis al mi sian interesan aktivadon: "Ni loĝas ĉe bela maro. En la lasta aprilo ni venis al Jinshanzui-strando post malfluso kaj kolektis ruĝan pelveton (*Pelvetia siliquosa*), brunan lamina-

rion kaj alispecajn mar-algojn, ni kolektis ankaŭ diversajn konkojn sur rifoj. Kiam ni levis ŝtonon en grandeco de homa kapo, ni povis trovi 2-3 aŭ 5-6 malgrandajn krabojn fuĝantajn disen, tamen ili fine fariĝis niaj kaptitoj. Granda krabo homone timas. Ĝi arogante levis ambaŭ pinĉilojn defie kontraŭ ni. Ĝia braveco hezitis nin je momento kaj, profitante la ŝancon, ĝi tuj forkuris." En tia aktivado ili rikoltis ankaŭ kelkajn nekonatajn specojn de marraj estaĵoj kaj faris el ili specimenojn.

La aktivado donis al la geknaboj nemezureblan ĝojon.

### MALGRANDAJ INVENTISTOJ

La dek membroj de junpionira grupo de la 3-a klaso de la Hectian-a Elementa Lernejo en Ŝanhajo estis laŭdataj kiel "malgrandaj inventistoj". Dum ferioj ili serioze legis sciencajn librojn, serĉadis referencajn materialojn kaj sub la gvido de sia instruisto vizitis ekspozicion de



*Tong Naiyi (dekstre), inventinto de elektronika alarmilo por ĝustigi la sidpozicion dum legado kaj skribado*

scienc-teknikaj kreaĵoj kaj fabri-  
kon de elektraj lampoj. Kaj poste  
ili mem projektis kaj faris  
scienc-teknikajn kreaĵojn.

Fininte la laboron, la grupo  
okazigis demonstradon kaj pre-  
miadan ceremonion. Iu knabino  
rakontis, kiel ŝi faris ian leve-  
blan korbon. Ŝi diris: "Mi trovis,  
ke infanoj, ludantaj korbopil-  
kon, tute perdis intereson, kiam  
ili plurfoje maltrafis la korbon.  
Ĉu oni ne povus pligrandigi la  
korbon por faciligi la ludon?  
Post plurfoja eksperimentado mi  
fine anstataŭigis la ringon per  
ladsitelo, larĝa ĉe la supro kaj  
mallarĝa ĉe la malsupro, kaj ĉe  
la fundo mi aldonis kvar tubojn,  
tra kiuj pilko enĵetita en la site-  
lon povas trairi. En ludo unu  
knabo provas ĵeti pilkon en la  
sitelon kaj du aliaj staras por  
kapti ĝin. Sed ĉi tiuj ne povas  
facile antaŭvidi, el kiu truo el-  
falos la pilko, tial ili devas streĉi  
sian atenton kaj fari tujan reak-  
cion." La knabino faris al la  
ĉeestantoj demonstradon.

Ankaŭ aliaj membroj de la  
grupo rakontis sian inventadon.  
Iu parolis pri la avantaĝoj de  
pluruza liniilo, dua prezentis al  
la ĉeestantoj faldeblan kaj mo-  
veblan bretaron por florva-  
zoj . . .

La grupo kreis sume dek ok  
inventajojn. Ĉiuj tiuj ricevis  
premion de "Bona Elpensajo" de  
la lernejo. El la inventaĵoj la le-  
veblan korbon kaj celobjekton  
por ĵetludo oni fabrikas kaj ven-  
das en la urbo. Ankaŭ aliajn dek  
kvar inventaĵojn la instruistoj  
de la grupanoj, iliaj samlerneja-  
noj kaj gepatroj aplikis en sia  
ĉiutaga vivo, lernado kaj laboro.

Finiĝis la somera kampado,  
sed la aktivadoj daŭros ĉe la  
junpioniroj en la vilaĝoj kaj ur-  
boj de la lando.



## PEKINO ESTAS LAŬPLANE REFORMATA KAJ KONSTRUATA

Komence de aŭgusto, publikiĝis  
la ĝenerala plano por konstruado  
de la urbo Pekino. Nun la plano  
estas efektivigata.

La plano vortigis plenampleksan  
projekton pri la urbaj karaktero,  
skalo, medio, aranĝo de ĝiaj kons-  
truajoj, konstruado de satelitaj ur-  
boj, pri reformado de la malnova  
urbo, kaj pri loĝejoj, komercaj  
establaĵoj, vojoj en kaj ekster la  
urbo, akvofonto, energio, verdigo de  
la urbo kaj aliaj.

La ĉefurbo Pekino estas la poli-  
tika kaj kultura centro de la lando.  
Disvolvado de ĉiuj aferoj de la urbo  
devas konformiĝi al ĝia karaktero.  
Oni prenos rimedojn por severe  
limigi la nombron de la loĝantoj kaj  
la skalon de ĝia industrio (ĝia dis-  
volviĝo dependas ĉefe de la teknika  
progreso). Komercaj kaj servaj  
aferoj plidisvolviĝos dum mallonga  
tempo en la estonteco. Oni devas,  
pere de la reformado, kaj modernigi  
la bazajn establaĵojn de la malnova  
urbo, kaj heredi kaj disvolvi la tra-  
diciojn de la fama historia kaj kul-  
tura urbo.

Nun jam fondiĝis kaj komencis  
sian laboron la Komisiono por Pro-  
jekto kaj Konstruo de Pekino, kiu  
konsistas el membroj de la Popola  
Registaro de Pekino, la Ministerio  
por Urba kaj Kampara Konstruado  
kaj Medioprotektado kaj aliaj insti-  
tucioj.

## LA CENTRALIZITA AŬTOMATA REGADEJO DE DUJIANGYAN

Dujiangyan situanta en Sichuan-  
provinco de Ĉinio estas irigacia

sistemo konstruita en antikveco.  
Dum multaj jaroj ĝi ludas gravan  
rolon en la tiea agrikultura produk-  
tado. Nun ĝi efike irigacias pli ol  
530 000 hektarojn da kampoj.  
Lastatempe finkonstruiĝis kaj ek-  
funkciis la centralizita aŭtomata  
regadejo en la antaŭa parto de la  
sistemo.

38 trunkaj kanaloj de Dujiangyan  
estas sub regado de la centralizita  
regadejo. La akvokvanto kaj flua  
rapideco de la trunkaj kanaloj pre-  
cize montriĝas sur la aparato de  
tiu moderna centralizita regadejo.  
Ĉe superakvo, se la akvokvanto en  
la kanaloj superos la normon, la  
instrumentoj do mem alarmos kaj  
donos ordonon al ŝaltbutono funk-  
ciigi la kluzpordon por ke la super-  
flua akvo forfluu el la ellasa  
kanalo, tiel ke la katastrofo estos  
evitita. Laŭ la akvokvanto bezo-  
nata de ĉiuj irigaciejoj, la regadejo  
ankaŭ povas aŭtomate konduki  
akvon por ĝin racie utiligi.

## LA ĈINA VIRINA KORBOPILKA TEAMO GAJNIS LA TRIAN LOKON EN LA MONDO

La 6-an de aŭgusto, fermiĝis la  
Naŭa Monda Virina Korbopilka  
Ĉampioneca Konkurso en San-  
Paŭlo, Brazilo. En la finalo la  
sovetunia teamo venkis la usonan  
kaj gajnis la ĉampionecon. La  
usona teamo gajnis la duan lokon.  
La ĉina teamo, kiu unufoje par-  
toprenis en tia konkurso, per 71:63  
venkis la sud-korean teamon, la  
subĉampionon de la lasta monda  
ĉampioneca konkurso, kaj gajnis la  
trian lokon. Tio markis, ke la Ĉina  
Virina Korbopilka Teamo jam en-  
viciĝis inter la avangardaj teamoj  
de la mondo. Tio estas la dua  
venko, kiun Ĉinio atingis en la in-  
ternaciaj konkursoj de korbopilko,  
flugpilko kaj piedpilko, post kiam  
la Ĉina Virina Flugpilka Teamo  
gajnis la mondan ĉampionecon.

# Bela sed krutega monto Huashan

de YANG DESHENG

**H**UASHAN, alinome Okcidenta Monto en la antikveco, estas unu el la kvin famaj montoj de Ĉinio\*. Ĝi situas en la orienta parto de Shaanxi-provinco, nur 120 km. for de la antikva ĉefurbo Xi'an. Norde de ĝi preterfluas la Flava Rivero kaj sude kun ĝi kuntuŝiĝas Qinling-montaro.

Tie krutas ĉarmaj montpintoj ĉielskrapaj. La tuta monto aspektas kiel sola granda roko kaj ĝiaj kvar flankoj estas kvazaŭ hakitaj per glavo. En komparo kun la aliaj grandaj montoj ĝi estas la plej krutega. Ĝiaj kvin pintoj konturiĝas kiel floro rigardate de malproksime. Starante sur ĝia ĉefpinto Luoyan 2 200 metrojn alta super la marnivelo, oni ricevus impreson, ke ĝi estas kronita de la ĉielo, senkompare alta sur la tero. Ankaŭ la aliaj kvar havas sian apartan belecon.


Ĉ. 20 km. serpentas la vojo inter la montpiedo kaj la montsupro. Ambaŭflanke de la danĝera montvojo artisme situas temploj, pavilonoj kaj turoj. Troviĝas 72 grandaj kaj pli ol 100 malgrandaj vidindaĵoj. Preskaŭ ĉie videblas steleoj kun gravuritaj surskriboj de famuloj kaj literaturistoj de diversaj dinastioj.

Ekskurso al la monto en ĉiujn sezono estas plezura. Prin-tempe sur la monto buntas floroj kaj okazas granda tradicia foiro; somere en kvietaj valoj flustras fontakvo, ombras arboj, la vetero kapricas jen per pluvo jen per sereniĝo, kaj de tempo al tempo nubaro aperas ĉe monttalo — la loko taŭgas por somerumado; aŭtune la vetero estas agrabla, la monto vestiĝas per sikomorfolioj; kaj vintre la monto tegita de neĝo aspektas aparte ĉarma.

En la lastaj jaroj la popola registaro de la provinco plurfoje

asignis monon al riparado de surmontaj konstruaĵoj, kaj tiel noviĝis dekelke da vidindaĵoj. La korto Yuquan ĉe la montpiedo, abunda je grandiozaj antikvaj konstruaĵoj, estas tre ŝatata de turistoj. Oni denove farbis kaj kalkis la templojn, pavilonojn, turojn kaj galeriojn. La korto Chunyangguan kun ŝtonaj kaverndomoj oriente de Yuquan estas granda, kvietaj kaj kaŝita en ombraĵo. Nun ĝi servas kiel pasloĝejo.

Ĉiuj montvojetoj estas elhakitaj sur krutaĵoj. Tial oni diras, ke de antikveco ekzistas nur unu



*Vojeto sur krutaĵo*

vojo kondukanta al la kulmino de Huashan. Antaŭe multaj vizitantoj, kiuj volis grimpi ĝis la kulmino, deprimiĝis de ĝia zigzageco kaj kruteco. Por atingi la supron oni devas trapasi unue danĝerajn lokojn Qianchichuang (Mil-futa ravino), Baichixia (Centfuta valo) kaj Laojunligou (Sulko plugita de Taishanglaojun). Antaŭe Qianchichuang estis nur tiom larĝa, kiom la ŝultroj de homo. Tie oni supreniris nur laŭ ŝtonaj kavoj. Oni vidis strion da ĉielo super la kapo kaj tremis de timo, ekvidinte kvazaŭ abismon sub la piedoj. Por faciligi la montogrimpadon, la popola registaro plurfoje riparigis la vojon. Lastatempe oni larĝigis Qianchichuang al pli ol unu metro kaj faris "eskalon" kun pli ol 370 ŝtonaj ŝtupoj. Oni balustris la "eskalon" ambaŭflanke per ĉenoj. Laojunligou estas montvojo en fendego de la monto. Legendo diras ke, ĉar estis neniu vojo en Huashan, maljuna feo Taishanglaojun petis la Bovpaŝtiston fari plugadon kune

kun li. La Bovpaŝtisto tiris bovon kaj li mem manipulis plugilon kaj tiel ili elplugis la vojon kondukantan al la "ĉielo". Tie ankoraŭ restas la Bovo-kuŝejo, la Kroĉejo de Plugilo kaj aliaj vidindaĵoj. Tio ja estas mito, sed el tiu oni jam vidas grandan malfacilon dum trahako de la montvojo.


La plej danĝera montvojo troviĝas ĉe Canglongling. Tie la vojo rampas sur nigra monteĝo larĝa apenaŭ unu metron en formo de fiŝa dorso, kun profundaj krutaj valoj ĉe ambaŭ flankoj. Sur roko legeblas la ĉizitaj vortoj "Ponto en Nubomaro". Oni diras, ke en Tang-dinastio en la oka jarcento fama literaturisto Han Yu (alinome Tuizhi) faris turisman vojaĝon en Huashan-monto. Veninte al Canglongling, li vidis tie krudajn ŝtonkavojn kaj flugpendantajn nubojn ĉe la alta monto, kio forte teruris lin. Li ne povis iri antaŭen, nek malantaŭen. Li laŭte ekploris. Tiam li povis fari nenion alian ol skribi leteron por peti

helpon de sia familio kaj ĵeti ĝin malsupren. Leginte lian leteron ĉe la montpiedo, oni rapidis al li kaj savis lin. Sur rokmuro de Canglongling nun ankoraŭ klare videblas la gravurita skribaĵo "Loko, de kie Tuizhi ĵetis leteron malsupren", sed jam ŝanĝiĝis la aspekto de la vojo. Sur la 120-metre longa "fiŝa dorso" oni faris "trogon" kun 335 ŝtonaj ŝtupoj, garnitan per balustradoj el betonaj kolonetoj kaj feraj kradoj por gardi la turistojn de danĝero.

La bela sed krutega Huashan allogas milojn kaj milojn da ĉinaj kaj alilandaj turistoj. Nemalmultaj vizitantoj al Xi'an volas pririgardi la monton kaj fieras pro sia restado sur ĝi.

*\* Ili estas Taishan-monto en Shandong-provinco en oriento, Hengshan-monto en Hunan-provinco en sudo, Huashan-monto en Shaanxi-provinco en okcidento, Hengshan-monto en Shanxi-provinco en nordo kaj Songshan-monto en Henan-provinco en mezo.*

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono
3. Chongqing
4. Taiyuan
5. Shandong-provinco
6. Kunming
7. Wuhan
8. Changsha
9. Ŝanhajo
10. Zhejiang-provinco
11. Harbin
12. Jinghai-gubernio
13. Chengdu
14. Nankino
15. Beidaihe
16. Luoyang
17. La monto Huashan
18. Altajo

# *Huashan-monto*

Fotoj de WEI XIANG kaj LIU CHUNGEN




Canglongling




Huashan-monto


La Okcidenta Pinto




Saklu



La monto en aŭtuno





Ĉio de feoj



# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

La subiranta suno  
de ZOFIRIU STELIOS (Grekio)



**KVAR BONGUSTAĴOJ  
EN KOKA GRASO**





## INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO

De la 25-a de junio ĝis la 2-a de julio en Cannes de Francio okazis Turisma Internacia Esperanto-Semajno, kun 42 partoprenantoj el naŭ landoj kaj 11 francaj departementoj. Pli ol 100 regionaj esperantistoj alvenis en Cannes por ĉeesti la oficialan malfermon de la I.E.S. La kunvenon vizitis vicurbestro de Cannes, vicurbestro de la Cannel kaj reprezentanto de la socialista deputito de Nico s-ro Colonna.



*La 5-an de majo 1983 fondiĝis la klubo de Pola Esperanto-Asocio ĉe Komunuma Kultur-centro, kie estas 24 membroj de PEA kaj junularo en aĝo de 11-17 jaroj.*

## KVAR BONGUSTAĴOJ EN KOKA GRASO

### Materialoj:

freŝaj fungoj	100 g.
ŝenopraza kaj zingibra haketaĵo	3 g.
malseka halioto ( <i>Haliotis gigantea</i> )	100 g.
koka graso	20 g.
kerno de brasiko	250 g.
rizvino	10 g.
juna tigo de asparago	100 g.
tabla salo	3 g.
klara supo	300 g.
trapa aŭ alispeca amelo	25 g.
gastronomia pulvoro	3 g.

### Preparado:

1. Asparago, halioto, freŝa fungo kaj kerno de brasiko estas nomataj "kvar bongustaĵoj". Tranĉu asparagon en striojn 6-7 centimetrojn longajn kaj halioton en striojn 3-4 centimetrojn longajn kaj unu centimetron larĝajn kun tranĉoj sur ĉiu strio. Senradikigu kaj lavu freŝajn fungojn. Brogu ilin kune kun kerno de brasiko. Aranĝu la kvar bongustaĵojn en kvar vicojn sur plado.

2. Varmigu en pato porkan grason, enmetu la haketaĵojn de ŝenopraza kaj zingibro, klaran supon, salon, gastronomian pulvoron kaj rizvinon. Puŝu la kvar bongustaĵojn en la paton kaj kuiru ilin sur

akra fajro kvin minutojn. Aldonu likvan trapan amelon, skuu la paton kaj renversu la kuirajon. Surŝutetu kokan grason kaj metu en pladon.



## La ĉina antikva filozofio (2)

**L**A ĉina budhisma filozofio ekzistanta inter la metafiziko de la dinastioj Wei (220-265 p. K.) kaj Jin (265-420 p. K.) kaj la ideisma filozofio de la dinastioj Song (960-1279) kaj Ming (1368-1644) estas grava konsistiga parto de la filozofio de Ĉinio.

Budhismo enkondukita en Ĉinion en la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) fariĝis nacia religio en la Nordaj kaj Sudaj Dinastioj (420-589 p. K.) dank' al la subteno de la feŭdaj regantoj. Ĝi floris en la dinastioj Sui kaj Tang (581-907 p. K.). La procezo, en kiu budhismo disvastiĝis en Ĉinio, estis ankaŭ procezo, en kiu ĝi ricevis ĉiam pli da ĉina karaktero.

La kerno de la budhisma doktrino estas teorio de senmorteco de la animo. La teorio opinias, ke la animo estas eterna, la vivo kaj morto alternas, kia estas ago, tia estas pago, kaj paradizo akceptas bonulojn, dum infero malbonulojn. En la florantaj tagoj de budhismo, kontraŭ tiu teorio forte oponis ateisto Fan Zhen (445-515 p. K.), kiu verkis "Pri Estingiĝo de la Animo" por rezisti al adorado de Budho. Li opiniis, ke la animo ne povas ekzisti sen la korpo, "kiam la korpo ekzistas, la animo ekzistas; kiam la korpo ne ekzistas, la animo estingiĝas." Li konfirmis, ke la korpo estas primara kaj animo sekundara. Sur tiu bazo li elmetis la tezon, ke la korpo estas la bazo de la animo

kaj la animo estas ĝia funkcio. Li argumentis, ke la rilato inter la korpo kaj animo similas al tiu inter tranĉila klingo kaj ĝia akreco. Neniam ekzistas akreco sen tranĉila klingo, kiel do oni povus diri, ke la animo ankoraŭ restas, kiam korpo jam mortis? Lia vidpunkto donis novan konon pri la rilato inter la korpo kaj animo.

En la dinastioj Sui kaj Tang estiĝis diversaj sektoj de budhismo, kiuj havis ĉiu sian adoratan sutron kaj predikan manieron, sed estis unuanimaj en la ĉefa teoria problemo, kiu opinias, ke ĉiu havas naturon fariĝi budho kaj tiu naturo ne ŝanĝiĝas dum la alterno de vivo kaj morto. La budhisma filozofio, forte influanta la postajn filozofojn, preparis gravajn ideologiajn materialojn por la naskiĝo de la ideisma filozofio de Song- kaj Ming-dinastioj.

Post Song-dinastio la ĉina feŭda socio eniris sian postan periodon. Dum la ses jarcentoj de Song-dinastio ĝis Ming-dinastio la regantan pozicion de ideologio okupis la ideisma filozofio, nova speco de konfuceanismo. Ĝi prenis la etikon de la konfuceana skolo kiel la ĉefan bazon, ĉerpis nutron el la teorioj de budhismo kaj taoismo kaj formis relative striktan ideisman filozofian sistemon kun "absoluta ideo" kiel la kerno. En ĝi plimultiĝis ideisma koloro kaj mankis la krudeco kaj nestrikteco de la sistemo, kiujn havis la filozofio de la

konfuceana skolo de antaŭ Qin-dinastio. Ĝi troviĝis en la lasta etapo de la ideisma evoluo de la ĉina feŭda socio. Ĝi argumentis la raciecon kaj eternecon de la feŭda sistemo kaj feŭda etiko kaj fariĝis oficiala filozofio en la posta periodo de la ĉina feŭda socio.

Tiun ideisman filozofion fondis Cheng Hao kaj Cheng Yi, kaj perfektigis Zhu Xi (1130-1200). Zhu Xi estis erudicia. Li studis la antikvan literaturon kaj famajn verkojn de samtempuloj kaj donis atenton al utiligo de sukcesoj de naturscienco. Li dediĉis siajn 40 jarojn al prelegado kaj verkado. La teoria sistemo fondita de li havis klaran politikan koloron kaj argumentis la feŭdismajn politikojn, leĝojn kaj etikon.

La plej esenca parto de lia filozofio estas "absoluta ideo". Li diris: "La universo fontas el absoluta ideo." "Absoluta ideo" estiĝis antaŭ ol "objekto". "Sen



Zhu Xi

objekto ekzistas jam ĝia ideo.” Objekto havas vivon kaj morton, dum “ideo” estas eterna. “Kiam la montoj, la riveroj, la tuta tero falos,” “ideo” ankoraŭ restos, ankoraŭ moviĝos senĉese. Ĉi tie Zhu Xi inversigis “objekton” kaj “ideon”, opiniante, ke “ideo” povas ekzisti sen “objekto”.

Kia rilato estas inter “ideo de la universo” kaj “ideo de ĉiu objekto”? Zhu Xi elmetis la tezon, ke “ĉiu aparta ideo estas enkorpiĝo de la ĝenerala ideo.” Li eksplikis ĝin laŭ la vidpunkto de la ĉina budhisma filozofio, ke “la luno speguliĝas en dek miloj da riveroj.” Li diris, ke sur la ĉielo staras nur unu luno, tamen oni vidas dek milojn da lunoj en lagoj kaj riveroj. Kaj luno en ĉiu lago aŭ rivero estas montriĝo de la plena luno sur la ĉielo sed ne ĝia parto. La “ideo” de ĉiu konkreta objekto estas manifestiĝo de la tuta “ideo” de la universo, sed ne ĝia parto. Zhu Xi resumis sian tezon kiel tion, ke “dek mil estas unu, unu estas dek mil.” Ĝi estis reprodukto de tio, ke “ĉio estas unu, unu estas ĉio” en la ĉina budhisma filozofio. La tezo de la ĉina budhisma sekto Huajianzong, ke “la luno speguliĝas en dek mil riveroj”, argumentas, ke en ĉiu polvo ekzistas budha regno kaj la regnanoj en sia respektiva pozicio povas budhiĝi. La tezo, ke “ĉiu aparta ideo estas enkorpiĝo de la ĝenerala ideo”, celas pravigi, ke malsamaj homoj troviĝas en malsamaj soci-tavoloj, kaj plie pruvi racia la feŭdan klasan sistemon.

Por solvi la demandon kiel “ideo” kreas diversajn objektojn, Zhu Xi pruntis “materion” de la materiisma filozofio kaj prenis ĝin kiel “peranton” de “ideo” por krei diversajn objektojn.

Ideo kreas materion, materio objekton — jen lia formulo. Li diris, ke la procezo de formiĝo de objekto estas procezo, en kiu “ideo” senĉese duiĝas pere de “materio”.

Zhu Xi heredis la ideologion de Cheng Hao kaj Cheng Yi malakordigi “ĉielan ideon” kaj “homan volon” kaj prezentis la proponon “konservi la ĉielan ideon kaj forigi la homan volon”, por ke oni kontentiĝu pri sia ekzistanta stato, havu nenian ideon ribeli kaj tute obeu la feŭdajn regadon kaj etikon.

Zhu Xi estis la plej influa reprezentanto de la konfuceanoj post la morto de Konfuceo. Lia “Komentarioj pri la Kvar Libro” (nome “La Granda Lerno”, “La Doktrino pri la Mezeo”, “La Instruoj de Konfuceo” kaj “Mengzi”, kiuj notis vortojn de Konfuceo, Mengzi kaj aliaj) estis lernolibro destinita por la intelektuloj en la posta periodo de la feŭda socio.

Lu Jiuyuan (1139-1193), samtempulo de Zhu Xi, fondis alian filozofian sekton, la sekton pri subjektiva ideismo. Li rigardis “cerbon” kiel nouemon de la universo: “La universo estas mia cerbo, mia cerbo estas la universo.” Li elmetis la tezon, ke “cerbo estas ideo”, opiniante, ke ideo pri afero estas manifestiĝo de homa cerbo. El tio ni vidas, ke lia metodo de memkulturo estas konservi kaj gardi bonan koron, kiun la ĉielo donis al homo, kaj havi altan konscion de firma konvinko pri kaj bona observado de la feŭda moralo. La diferenco de la opinioj de Lu Jiuyuan kaj Zhu Xi estas: Zhu diris, ke la feŭda moralo estas “ĉiela ideo”, kiu estiĝis antaŭ ol la objektiva mondo, dum Lu asertis, ke la



Wang Fuzhi

feŭda moralo estas “cerbo” propra al homo.

Wang Yangming (1472-1528) en la meza periodo de Ming-dinastio disvolvis la ideologion de Lu Jiuyuan. Li prezentis sian tezon, ke “ne estas objekto ekster la cerbo, ne estas afero ekster la cerbo, ne estas justeco ekster la cerbo kaj ne estas bono ekster la cerbo”, asertante, ke ĉiuj objektoj kaj leĝoj, eĉ diversaj moralaj reguloj en la naturo kaj la homa socio estas derivitaj de “cerbo”. Li diris, ke “objekto ekzistas en konscio” kaj “konscio venas el la cerbo”. Li inversigis la rilaton inter pensado kaj ekzisto, tial lia filozofio estis tiu de tipa subjektiva ideismo. Lia lernanto notis: “Foje la instruisto vizitis sudan urbon. Lia amiko, montrante floron ĉe roko, demandis: ‘Se ne ekzistus objekto ekster la cerbo, kian rilaton kun mia cerbo havus la floro mem disvolviĝanta kaj velkanta en la profunda monto?’ La instruisto respondis: ‘Antaŭ ol vi vidis la floron, ĝi kaj via cerbo ambaŭ estis en kvieteco. Kiam vi venis rigardi la floron, ĝia koloro tuj frapis viajn oku-

lojn kaj vi ekkonsciis, ke la floro ne estas ekster via cerbo.’”

Ĉar “cerbo” estas noumeno kaj la ideo de ĉiuj objektoj kaj aferoj sin trovas en “mia cerbo”, do la teorio de kono de Wang Yangming ne povas esti alio ol koni “mian cerbon” en la interno. Tiu “cerbo”, nomata ankaŭ “kono sen lerno”, estas naturdotita kapablo distingi pravon de malpravo kaj bonon de malbono, ĝi estas ankaŭ “ĉiela ideo” propra al la homa cerbo. Wang Yangming diris: “Senlerna kono ĉe mia cerbo estas la ĉiela ideo.” Unuvorte, “kono sen lerno” estas kaj noumeno de la subjektiva ideismo kaj apriorisma feŭda moralo. Wang Yangming proponis “atingi konon sen lerno”, t. e. uzi naturdotitan konon propran al la cerbo ĉe ĉiuj aferoj, por venki ĉiujn “herezajn pensojn”, por savi la feŭdan sistemon el krizo.

Dum la filozofio de Cheng Hao, Cheng Yi kaj Zhu Xi kaj tiu de Lu Jiuyuan kaj Wang Yangming disvolviĝis ĝis la plej alta ŝtupo, al la kulmino iris la ĉina antikva naiva materiismo en la batalo kontraŭ la objektiva ideismo dum tiu periodo.

Zhang Zai (1020-1077) estis materiisma pensulo, kiu proponis “bonan lernon por praktikado”. Li prezentis sian tezon, ke “universo estas materio”, opiniante, ke la ĉielo, ne havanta formon, estas la origina stato de materio. Materio povas kolektiĝi kaj disiĝi. Kiam materio kolektiĝas, ĝi kreas objektojn en diversaj formoj; kiam objektoj malaperas, la materio turniĝas denove en senforman ĉielon (aŭ universon). Zhang Zai unufoje starigis en la historio de la ĉina filozofio kompletan sistemon de materia monismo,

kaj la ĉina antikva naiva materiismo ekiris en novan evoluan etapon. Liaj tezoj estis riĉaj je dialektika ideologio. Li prezentis teorion de kontraŭdiro de “du flankoj de objekto”, asertis, ke “objekto moviĝas ne pro ekstera forto”, kaj iniciatis la teorion pri la du formoj de movado de objekto: iom-post-ioma transformiĝo kaj subita transformiĝo. Poste Wang Fuzhi (1619-1692) heredis kaj disvolvis lian materiisman kaj dialektikan ideologion.

Wang Fuzhi estis elstara materiisma pensulo. Li vivis en la lastaj jaroj de Ming-dinastio kaj unuaj jaroj de Qing-dinastio. Dum tiu periodo evidentiĝis la kontraŭdiro inter la ekburĝoninta kapitalismo kaj la kaduka feŭdismo kaj senprecedence akriĝis la klasa kontraŭdiro. En 1644 la kamparana armeo gvidata de Li Zicheng renversis la regadon de Ming-dinastio, sed la frukto de ĝia venko estis uzurpita de Qing-dinastiaj aristokratoj. Pro malkontento kontraŭ la feŭda aŭtokratio kaj altpremacia politiko de Qing-dinastio, Wang Fuzhi aliĝis al armeo por batali kontraŭ Qing-registaro. Post malvenko li fuĝis en profundajn montojn, kie li vivis ermite kaj verkadis 40 jarojn.

Wang Fuzhi heredis kaj disvolvis la tezon de Zhang Zai, ke “universo estas materio”. Li sugestis, ke “la negativa kaj pozitiva materioj plenigas la universon; krom ili estas nenio alia, kaj ne troviĝas vakeco.” Li plie klarigis, ke en la universo ekzistas nur materio, sed ne io alia. Li ankaŭ eksplicite montris, ke estas nur diferenco inter kolektiĝo kaj disiĝo de materio, inter ĝia apero kaj kaŝiĝo, inter ĝia evidenteco kaj neevidenteco, inter ĝia formo kaj senformeco,

sed ne povas esti ĝia “neekzisto”

En la problemoj de rilato inter “ideo” kaj “materio” kaj tiu inter “kono” kaj “objekto” Wang Fuzhi kritikis la ideisman vidpunkton, ke “ideo estiĝis antaŭ ol materio” kaj ekster la materio ekzistas la izolita “ideo”. Li klare traktis la rilaton inter la konkreta afero kaj ĝia leĝo kaj sekvis la materiisman principon.

Lia filozofio estis riĉa je dialektika pensado, kion oni rigardis kiel lian kontribuon al la ĉina filozofia historio. Li prezentis la tezon “dividi unu en du” kaj “kombini du en unu” kaj per tio riĉigis la ideon de la unueco de kontraŭoj ĉe la antikva dialektiko. Li pli eksplicite traktis la problemon pri fonto de movforto de ŝanĝiĝo de objekto, montrante, ke “en unu objekto ekzistas du flankoj de kontraŭdiro, ili influas unu la alian kaj ŝanĝiĝas senfine.” Li trakti ankaŭ la relativecon de kontraŭoj, opiniante, ke absoluta kontraŭaĵo ne ekzistas en la materia mondo nek en la spirita. Li aplikis la ideon de unueco de kontraŭoj al studo de dialektika rilato inter movado kaj senmoveco. Li havis profundan konon, ke movado kaj senmoveco ampleksas, sed ne forpuŝas unu la alian. Li montris plue, ke “senmoveco troviĝas en movado”, ankaŭ senmoveco estas formo de movado kaj movado estas eterna. Li konfirmis la opinion pri la eterna movado de objekto kaj samtempe elmetis la evoluan tezon “la ĉielo kaj la tero en senĉesa ŝanĝiĝo”.

La teorio de kono de Wang Fuzhi estis la materiisma teorio de reflektio. Li utiligis kaj ŝanĝis la konceptojn pri “pensado” kaj “objekto” en la budhisma fi-

# *Pli forte brilu la Tang-dinastia ceramiko*

de LIN JIANHUI

*La aŭtoro estas 38-jara projektisto de la Luoyang-a Metiarta Fabriko. Glazuritaj ceramikaĵoj, kiujn li projektis laŭ tiuj de Tang-dinastio, karakteriziĝas kaj per antikveco kaj per originaleco. Kiel artaĵoj propraj al Tang-dinastio (618-907 p.K.), trikoloraj glazuritaj ceramikaĵoj, plejparte en figuroj de ĉevalo, kamelo kaj homo, estas grandnombre elterigitaj ĉe Luoyang, iama kromĉefurbo de Tang-dinastio. Tiuj ceramikaĵoj, ofte kovritaj per ruĝflava, verda, blua, blanka aŭ nigra glazuro, kiu vitriĝas post fandiĝo kaj sorbiĝo dum bakado, aspektas brile kaj enkorpiĝas originalan artan stilon.*

— La Red.

Fine mian maltrankvilan atendon rekompencis ŝia letero, letero de mia edzino, kiu lernas nun en la Centra Metiarta Instituto kaj regule skribas al mi ĉiun duan tagon. Ŝi foriris antaŭ duonjaro, kaj la tempo pasis por mi tiel lante. Nun mi ne plu dubas pri la vereco de la ĉina proverbo: “En sopiro unu tago longas kva-

zaŭ tri jaroj”. Eble ne eraras tiuj, kiuj ŝerce diris, ke mi kaj mia edzino ĉiam vivas en la miela monato, kvankam ni geedziĝis antaŭ tri jaroj. Ho, jes, en mia malglata vivo Jiyu, mia edzino, ne nur estas tiu, kiu plej bone min komprenas kaj konsolas, sed ankaŭ mia dekstra mano en mia arta kreado. Al ŝi mi ŝul-

das ĉiujn sukcesojn en mia projektado de trikoloraj glazuritaj ceramikaĵoj.

Dum multaj jaroj, influate de elterigitaj trikoloraj glazuritaj ceramikaĵoj de Tang-dinastio, la temo-serio de ceramikaĵoj produktitaj de diversaj ĉinaj metiartaj fabrikoj apenaŭ montris ian

lozofio kaj reĝustigis la rilaton inter subjekto kaj objekto inverigitan de la budhisma filozofio. Laŭ la principo de la teorio de reflektado li opiniis, ke kono naskiĝas sub tri kondiĉoj — “formo”, “spirito” kaj “objekto” — t. e. kono naskiĝas nur ĉe renkontiĝo de sensoro, pensado kaj objekto.

Resume, en vidpunkto de la naturo, teorio de kono, dialektiko kaj vidpunkto de historio

Wang Fuzhi atingis la plej altan nivelon de disvolviĝo de la nativa materiisma filozofio de la antikva Ĉinio. Li kaj donis grandan atenton al resumo de historio kaj dediĉis sian energion al ĝeneraligo de la realo. Li ne blinde sekvis, sed heredis kaj disvolvis la antaŭan materiisman kaj dialektikan ideologion; li ne simple neis, sed profunde analizis la ideisman filozofion, forigis ĝiajn malĝustaĵojn, prenis ĝiajn raciajn elementojn kaj tiel

riĉigis kaj disvolvis sian materiisman filozofion. Lia filozofia penso havis grandan influon sur posteulojn, ĝi edifis multajn ĉinajn modernajn pensulojn, inkluzive famajn ĉinajn burĝajn reformistojn kaj revoluciulojn en la fino de la 19-a jarcento, kiaj Tan Sitong kaj Zhang Taiyan. Hodiaŭ oni ankoraŭ devas plue studi la multajn verkojn, kiujn li lasis post si.

(Fino)

ŝanĝon, kaj tio delonge tedis nin. Fakte, en Tang-dinastio troviĝis diversformaj artoj kun variaj temoj kaj riĉa vivogusto. Tiam ja prosperis eminentaj pentraĵoj, freskoj, skulptaĵoj k. a.

Jiyu foje proponis al mi: “Ĉu ni povus per la Tang-dinastia ceramiko prezenti la originalan plastikon aplikitan de la freskoj kaj skulptaĵoj de Dunhuang?” ŝi inspiris min. Ni tuj komencis la provon en nia mallarĝa laboratorio kaj elbakis kelkajn argilaĵojn: “Genuanta Oferanto de Dunhuang”, “Dancistinoj kaj Muzikistoj”, “Budha Statuo de Dunhuang” kaj “Ŝak-ludantaj Belulinoj”. Tamen, kiam ni ilin montris al niaj kolegoj, iuj forte atakis nin kun jenaj kulpigoj: unue, niaj verkoj estas ekster la kategorio de la Tang-dinastia ceramiko; due, la duonnudeco de la skulptitaj belulinoj ne estas konforma al la ĉina moro; trie, tiuj ceramikaĵoj estas plaste tro malfacilaj por pogranda produktado. Malgraŭ tio, ekspoziciate, niaj verkoj vekis ĝeneralan admiron ĉe la publiko, kaj fremdlandaj klientoj konkure ilin aĉetis. Niaj kritikantoj fine silentiĝis kaj cedis, kaj niaj provoj akiris aprobon de la koncernaj instancoj.

Kvankam neparolema ordinare, mia edzino estas verva kaj fervora en sia arta kreado. Iun tagon ŝi ekhavis la ideon skulpti aron da ceramikaĵoj pri la “Silka Vojo”. Inspirite de freskoj de Dunhuang, kiuj prezentas la scenojn sur la “Silka Vojo”, ankaŭ mi intencis entrepreni similan provon kune kun mia kolego antaŭ du jaroj. Nun Jiyu proponis, ke ni kombinu la tipan plastikon pri kameloj de la Tang-dinastia ceramiko kun tiu pri homfiguroj de la Tang-dinas-

tiaj pentrado kaj skulptado por fari pli perfektan efekton.

En la dua jarcento a. K. Ĉinio komencis eksporti sian silkon al Eŭropo per la vojo tra la “Okcidenta Regiono” (la nunaj Xinjiang kaj Meza Azio). En Tang-dinastio la “Silka Vojo” fariĝis pli prospera kaj ludis gravan rolon en la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Eŭropo. Estas ja signifoplene prezenti tiun temon per la Tang-dinastia ceramiko.

Ni eklaboris, kaj nia pli-olunu-monata fortostreĉo fine donis frukton — aron da ceramikaĵoj.

La ceramikaĵaro dividiĝas en 6 grupojn. La unua grupo prezentas Tang-dinastian oficiston kaj vojgvidiston, kiuj, rajdante sur kameloj, kondukas karavanon al la “Silka Vojo”. La oficisto tenas sian spadon per la mano kaj kun rideto aŭskultas la rekomendon de la vojgvidisto, dum lia kamelo alte levas la kapon, aludante la altrangecon de sia mastro. La dua grupo konsistas el unu sola ŝarĝ-kamelo kun mallongaj sed fortikaj antaŭaj kruroj, konata kiel “Ŝipo en Dezerto” pro sia granda ŝarĝkapablo. Ĝi estas figurigita laŭ Tang-dinastia ceramika kamelo elterigita ĉe la urbo Luoyang, kaj tio montras, ke la karavano venas de tiu urbo. Sur la dorso de la kamelo estas sakoj da silko, kaj la sakoj estas ornamataj per tradiciaj desegnaĵoj de bestaj kapoj. La centro de la skulptaĵaro estas la tria grupo, kiu prezentas la survojan renkonton de la karavano kun persaj kaj arabaj komercistoj: vidinte la fajnajn sakojn da silko de Ĉinio, persaj komercistoj aplaudas kun admiro kaj la arabaj ĝoje ekkantas, dum iliaj kameloj intime rigardas unu alian kun la kolo

etendita. Ilia emocio verŝajne konfuzas la serenecon de la sekvanta kamelo singarde kondukita de hana servisto — jen la kvara grupo. Sur la dorso de tiu ĉi ŝarĝobroto vidiĝas sagujo kaj pafarka tegaĵo, kies desegnadon inspiris al ni la albumoj de Tang-dinastio. La kvina grupo prezentas kamelinon kun ido: kamelino naskis idon survoje, kaj ili ĉiam sekvas unu la alian en la longa vojaĝo tra dezerto. La lasta grupo estas la ariero de la tuta karavano. Gardisto, skulptita laŭ Tang-dinastiaj statuoj de ĉielaj generaloj, aspektas brava kaj majesta. Li turnas sin malantaŭen, kvazaŭ por alvoki la postirantajn kamelojn. Ĉiuj kameloj estas ŝarĝitaj per, krom silko, ankaŭ kruĉoj de akvo kaj vino, survoje ĉasitaj fazanoj kaj leporoj ktp. Sur ĉiuj figuroj, homaj kaj kamelaj, troviĝas desegnaĵoj, kiuj aludas la surportitajn silkaĵojn.


Kiam tiu ceramikaĵaro, 3.8 metrojn longa, estis ekspoziciata, ĝi allogis amason da en- kaj eksterlandaj rigardantoj, kiuj tre admiris ĝin. Fremdlandaj komercistoj eĉ deziris fari mendon.

Fakte, mia artista kariero iris ne ĉiam facile. Antaŭ 19 jaroj mi venis al la historie fama urbo Luoyang — granda muzeo de la ĉina antikva kulturo — kun ambicio dediĉi min al belarto. Tamen pro moko de la sorto mi eklaboris nur kiel desegnisto de fabrikmarkoj. Post kelka klopodo mi fine sukcesis min okupi pri projektado en metiarta fabriko, sed mia laboro ne estis sufiĉe taksita dum longa tempo. Foje, kiel mi memoras, unu el la direktoroj de la fabriko diris al mi: “Neniu el viaj desegnaĵoj min kontentigis. Mi vere ne kuraĝas multe esperi de vi.” Liaj vortoj grave vundis mian perso-



*Parto de la ceramikajaro "Silka Vojo", kiu prezentas la scenon, ke araba komercisto admiras ĉinan silkon.*

nan dignon, sed — ho, koran dankon al li — decidigis min iri mian propran vojon en mia arta kreado. De post tio mi duobligis mian diligentecon kaj dediĉis preskaŭ ĉiun postlaboran minuton al la modlado kaj bakado de ceramikajoj. Mi veturis al Pekino, Xi'an, Datong, Dunhuang kaj aliaj historie famaj urboj por kolekti materialojn por mia kreado. Feliĉe, al nia fabriko poste venis nova direktoro, kiu kvankam ne sufiĉe sperta pri arto, senrezerve subtenas mian edzinon kaj min en nia provo daŭrigi kaj disvolvi la Tang-dinastian ceramikon, kaj eĉ sendis mian edzinon al la Centra Metiarta Instituto en Pekino por fari kompletigan studon.



*La aŭtoro (maldekstre)*

Nun antaŭ mi kuŝas la letero de mia edzino, en kiu ŝi montras plurajn novajn projektojn, interalie tiun prezenti la faman ruĝon de la ĝardeno Yuanmingyuan en Pekino per fresko de la Tang-dinastia ceramiko. Ĉe ordinaraĵ ceramikaj freskoj oni ĝenerale faras surglazuran kolori-

gadon, kio estas facila kaj oportuna por bakado. Sed nun temas pri subglazura kolorigado. Tiuokaze la varioj de bezonataj koloroj pliiĝas de 5 al 30 kaj efika rimedo kontraŭ la fluado de glazuro estas dezirata dum bakado. Ankoraŭ neniu iam fa-

ris similan provon. Nia eksperimento ĵus komenciĝis, kaj la vojo antaŭ ni estas longa, zigzaga kaj plena de obstakloj. Feliĉe, de la sama letero mi informiĝis, ke mia edzino finis sian studon kaj revenos post unu monato.

# LI KUCHAN, MAJSTRO DE ĈINSTILAJ PENTRAĴOJ

**A**NTAŬ 60 jaroj, flava sablo-polvo, malvarma vento kaj teda pluvo regis en la antikva Pekino ĉie, ĉu super la imperiestraj palacoj aŭ super la stratoj de malriĉaj urbanoj. Altstatura kaj honesta rikiŝisto kun Shandong-a dialekto fluge kuris inter hastemaj paŝantoj, tirante rikiŝon. Li havis fortajn muskolojn, longan hararon kaj saĝajn okulojn. Tiuj altranguloj, sinjoraj moŝtoj kaj virinoj devenintaj de famaj familioj, kiuj siatempe veturis per lia rikiŝo, jam malaperis kiel fumo, dum la rikiŝisto estis vicigita en senmortajn artistojn de Ĉinio. Li estis neniu alia ol Li Kuchan, majstro de ĉinstilaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj.

*Li Kuchan (la staranta) kaj lia majstro Qi Baishi*



Sinjoro Li Kuchan, kies originala nomo estis Li Ying, naskiĝis en familio de malriĉa kamparano de Liqi-vilaĝo de Gaotang-gubernio de Shandong-provinco en 1898. Tiam disvolviĝis plu al la ĉina socio duonfeŭdigo kaj duonkoloniigo, kaj la ĉinaj kamparanoj baraktis ĉe la mortolinio pro la malalta prezo de greno. Jam en la infaneco Li Kuchan vidis tian kamparan tragedion, kaj tiu medio faris lin en firmavolan homon honestan kaj simplan. En 1919, li venis al Pekino por lerni pentrarton, li komence vizitis la duonlaboran lernejon sub la Pekina Universitato. Post nelonge li vizitis la fakultaton de eŭropa pentrarto de la Ŝtata Arta Instituto por lerni desegnadon kaj olepentradon. Per malgranda enspezo akirita en vespera rikiŝtirado, li aĉetis por si manĝaĵojn kaj pentrilojn. Li mizere travivis malfacilajn jarojn, kion ne povis toleri ordinaraĵoj. Lia kunlernanto donis al li la nomon "Kuchan", kiu signifas "gajni inspiron el suferoj". Jes, li elektis por si suferplenan tamen inspiran vojon de arto! De tiam li estis nomata Li Kuchan. Fine aperis miraklo! Qi Baishi, granda majstro de ĉinstilaj pentraĵoj, trovis lin esperiga kaj akceptis lin kiel sian disĉiplon. Qi diris: "Mi havas ĉ. mil disĉiplojn, kaj inter ili Li Ying estas la plej elstara." Rigardinte liajn pentraĵojn, Qi laŭdis: "Ili superas ĉiujn alies pentraĵojn", "eĉ la miajn". Inspirate de la versaĵo

de la granda poeto Du Fu "Mi ne demetu la plumon sen admira poemo", Qi Baishi gravuris sigelilon kun vortoj "Ne demetu la plumon" kaj ĝin donacis al li. La virto de s-ro Qi trafe trovi kaj inspiri elstarajn talentulojn ĝis nun estas ankoraŭ ĉirkulanta inter la ĉinaj pentristoj. Sinjoro Li Kuchan ne vanigis la grandan esperon de sia instruisto kaj finfine fariĝis fame konata majstro de ĉinstila pentrarto.

60-jara klopodo en arta esploro faris lin matura pentristo kun originala stilo.

La pentraĵoj de sinjoro Li Kuchan heredis kaj disvolvis la klasikan pentrarton de Ĉinio. La orienta kulturo emfazas filozofian instruon kaj gracian literaturan stilon, kaj en la pentrarta tradicio de Ĉinio la erudiciaj pentristoj emfazas la poeziecon en la verkoj. Sinjoro Li Kuchan ofte diris: "La poemo estas senforma pentraĵo, dum la pentraĵo estas poemo kun formo." Li ŝatis pentri kun forta sento fruktojn, legomojn, fiŝojn kaj krabojn, pentri lagetojn kaj insuletojn, kiujn li amis en la infaneco. Li ne ŝatis pentri vulgaraĵojn kaj afekti sin granda artisto. Lia sento estis pura kaj modesta. Li prikantis kun poeta sento la kuraĝecon de aglo, la firmecon de pino, la belecon de bambuo kaj la purecon de lotusfloro. Li ebriiĝis de la bela naturo, tamen li pentris ilin neniam por flati aliulojn. Tial, liaj pentraĵoj forgesigas l rigardantoj ĉagrenojn



# ĈINA PENTRISTO LI KUCHAN



Li Kuchan en la aĝo de 85 jaroj



La 84-jara Li Kuchan interparolas kun fiŝisto dum sia oficvojaĝo en Guilin.



*Para Li KUCHAN deseando  
larga vida, Gyenes.*


La pentraĵo «Aĝlo» donacita de Li Kuchan al la hispana fotisto Gyenes dum ties vizito al Ĉinio en 1979




Li Kuchan pentras por la Ĉina Belartista Asocio ĉe la 60-jara jubileo de sia artista vivo.



Li Kuchan kaj naciminorita-  
taj belartistoj de Xinjtung



Li Kuchan faras la grandan pentraĵon «Somervezo» ĉe la sojlo de 1982.



Li Kuchan tre interesiĝas pri la arto de Pekin-opero. La foto montras la pentriston kaj famajn pekin-operajn aktorojn Zhang Junqiu (meze) kaj Li Wanchun (dekstre).



Li Kuchan tre ŝatas popularajn artaĵojn de Ĉinio.

Oni aranĝis Ekspozicion de Pentraĵoj de Li Kuchan kaj Lia Filo en 1980 en Hongkong. Jen Li Kuchan (meze), pentristo Zhao Shao'ang (maldekstre) kaj Li Yan en la eksponejo.



kaj portas al ili kvietan imagon. Li Kuchan ofte diris: “La poe-  
taj imagoj devas esti senĝenaj,  
kiel ĉevaloj galopantaj en la ĉie-  
lo”. Por krei eterne valorajn  
artaĵojn, artisto ankaŭ devas  
havi siajn artajn imagojn senli-  
majn.

La peniktuŝoj de sinjoro Li  
Kuchan estas fortaj. Li lerte  
kombinis la ĉinan kaligrafion  
kun la ĉinstila pentrarto. Liaj  
pentraĵoj, ĉu kun krudaj aŭ deli-  
kataj tuŝoj, ĉu kun intensaj aŭ  
palaj koloroj, ĉiuj portas la gus-  
ton de la tradicia kaligrafio de  
Ĉinio. Tial, sinjoro Li Kuchan  
estas ankaŭ elstara kaligrafo.  
Liaj kaligrafiaĵoj estas senafek-  
taj, gustoplenaj kaj havas liajn  
originalajn karakterojn. Eĉ en  
la aĝo de 80 jaroj, li ankoraŭ sin  
ekzercis en kaligrafado ĉiutage.

Ĉiuj figuroj sur la pentraĵoj  
de Li Kuchan estis kreitaj de li  
post multjara polurado kaj rafi-  
nado. La floro, herbo, insekto  
kaj birdo pentritaj de li, ĉiu ha-  
vas sian propran vivon kaj sam-  
tempe esprimas deziron de la  
pentristo. Sinjoro Li Kuchan  
verkis per siaj riĉaj travivaĵoj  
siajn pentraĵojn kaj prezentis  
kun plena amo ĉiajn estaĵojn en  
la naturo, tial liaj pentraĵoj ne  
estas iliaj kopiaĵoj, sed rekreaĵoj,  
kiuj prezentas liajn honestecon  
kaj simpation. La aglo, pentrita  
de sinjoro Li Kuchan, ne estas la  
feroca reĝo de birdoj, sed sim-  
bolo de paco, brava batalanto  
defendanta la sanktan patrolan-  
don. La diligentaj pegoj sur liaj  
pentraĵoj memorigas nin pri la  
ordinaraj laboruloj, kiuj ne  
aspiras vantan honoron. Kaj la  
koturnoj, naivaj kokidoj, mevoj  
kaj ardeoj, ĉiuj kondukas nin  
al la natura mondo en amika  
vivo, sen malama interluktado.  
Tio estas la idealo de la pen-  
tristo.



*La 83-jara Li Kuchan en pentrado*

La pentraĵoj de sinjoro Li  
Kuchan estis kreitaj senĝene  
kaj libere. Tio montras liajn  
senĝenajn humoron kaj stilon.  
Li opiniis, ke oni devas fari pen-  
tradon senĝene, sed ne stereo-  
tipe. Pentristo Zheng Banqiao  
de Qing-dinastio, kiu estis lerta  
en pentrado de bambuoj, diris,  
ke oni pentras bambuojn ne laŭ  
la aspekto en la okuloj, sed laŭ  
la imago en la kapo, kaj la pen-  
tritaj bambuoj estas pli belaj ol  
tiuj en la imago. Sinjoro Li  
Kuchan praktikis sian pentradon  
ĝuste kiel dirite de Zheng. En la  
kombinado de la subjektivaj  
imagoj kaj objektivaj figuroj na-  
ture formiĝis liaj pentraĵoj. Liaj  
pentraĵoj impresas homojn per  
vasteco kaj imponeco. Iuj el liaj  
pentraĵoj longas maksimume je  
pli ol 3 metroj kaj minimume je  
triona metro. Li lerte aranĝis  
spacajn rilatojn en siaj pentraĵoj,  
tial oni ĉiam trovis liajn verka-  
ĵojn okulplaĉaj. La de li pentri-  
taj riveroj aŭ lagoj, kamparaj aŭ  
kortaj pejzaĝoj, agloj sur mont-  
pintoj aŭ kokidoj sub bananar-

boj, ĉiuj estas vivplenaj kaj  
ĉarmaj.

Sur la pentraĵoj sinjoro Li  
Kuchan iam skribis nur la daton  
kaj sian nomon, kaj iam impro-  
vizajojn kun vortoj emociaj kaj  
signifoplenaj. Ekzemple, la vor-  
toj por la pentraĵo “Pino kaj  
Aglo sur Roko” tekstas jene:  
“Kiam oni pentras la aglon,  
pinon kaj rokon, li devas pentri  
tiujn imagitajn en la cerbo. Ju  
pli oni malproksimiĝas for de la  
realaĵo, des pli la pentraĵo prok-  
simiĝas al versimileco.” Li opi-  
niis, ke la pentristo ne devas esti  
sklavo de la naturo, katenita de  
realaj objektoj, sed devas krei la  
mondon sub sia peniko per idea-  
lismo. Lia alia surskribo por iu  
pentraĵo diras: “Oni devas pre-  
ni la naturon kiel sian instru-  
iston kaj aŭdace krei siajn arta-  
ĵojn, sed ne devas nur atenteme  
imiti.” La pentraĵo de ĉina eru-  
dicia pentristo estas perfekta  
artaĵo formita el versaĵo, kali-  
grafiaĵo, pentraĵo kaj sigelo. Sur  
la finita pentraĵo oni kutime

faris kaligrafajon en la deca loko por harmoniigi ilin en la tuteco. La pentraĵoj de Kuchan ĝuste estas tiaj ĉarmaj kaj infektivaj artaĵoj.

Sinjoro Li Kuchan ofte diris al siaj lernantoj: “La moraloj de pentristo ja vidiĝas sur liaj pentraĵoj”, “se liaj moraloj estas malnoblaj, liaj pentraĵoj certe ne estas elstaraj.” Tiuj vortoj entenas veron. En la juneco sinjoro Li Kuchan jam havis noblan kvaliton de amo al sia nacio kaj emfazis tiajn kvalitojn ne koruptiĝi de riĉeco, ne fleksiĝi antaŭ forta subpremo kaj ne deprimiĝi en malriĉeco. Li males-timis maljustulojn, monavidulojn kaj diboĉulojn. Kiam la ĉina nacio dronis en krizon, li plurfoje faris kun justamo kaj nacia digno, neflekseblan batalon. Liaj pentraĵoj ĝuste manifestis tiujn liajn kvalitojn. La arto estas senindulga spegulo, kiu povas vidigi la spiriton de la pentristoj.

Sinjoro Li Kuchan bedaŭrinde forpasis la 11-an de junio ĉijare. Lia forpaso estas perdo por la artistaj rondoj ne nur de Ĉinio sed ankaŭ de la mondo. Lia nomo estos konata kaj respektata de ĉiam pli multaj homoj. Oni eterne memoros tiun bonkoran kaj firman maljunulon.

*\* La verkinto estas lernanto de sinjoro Li Kuchan kaj lerta en pentrado de ĉinstilaj homfiguroj.*



## Enciklopedieto de Ĉinio

# LA 24 SUNPERIODOJ DE ĈINIO

de LI QIANG

**E**N la sama rubriko de la lasta numero ni prezentis la ĉinan tradician kalendaron. Ĉi-numere ni konigu pri la 24 sunperiodoj, unu el la ĉefaj konsistigaĵoj de la ĉina kalendaro.

La 24 sunperiodoj estas difinitaj en la resumo de spertoj fare de la ĉina laboranta popolo en konado de la klimato dum ĝia agrikultura produktado kaj estas ankaŭ kreitaj de la prapatroj de la ĉina nacio pri sezondivido. Ili spegulas la leĝon de la alterno de sezonoj kaj ŝanĝiĝo de vetero kaj striktan rilaton inter ili kaj agrikulturo. Tial de miloj da jaroj la ĉinaj kamparanoj bone konas la 24 sunperiodojn. Ili povas ne nur bone memori ilian ordon, sed ankaŭ lerte aranĝi siajn terkulturajn aktivadojn laŭ la ŝanĝiĝo de vetero.

Estas malsamaj opinioj pri la tempo de kreiĝo de la 24 sunperiodoj. Efektive ili ne kreiĝis samtempe, sed kompletigis en longa agrikultura produktado. Laŭ antikva literaturo, frue en la Periodo Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj antaŭ 2 400 jaroj, Ĉinio jam difinis kelkajn ĉefajn sunperiodojn montrantajn varmon kaj malvarmon en la kvar sezonoj. Tiam oni starigis vertikalan stangon sur la tero por mezuri longecon de la ĵetita ombro, kaj per tio oni determinis la Vintran Solsticon (la ombro estas plej longa), Someran Solsticon (la ombro plej mallonga), la Printempan kaj Aŭtunan Ekvinoksojn (inter la plej longa

kaj mallonga ombroj) kaj aliajn kvar punktojn de la Printempokomenco, Somer-komenco, Aŭtun-komenco kaj Vintro-komenco. La supre menciitaj ok punktoj dividas la jaron en ok fundamente egalajn tempodaŭrojn, tiel fiksiĝis la tempodaŭro de la kvar sezonoj de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. Tio estis tre bezonata siatempe por agrikultura disvolviĝo. Ĉina antikva filozofo Xunzi (313-238 a.K.) parolis pri printempa plugado, somera sarkado, aŭtuna rikoltado kaj vintra konservado. Li emfaze montris, ke se oni tiel faras, rikoltaĵo fariĝas superabunda.

Kun la socia progreso, la agrikultura produktado fariĝis pli kaj pli komplika. Konforme al la bezono de la produktado kompletigis la 24 sunperiodoj de la jaro jam antaŭ 2 100 jaroj. En la libro “Huaj Nan Zi” verkita en la tempo de la Okcidenta Handinastio (137 a.K.) oni registris la kompletajn 24 sunperiodojn de la jaro, tio estas la plej frua skribo pri la 24 sunperiodoj. La ordo de la 24 sunperiodoj en la libro estas tute konforma al la nuna kaj oni klare difinis 15 tagojn kiel unu periodon.

La 24 sunperiodoj kun printempo, somero, aŭtuno kaj vintro kiel cirklo estas spegulo de la revoluo de la terglobo ĉirkaŭ la suno, tial ĝi apartenas al sunkalendara sistemo en la agrikultura kalendaro. Rigardate laŭ la vidpunkto de astronomio la sun-

periodoj estas difinitaj laŭ la pozicio de la suno sur la ekliptiko. Oni dividas la ekliptikon en 360 gradojn, kaj nomas la du punktojn kie la ekliptiko kruciĝas kun ekvatoro la printempa kaj aŭtuna ekvinoksoj. La printempa ekvinokso estas 0° de la ekliptika longitudo kaj la aŭtuna ekvinokso 180°. La tuta ekliptiko dividiĝas en 24 malgrandajn partojn, ĉiu kun 15 gradoj, kaj la 24 dividpunktoj inter la partoj estas la 24 sunperiodoj, kies datoj fundamente fiksiĝis en la suna kalendaro kun diferenco de maksimume unu tago inter jaroj. Sed en la agrikultura kalendaro la datoj de sunperiodoj ne estas fiksitaj kaj je multaj tagoj diferencas inter jaroj.

La 24 sunperiodoj estis kreitaj kaj uzataj unue en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero kaj disvastiĝis poste al diversaj lokoj de la lando, tial ili havas pli striktan rilaton kun la klimato kaj terkulturaj aktivadoj en tiuj lokoj. Ĉi-sube ni koncize prezentu la 24 sunperiodojn.

Printempo-komenco (4. aŭ 5. de februaro laŭ la suna kalendaro): En tiu tago finiĝas vintro kaj komenciĝas printempo kaj la vetero fariĝas pli kaj pli varmeta.

Printempa Pluveto (19. aŭ 20. de februaro): Post la Printempo-komenco pli kaj pli abundas pluvokvanto kun varmiĝo de la vetero.

Insekto-vekiĝo (6. aŭ 5. de marto): Printempa tondro vekas insektojn vintrodormantajn. Tiam la temperaturo fariĝas pli kaj pli alta, la grundo elfrostiĝas kaj printempa plugo komenciĝas.

Printempa Ekvinokso (21. aŭ 20. de marto): La tago meze de

la Printempo-komenco kaj Somer-komenco dividas printempon en du partojn.

Klaro kaj Brilo (5. aŭ 6. de aprilo): Post la Printempa Ekvinokso la ĉielo fariĝas hela, klimato varmeta kaj herboj verdiĝas.

Grenpluvo (20. aŭ 21. de aprilo): Rimarkinde plimultiĝas pluvoj, kio tre favoras al reverdiĝo de travintrintaj plantoj kaj al printempa semado.

Somer-komenco (6. aŭ 5. de majo): Komenciĝas somero.

Grajnoformiĝo (21. aŭ 20. de majo): Grajnoj de tritiko kaj aliaj someraj plantoj ekpleniĝas, sed ankoraŭ ne maturiĝas.

Grenspikiĝo (6. aŭ 7. de junio): Tritiko, hordeo k.a. ekhavas aristojn, komenciĝas rikoltado de someraj grenoj kaj semado de aŭtunaj plantoj.

Somera Solstico (22. aŭ 21. de junio): Venas varma somero. La tagdaŭro estas la plej longa, sed post la dato ĝi mallongiĝas.

Modera Varmo (7. aŭ 8. de julio): Post la Somera Solstico la temperaturo fariĝas ĉiam pli alta, sed ankoraŭ ne estas la plej varma tempo.

Varmego (23. aŭ 24. de julio): La plej varma tempo de la jaro.

Aŭtun-komenco (8. aŭ 7. de aŭgusto): En tiu tago komenciĝas aŭtuno.

Varm-retiriĝo (23. aŭ 24. de septembro): Finiĝas varmegaj tagoj kaj la temperaturo fariĝas pli kaj pli malalta.

Blanka Roso (8. aŭ 7. de septembro): Post la Varm-retiriĝo la temperaturo rapide malaltiĝas, nokte la vaporo en la aero fariĝas roso sur plantoj.

Aŭtuna Ekvinokso (23. aŭ 24. de septembro): Meze inter la Aŭtun-komenco kaj Vintro-komenco, la tago dividas aŭtunon en du partojn.

Malvarma Roso (8. aŭ 9. de oktobro): Malaltiĝas la temperaturo kaj multas malvarmaj rosoj.

Prujnofalo (24. aŭ 23. de oktobro): Pli kaj pli malvarmiĝas la vetero, kaj la vaporo sur la tero formas molan tavolon da glacieroj sur la plantoj kaj tero.

Vintro-komenco (8. aŭ 7. de novembro): Komenciĝas vintro.

Neĝeto (23. aŭ 22. de novembro): Post komenco de vintro malvarmiĝas la vetero kaj komencas fali neĝo eta.

Neĝego (7. aŭ 8. de decembro): Neĝo falas pli kaj pli dense kaj sur la tero akumuliĝas neĝamaso.

Vintra Solstico (22. aŭ 23. de decembro): Venas frosta vintro. En tiu dato la tago estas la plej mallonga, sed post tio ĝi fariĝas pli kaj pli longa.

Modera Malvarmo (6. aŭ 5. de januaro): Modere malvarma estas la vetero, ankoraŭ ne venas la plej frosta tempo.

Malvarmego (20. aŭ 21. de januaro): La plej malvarma tempo en la jaro.



# RILATOJ INTER ĈINIO KAJ ALIAJ LANDOJ EN LA ANTAŬA PERIODO DE TANG-DINASTIO

de BA HONG

## XUANGZANG EN PILGRIMADO OKCIDENTEN

Xuanzang bonziĝis en sia 13-jara aĝo kaj havis profundan konon pri budhismo. Ju pli multe li studis pri budhismo, des pli li trovis multe da demandoj malfacile solveblaj, tial li decidis iri al la budhisma naskoloko Hindio por studi.

Tiam la Okcidenta Regiono estis okupata de la antikva naci-malplimulto Tujue. Ankaŭ Tang-dinastio rigore gardis la okcidentajn trapasejojn, kaŭze de kio la peto de Xuanzang pri ellandiĝo estis rifuzita. Li, malgraŭ la longa vojaĝo kaj maloportuna trafiko, senhezite sin direktis al Hindio en 627 p. K. rajdante sur maljuna ĉevalo. Tra Liangzhou (la nuna Wuwei de Gansu-provinco) kaj Guazhou (la nuna Anxi) li eliris el la pasejo Yumen (interne de Anxi) kaj eniris en la senliman dezerton.


En la dezerto vidiĝis nek birdoj, nek bestoj, kaj ofte leviĝis ŝtormo. Survoje preskaŭ ĉie videblis skeletoj homaj kaj ĉevalaj, sed spite al tio Xuanzang iris antaŭen sentime. En la dezerto, li senatente renversis sian ledan akvosakon kaj la akvo tute elfluis el ĝi, sed li iris okcidenten

ankoraŭ plu. En la kvina tago li svenis pro soifego. Noktomeze malvarmeta vento vekis lin. Feliĉe, ke tie estis nemalproksime de oazo, lia ĉevalo portis lin al la akvofonto. Dank' al tio li rekonsciiĝis kaj post pliaj du tagoj li eliris el la dezerto kaj atingis Gaochang (oriente de la nuna Turpan de Xinjiang).

Kredis je budhismo ankaŭ la reĝo de Gaochang, dank' al kies helpo, Xuanzang akiris pliajn necesojn kaj daŭrigis sian vojon kun la ĉevalo kaj portistoj. Kiam li trapasis neĝ-kovritan

monton, lin trafis lavango. Es-kapinte el la danĝero, li atingis la urbon Suiye (en la norda parto de Kirgizio, Sovetunio). De tie li plu iris okcidenten kaj venis al la sudazia subkontinento. Tie li vizitis preskaŭ ĉiujn historiajn lokojn de budhismo kaj poste venis al la regno Magadha (en la sudo de la nuna Bihar, Hindio). Xuanzang lernis kvin jarojn en la templo Nalanda, la plej alta lernejo de budhismo en la loko, studis ĉiujn budhismajn sutrojn kaj fariĝis fama erudicia bonzo.

## SKEMA MAPO DE LA SILKA VOJO



- |             |               |             |
|-------------|---------------|-------------|
| 1. Xi'an    | 7. Kashi      | 13. Malur   |
| 2. Lanzhou  | 8. Loulan     | 14. Damghan |
| 3. Wuwei    | 9. Minfeng    | 15. Hamadan |
| 4. Dunhuang | 10. Hotan     | 16. Palmyra |
| 5. Turpan   | 11. Samarkand | 17. Bejruto |
| 6. Kuqa     | 12. Barhaj    | 18. Antakya |



La reĝo Rajaputra Siladitya (590-647) akceptis lin kaj diris, ke li delonge informiĝis, ke en la nordoriento estas granda lando, en kiu estas brava princo Qin. Xuanzang diris al la reĝo, ke la granda lando estas Tang-imperio kaj la princo estas Li Shimin, kiu fariĝis ĝia imperiestro. Li rakontis al la reĝo ankaŭ pri la politiko, ekonomio, kulturo k. a. de Ĉinio. Ĝoje aŭskultinte lian rakonton, la reĝo petis Xuanzang fari prelegon, kiun ĉeestis 6 000-7 000 bonzoj kaj laikoj.

En 643 Xuanzang adiaŭis la reĝon Rajaputra Siladitya kaj revenis al Chang'an, la ĉefurbo de Tang-dinastio, kiun li forlasis antaŭ 18 jaroj, kunportante 657 budhismajn librojn. Li raportis al la imperiestro pri sia okcidenten-pilgrimado. La imperiestro tre ĝojis kaj akceptis lin en Luoyang. Poste Xuanzang ĉinigis 75 budhismajn librojn, en 1335 volumoj. Li ankaŭ verkis la libron "Vojaĝo de la Granda Tang al la Okcidenta Regiono", kiu estas grava materialo por esplori la antikvajn historion kaj geografion pri Hindio, Nepalo, Pakistano, Centra-Azio kaj aliaj lokoj. La verko estas grava ankaŭ por arkeologio.

Inter la ĉinoj vaste cirkulas legendoj pri la okcidenten-pilgrimado de Xuanzang. La Ming-dinastia verkisto Wu Cheng'en (ĉ. 1500-1582 p. K.) adaptis ilin al mita romano "Pilgrimado al la Okcidento". La herooj de la romano Xuanzang, liaj magie lertaj disĉiploj Sun Wukong, Zhu Bajie kaj Sha Heshang venkis survoje demonojn kaj diablojn, kiuj baris al ili la vojon, trapasis danĝerajn montojn kaj riverojn kaj fine atingis la cellokon. La intrigo en la romano



*Xuanzang kaj liaj disĉiploj—herooj en la mita romano "Pilgrimado al la Okcidento"*

Ilustrita de QIAN XIAODAI

pri "Sun Wukong Ribelas kontraŭ la Ĉiela Palaco" estis adaptita al teatraĵo, pentrita filmo kaj pupteatraĵo. En la 11-a Internacia Pupteatra Festivalo okazigita en Jugoslavio en 1978, la Ĉina Pupteatra Trupo prezentis "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" en Esperanto.

### SENBARA "SILKA VOJO"

En la dua jarcento a. K. Ĉinio malfermis la faman "Silkan Vojon" kondukantan al la Okcidenta Azio. Post 800 jaroj la vojo fariĝis multe pli vigla. Tiam komercistoj, bonzoj, imamoj kaj nobeloj de la Centra kaj Okcidenta Azio venis al Ĉinio tra la "Silka Vojo" unuj post aliaj. Iliaj vestoj, manĝaĵoj, amuzaj kaj sciencoj iagrade influis Ĉinion. La centraziaj dancoj rapide turniĝaj kaj saltaj vekis admiron ĉe ĉinaj rigardantoj. Multaj okcidentaj muzikistoj fariĝis palacaj muzikistoj de Tang-dinastio.

Tiam loĝantoj de Chang'an povis trinki persan alkoholaĵon kaj ĝui spinacon el Persio. Ankaŭ poloo ludata de la tiamaj ĉinoj estis enkondukita el Persio.

Ĉinaj silkajoj tiam estis valoraj en la Centra kaj Okcidenta Azio. Ankaŭ la desegnoj de la Centra kaj Okcidenta Azio aperis sur ĉinaj silkajoj, tio estis multfoje atestita de elterigitaj silkajoj.

La ĉina paperfarado estis enkondukita en Eŭropon pere de araboj.

La muziko kaj belarto de Hindio influis la skulpturon kaj freskan arton de Tang-dinastio. La freskoj kaj skulptaĵoj en la ŝtonkavernaro Dunhuang estis kunigaĵo de la ĉina kaj hinda artoj. Ĉe la "Silka Vojo" oni elterigis arĝentajn monerojn de Sasanido kaj orajn monerojn de Bizanca Imperio.



## Moro pri geedziĝo en Saudi-Arabio

**E**N Saudi-Arabio oni geedziĝas laŭ la volo de siaj gepatroj kaj perado de svatisto. Novedzo povas vidi sian novedzinon nur post la geedziĝa ceremonio. Kompreneble, kun la disvolviĝo de la epoko gejunuloj nun jam komencis rompi la malnovan tradician moron. Iuj junuloj havas rendevuon kun sia fianĉino antaŭ la geedziĝa ceremonio, tamen la rendevuo devas okazi nur hejme, post la gefianĉiĝo. Plejparto de la familioj ankoraŭ konservas la tradician moron pri geedziĝo.

Saudi-Araboj kutime nomas la fianĉigan tagon Tago de Posedo, tio signifas, ke en tiu tago la fianĉo ekposedas sian fianĉinon laŭleĝe. En la Tago de Posedo la familianoj de la gefianĉoj kunestas por festi la gefianĉiĝon.

La geedziĝa festo ordinare daŭras du semajnojn. Dum tiu tempo la parencoj, amikoj kaj najbaroj de la du familioj kune kaj libere kantas kaj dancas. Nur en la tri tagoj antaŭ kaj post la geedziĝa ceremonio, oni observas la tradiciajn morojn.

La aktivadoj de la geedziĝo, kiuj komenciĝas de la sesa tago antaŭ la geedziĝa ceremonio, konsistas el tri partoj, nome geedziĝa bonvenigo, okazigo de la ceremonio kaj gratulo al la geedzoj. En la lasta tago antaŭ la geedziĝa ceremonio, la novedzino devas ŝminki al si la harojn kaj ungojn kaj cetere ŝiaj parencoj kaj amikoj ĝoje sin amuzas. La geedziĝa ceremonio okazas en la hejmo de la novedzino, kiu portas blankajn ceremoniajn vestojn. En la vespero de la geedziĝa ceremonio la novedzino sidas en la seĝo meze de la ĉambro. Aro da virinoj kaj knabinoj ĉirkaŭas ŝin, svingas mantukojn, balancas ventumilojn kaj laŭte kantas glorkanton. En tiu nokto, akompanate de siaj parencoj kaj amikoj, la novedzino venas al la hejmo de la novedzo por vidi la bogepatrojn. En la sekvanta tago la familianoj de la novgeedzoj ankoraŭfoje kune festas, donas donacojn al la nov-

geedzoj kaj ankaŭ partoprenas en la geedziĝa festeno. Post la festeno la novedzino montras al la gastoj siajn doton kaj juvelojn.

Plej aparte estas en la moro, ke la gepatroj de la novedzino postulas de sia bofilo sumon da "antaŭpago" ĉe la geedziĝo. Se la edzino estos forlasita de sia edzo, ŝi do povos akiri la monsumon. Plejparto de la bogepatroj postulas de siaj bofiloj tiun monsumon antaŭ la geedziĝa ceremonio, malmultaj permesas pagi tiun sumon dum la eksedziniĝo, kaj ankaŭ iuj rezignas ĝin.

## Vestado de la jemena viro

En la Jemena Araba Respubliko, kiu sin trovas sur la bordo de la Ruĝa Maro, oni povas rimarki, ke la vestado de la jemena viro tute diferencas de tiu de aliaj arabaj landoj. Viro portas ĉe la talio larĝan ledan zonon, ĉe kies mezo fiksiĝas arkforma ponardo kun ligna ingo tegita per ledo kaj tenilo el polurita korno de bovo aŭ ŝafo. Iuj riĉuloj ornamas siajn ponardajn

---

## SENDITOJ DE JAPANIO VENIS AL ĈINIO KAJ BONZO JIANZHEN AL JAPANIO

Ekde la jaro 57 p. K. Japanio ekspe is senditojn al Ĉinio. Dum la regado de Sui-dinastio Japanio kvarfoje ekspedis al Ĉinio senditojn, studentojn kaj bonzojn, ankaŭ senditoj de Sui-dinastio vizitis Japanion. Post la fondiĝo de Tang-dinastio, dum 200 jaroj de 630 ĝis 838 p. K. Japanio 13-foje ekspedis al Ĉinio oficialajn senditojn, ĉiu-

foje almenaŭ 250 personojn kaj maksimume 500-600 personojn.

Tiam la japana ŝtata administra strukturo tre similis al tiu de Tang-dinastio. Kaj la ĉefurbo Heijokyo (la nuna Kioto) en Nara-periodo (710-784 p. K.) estis konstruita imite al Chang'an.

Legendo diras, ke la japana skribo-lingvo estis kreita de japanaj studentoj lernintaj en Ĉinio Kukai kaj Kibinomakibi. Kibinomakibi studis 17 jarojn en

la imperio Tang, li revenis al Japanio kunportante multajn kodojn kaj kronikojn de Ĉinio. Lia kunlernanto Abeno Nakamaro (lia ĉina nomo estis Chao Heng) poste fariĝis altranga ĉina oficisto, kiu vivis en Ĉinio pli ol 50 jarojn kaj mortis en Ĉinio en 770 p. K. Dum sia restado en Ĉinio Chao Heng havis profundan amikecon al la grandaj poetoj de Tang-dinastio Li Bai, Wang Wei kaj aliaj. En la parko Xingqing de Xi'an nun ankoraŭ staras steleo pri li.



*Tipe vestitaj viroj de la Jemena Araba Respubliko (la 1-a, 2-a, 4-a kaj 6-a de maldekstre)*

ingojn kaj tenilojn per belaj inkrustaĵoj el orfadenoj kaj arĝentpecoj.

La jemenanoj opinias, ke viro kun ponardo ĉe la talio aspektas pli forta kaj brava. Ĝi estas ankaŭ signo de maturiĝo de viro. Ĝenerale knaboj komencas porti ĝin en la aĝo de 14 aŭ 15 jaroj.

Krome la jemenaj viroj portas nacistilan jakon kaj blankan tubjupon aŭ ĉirkaŭas la parton de la korpo sub la talio per kolora

kvadratita juptuko aŭ kovras la tutan korpon per araba blanka robo kaj la kapon per kvadrata tuko.

Iafoje jemenaj viroj uzas ponardon kiel batalilon en interbatalo, tial oni difinas, ke viro kun ponardo estas malpermesita eniri en kinejon, teatron kaj aliajn publikajn amuzejojn. Se ili volas viziti tiujn lokojn, ili devas lasi ponardon hejme aŭ deponi ĝin provizore ĉe portisto. Malobservantoj de la difino estos punataj.

Ankaŭ nemalmultaj ĉinoj en Tang-dinastio veturis al Japanio, inter ili la plej fama estis la bonzo Jianzhen (688-763 p. K.). Li estis bonzo de la templo Daming en Yangzhou, invitite de la japanaj budhistaj rondoj li sin preparis por veturi al Japanio en 743. Sed li malsukcesis kvinfoje en mara veturado dum la postaj 12 jaroj. En la kvinafoja veturado lin trafis ŝtormo kaj la ŝipo floris 14 tagnoktojn surmare, fine li atingis la insulon Hainan, kaj pro tio li blindi-

ĝis. Tamen li ne deprimiĝis kaj en 754, en la sesafoja veturado, li atingis Japanion en sia 67-jara aĝo.

Jianzhen portis al Japanio budhismajn sutrojn, predikis tie budhismajn sutrojn, predikis tie budhismajn sutrojn (unu el la ĉinaj budhismaj sektoj) kaj konigis al japanoj multajn ĉinajn drogherbojn. Sub lia projektado kaj direktado oni konstruis en Nara la templon Toshodai kaj skulptis budhajn statuojn. Kaj per tio li disvastigis en Japanio la arkitekturon kaj skulpturon

Iafoje jemenanoj duope, triope aŭ plurope dancas svingante ponardon por sin amuzi.

## La plej granda torto en la mondo

La plej granda torto en la mondo estis en formo de delikata pagodo, kiu kun baza diametro de 7 metroj altas je 11.4 metroj kaj havas 40 tavolojn. Ĝi estis preparita por la geedziĝa ceremonio de danlanda grandaĝulo, agento de iu vojaĝa servo, kaj lia juna bela sekretariino.

Ĉiuj, kiuj vidis la torton, senescepte montris grandan admiron. Tamen iuj, ekzemple direktoro de iu eldona kompanio, kiu ĉiujare eldonas "Jarlibron pri Diversaj Mondaj Rekordoj", ne kredis tion. Post kiam li propramane mezuris la torton kaj propraokule vidis, kiel kuiristoj ornamas la supron de la torto starante sur ŝtupetaro, li pretervole laŭdis: "Kia giganta torto!" Li enlistigis ĝin en la tiujaran "Jarlibron pri Diversaj Mondaj Rekordoj".

Bedaŭrinde, oni ne fotis interesan scenon kiel la novedzo kaj novedzino distranĉis la torton kaj regaligis per ĝi la gastojn dum sia geedziĝa festo.

de Tang-dinastio. Li pasigis en Japanio siajn lastajn jarojn kaj estis entombigita en la templo. Por memori pri li liaj disĉiploj skulptis lian sidan statuon, kiu nun ankoraŭ estas konservata en la templo.

En Tang-dinastio Ĉinio havis amikajn kontaktojn ankaŭ kun Koreio, Nepalo, Persio, la Orienta Romana Imperio, la sudorienta Azio, sudazia subkontinento kaj aliaj landoj kaj regionoj.

# PRI VIZITO AL JUGOSLAVIO

de XIAO XUESHENG

**P**OST 15-hora flugado per aviadilo Boeing 707 nia sporto-jurnalista grupo kun ses membroj atingis la aerodromon de Belgrado. Laŭ la invito de la Jugoslava Sporta Asocio nia grupo faris unusemajnan viziton en Belgrado, Sarajevo kaj Zagrebo.

Estis unuaj tagoj de somero kaj la vetero en Belgrado estis agrable malvarmeta. Veturante al hotelo en la malnova Belgrado, ni preteriris la novan urbon. Oni diris, ke tie estis marĉejo antaŭe. En printempo de 1948 la unua taĉmento de junaj volontuloj vekis la dormantan dezerton. Nun antaŭ ni prezentiĝis moderna urbo loĝata de 170 miloj da homoj. Sur la vasta tero harmonie lokiĝas freškoloraj loĝdomoj, hoteloj kaj oficoj en malsamaj stiloj, kaj la interspacoj estas tapiŝitaj de gazonoj, arbedoj kaj floroj. Jen la unua bela impreso pri Jugoslavio.

La sekvantan tagon nin akceptis kamarado Dj. Perišicem, sekretario de prezidantaro de la Jugoslava Sporta Asocio. Li, alta kaj fortika, okupis sin per naĝado kaj akvopilado 25 jarojn kaj estis elstara golulo de la Jugoslava Akvopilka Teamo. Li bone scias la jugoslavajn sportajn organizojn kaj iliajn aktivadojn. Parolante pri la 14-aj Vin-

traj Olimpikoj okazantaj en Jugoslavio, kamarado Perišicem diris kun ĝojo: "Ni faris grandan penadon por la Olimpikoj. Se nun ne estus varma somero, la konkursoj ja povus esti okazigitaj." Viziti la instalaĵojn por la Vintraj Olimpikoj nature fariĝis unu el la ĉefaj eroj de nia vizito.

Sarajevo estas la ĉefurbo de la Bosnia-Hercegovina Respubliko. De kiam Ĉinio prezentis la jugoslavan filmon «Valto defendas Sarajevo», la heroa urbo pli ol dek mil kilometrojn for de Ĉinio fariĝis tre konata por ĉinoj. Ankaŭ ni sentis apartan intimecon al tiu urbo.

Sarajevo estas brakumita de montoj kiuj estas kovritaj de neĝo de novembro ĝis aprilo de la sekvanta jaro, kaj tial la loko estas ideala skiejo. Antaŭ kvar jaroj, kiam la Internacia Olimpika Komitato decidis okazigi la 14-ajn Vintrajn Olimpikojn en Sarajevo, Jugoslavio tuj komencis la preparadon. La Vintraj Olimpikoj okazos 7-21 de februaro de 1984. Por elekti la plej taŭgan daton por la Olimpikoj, la koncerna departemento de Jugoslavio atente konsultis materialojn pri la meteo de Sarajevo dum la pasintaj cent jaroj.


Tuj atinginte Sarajevo, nin kaptis varma atmosfero de preparado por la Olimpikoj. Sur la

afiŝotabuloj ambaŭflanke de la ĉefaj stratoj estas okulfrape pentrita la emblemo de la Olimpikoj: lupo multe pli naiva kaj ĉarma ol la vera. Butikoj vendas propagandilojn kaj memoriĝaĵojn pri la Olimpikoj. La olimpika vilaĝo por sportistoj jam estas preta, kaj hoteloj por diverslandaj spektatoroj estas en streĉa konstruado. Kamarado de la Organiza Komitato de la Olimpikoj informis nin, ke 80 landoj anoncis sin por la konkursoj, kaj estas malfacile antaŭkalkuli la totalan nombron de vizitantoj, kaj ili sin preparas por akcepti cent mil gastojn. Por ilin enloĝigi oni utiligos studentajn loĝejojn kaj privatajn vilaojn en la antaŭurbo.

La Vintraj Olimpikoj konsistos el 16 konkursoj. Ni rigardis konkursejojn por rapida sketado, arta sketado, skiado kaj sledado, kiuj estas konstruitaj rigore laŭ internaciaj normoj.

La konkursejo por sledado situas sur la monto Trebevic, 15 kilometrojn for de la urbo. Kamaradoj Rakoviĉ kaj Edi alterne veturigis turisman aŭton por tien nin porti. Ni veturadis laŭ ŝoseo en senlima arbaro kaj vidis longan sledvojon el armita betono. La vojo longa je 1 260 metroj kaj alta je 110 metroj havas 13 ĝirejojn. La konstruado de la vojo kaj ĝiaj akcesora-

joj daŭris unu jaron. En vintro de la pasinta jaro oni okazigis tie la Eŭropan Ĉampionecon Sledkonkurson, kiu pruvis la bonan kvaliton de la konstruaĵo. Nun oni kontrolas la instalaĵojn kaj beligas la medion. Ĉe la fino de la glitvojo staras ligna etaĝdomo kun ruĝa pinta tegmento. Laŭ la invito de juna teknikisto ni vizitis ĝin. La domo servas kiel la centralo por sledkonkurso. Tie oni instalas oficejon, ripozejon, drinkejon, disaŭdigan stacion kaj televidan observejon. En la observejo estas 20 televidiloj. La junulo ŝaltis la televidilojn kaj ni tuj vidis sur la ekranoj klarajn bildojn pri la startpunkto, ĝirejoj kaj fino de la sledvojo. En la pasinta vintro la Eŭropa Sledkonkurso estis telesendita al la tuta Eŭropo.



*La Igman-a skiejo en Sarajevo, nove konstruita por la Vintraj Olimpikoj*

Por la preparado de la Olimpikoj Jugoslavio investis 130 milionojn da usonaj dolaroj. Kamarado Rakoviĉ diris, ke la mono estis ofere donita de la respublikoj de Jugoslavio kaj privatuloj. La Organiza Komitato faris orajn kaj arĝentajn medalojn por la monoferintaj individuoj. Estas admirinde, ke Jugoslavio, kiel nealiancita lando, povas okazigi tiel grandan sportkunvenon.



*Kamarado Dj. Perišićem (la tria de dekstre) kaj la ĉina sporto-ĵurnalista grupo*

Aparte menciinde estas, ke dum la preparado la koncernaj departementoj de la Bosnia-Hercegovina Respubliko aktive mobilizis la amasojn al vintra sportado. La Labororganizo pri Eldonado kaj Presado de la Ĵurnalo «Liberiĝo», la plej granda ĵurnalisma institucio de la respubliko, eldonis diversajn librojn por propagandi la Vintrajn Olimpikojn kaj la utilojn de vintra sportado. En la pasintaj kelkaj jaroj ĝi donacis al lernantoj ĉiujare 1 000 paroĵojn da skioj.

Nun skiado viglas ĉe ĉiuj skieblaj montoj en tiu ĉi respubliko. La gastiganto diris al ni kun memfido, ke post dek jaroj la entuziasmo de la popolo por skiado superos tiun por futbalo.

La jugoslava registaro tre akcentas disvolvon de amasa sporta aktivado. En la lando kun 22 milionoj da loĝantoj troviĝas pli ol 9 000 diversaj sportaj kluboj kaj kvarono de la civitanoj

ofte partoprenas en sportaj konkursoj kaj ekzercadoj.

La sporta asocio Ruĝa Stelo de Belgrado, konsistanta el 19 kluboj futbala, korbopilka k. a., estas unu el la plej influaj sportaj organizaĵoj en Jugoslavio. En la stadiono Ruĝa Stelo ni vidis ĝian direktoron kamaradon Petroviĉ. Ni sciigis de li, ke la asocio Ruĝa Stelo havas preskaŭ milionon da membroj, kaj la nombro de subtenantoj estas pli granda ol tiu de la membroj. Ĉiuj kluboj sub la asocio havas sian aktivejon, kaj la stadiono Ruĝa Stelo estas sportejo de la futbala klubo Ruĝa Stelo. La stadiono kun 105 000 sidlokoj estas la plej granda en Jugoslavio kaj la tria granda en Eŭropo. Tie ofte okazas eŭropaj futbalaj matĉoj. Por levi la teknikon de futbalo, la futbala klubo Ruĝa Stelo fondis, krom la profesia teamo, ankaŭ teamojn por junuloj, knaboj kaj infanoj. Tio ne nur disvastigis la futbalan sporton, sed ankaŭ kreis favorajn

kondiĉojn por kulturi kaj selekti bonajn sportistojn. De post sia fondiĝo en 1945, la klubo gajnis 14-foje landan ĉampionecon kaj 10-foje la Pokalon de Prezidento Tito. Laŭ la nombro de partopreno en eŭropaj futbalaj matĉoj, la klubo okupas la kvaran lokon inter la potencaj futbalaj teamoj de Eŭropo. En la klubo konserviĝas pli ol 500 diversaj pokaloj.

Dum rakontado de kamarado Petroviĉ, nia taksisoforo kamarado Neškoviĉ plurfoje intervenis en la parolon. Evidente li estas aktivulo en sportado. Pere de kamaradoj de la sporta asocio ni esprimis la deziron viziti lin en lia hejmo, se oportune por li. Konsento estis senhezite donita.

Antaŭvesperon de nia hejmenreveno, Neškoviĉ veturis al ni por porti nin al sia hejmo. Li vivas kune kun siaj frato kaj emerita patrino, kaj lia okmembra familio vivas en harmonio. Tie ni sentis nin neniom ĝenataj

kaj en la gastoĉambro ofte eksplodis gaja ridado.

Neškoviĉ diris al ni, ke triono de la tri mil ŝoforoj de la taksikompanio, kie li laboras, ŝatas sporton. Ili ofte okazigas sportajn konkursojn inter ŝoforoj de diversaj urboj. Antaŭ nelonge li partoprenis en la internacia ŝaka konkurso okazigita por taksisoforoj de Jugoslavio, Italio k. a., kaj la Belgrada teamo, al kiu li apartenis, gajnis la duan lokon. Kaj krome li ŝatas ankaŭ naĝadon, bokson kaj tablotenison. Li iras naĝi dufoje ĉiusemajne. Montrante la specimenojn de krabo kaj pektenkonko sur la muro de la gastoĉambro, li diris humore: "Ili ja estas trofeoj akiritaj de mi dum mia naĝado en maro." Influate eble de Neškoviĉ, liaj du filinoj tre ŝatas naĝi, kaj eĉ lia 3-jara nevo estas tre entuziasma por futbalo kaj bokso.

La tempo pasis nerimarkite. Ĉe adiaŭo la mastro donacis al ni memoraĵojn, inter kiuj troviĝis paro da ŝuetoj delikate faritaj el bluaj, blankaj kaj ruĝaj fadenoj. Neškoviĉ diris, ke ili estas kreaĵoj de lia patrino. Ni estis kortuŝitaj de ŝia amikeco al ni kaj esprimis al ŝi koran dankon kaj bondezirojn.

Finiĝis la unusemajna vizito. Adiaŭante la ĉarman landon kaj la entuziasman popolon, mi sentis ian mankon. Kiel raportisto de Esperanta gazeto, mi tre volis renkonti tie esperantistojn. Pro tio, ke la vizitado daŭris nur unu semajnon kaj la tagordo estis tre streĉaj, mia deziro ne realiĝis kaj mi kun bedaŭro forlasis la landon. Sed tamen mi kredis, ke venos tempo, kiam mi renkontiĝos kun jugoslavaj esperantistoj. Jes, certe!

*Gastado en la hejmo de kamarado Neškoviĉ*



# RENKONTE AL LA NOVA JARO

## ABONVARBA KAMPANJO por EL POPOLA ĈINIO



Ekde 1-a nov. 1983 ĝis 28-a feb. 1984

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum tiu periodo de la kampanjo, ĝuos 20% da rabato kaj senpage ricevos Esp. koloran kalendaron por 1984.

1 jaro (12 n-roj)	£4.00	US\$ 6.00	post	=£3.20	US\$ 4.80
2 jaroj (24 n-roj)	£6.50	US\$10.00	rabatado	=£5.20	US\$ 8.00
3 jaroj (36 n-roj)	£9.00	US\$14.00		=£7.20	US\$11.20

*Atentigo: La supra tarifo ne validas por Japanio. Abonantoj kaj reabonantoj tie bonvolu atenti EPC-anoncon en sialandaj Esp.-periodaĵoj aŭ sin turni al la loka peranto.*

## Memoraĵoj por abonvarbantoj

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPC. La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto kun peto, ke la lasta enskribu lin aŭ ŝin kiel abonvarbanton. Aŭ oni sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al ties akirita sukceso.

*Tamen, ne forgesu aboni aŭ reaboni por vi mem!*

**PROSPEKTON KAJ PROV-EKZEMPLERON ONI SENDOS SENPAGE LAŬ PETO**

Esperanta Sekcio de CENTRO DE ĈINAJ ELDONAĴOJ

(GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# BRITA REĜA BALET-TRUPO EN ĈINIO



*La baletoj "Dormanta Belulino" prezentita de la Brita Reĝa Balet-trupo en Pekino*

**E**N la flora majo la Brita Reĝa Balet-trupo veturis al Ĉinio por turneo. La brila prezentado de la baletistoj el la hejmlando de Ŝekspiro estis varme akceptata kaj alte taksata de la ĉinaj spektatoroj kaj vekis ĉe la ĉinaj baletistoj grandan interreson.

La britaj baletistoj prezentis en Ĉinio la baletojn "Dormanta Belulino", "Sketistoj", "Monato en la Kamparo", "Konĉerto" kaj

"Bajadero". Ili prezentis en la urboj Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono entute 19-foje. La teatroj, kie ili prezentis baletojn, ĉiuj estis plenplenaj de rigardantoj. Por akiri bileton iuj atendis tute nokte ĉe la teatra enirejo aŭ ĝiĉeto. Nemalmultaj el la rigardantoj speciale veturis de aliaj provincoj kaj urboj por spekti la britan baleton. Ĉiufoje, kiam finiĝis la prezentado, aŭdiĝis tondra aplaŭdo kaj la baletistoj devis foje refoje esprimi sian

dankon al la spektatoroj. Post la fino de ĉiu prezento rigardantoj kolektiĝis en la korto de la teatro por peti la aktorojn skribi sian nomon. Tiaj emociaj scenoj ĉiam estas memorindaj en la historio de la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Britio.

## ARTO DE BELO

La prezentado de la Brita Reĝa Balet-trupo estas unuakla-



sa. La belo de iliaj muziko, danco kaj koloro multe ĝuigis la ĉinajn spektatorojn.

Jen belaj, facilaj kaj precizaj movoj, lertaj saltoj, rapidaj kaj variaj turniĝoj, novaj malfacilaj levoj kaj vivaj plastikaj pozoj. Kiel malfacile ludi tiajn dancojn sento-riĉajn!

La Brita Reĝa Balet-trupo trapasis malfacilajn jarojn, senĉese levas sian artan nivelon en kuraĝa arta praktiko kaj havas nombron da eminentaj aktoroj, dramistoj kaj reĝisoroj. Dum la pasintaj 50 jaroj ĝi vizitis multajn landojn kaj ĝuas internacie bonan renomon. Tamen ĝi ne haltis antaŭ la atingitaj sukcesoj kaj ĉiam sin perfektigas per ekzercado. Kiam la britaj baletistoj vivis en Ĉinio, la unua tasko sur ilia tagordo estis ekzercado. En tio ne estis escepto eĉ por Marguerite Porte, kiu ludis heroinon en "Dormanta Belulino", kaj David Wall, kiu ludis la rolon de la reĝido en la sama dramo. Inter ili estas multaj steloj ĝuantaj internacian reputacion. Iuj el ili estas jam mezaĝaj kaj baldaŭ forlasontaj la scenejon, tamen ili sin ekzercas senĉese kaj serioze. Neniu scias, kiom da varmaj kaj malvarmaj tagoj ili travivis en ekzercejo kaj kiom da paroj da baletŝuoj ili eluzis. En ekzercado sangis iliaj piedfingroj kaj traŝvitiĝis iliaj vestoj. Ĝuste kiel diris Ulanova, baletistino-majstrino de Sovetunio: "Baletto estas arto kruela, sed plej bela."

### INTERŜANĜO DE DANCARTO

Dum la turneo en Ĉinio la britaj baletistoj plurfoje interŝanĝis dancarton kun siaj ĉinaj kolegoj. En la vespero kiam la britaj baletistoj atingis Ŝanhajon, blovis 8-gradaj tajfunoj kaj torentaj plu-



*Chen Muhua, membro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, akceptas ĉefludantojn de la trupo.*

vegis en fulmotondro. Malgraŭ tio la britaj artistoj veturis al la luma ekzerca halo de la Ŝanhaja Baleta Trupo. La gastoj unue rigardis prezentadon de ĉinaj dancistoj. Dum la rigardo ili havis grandan intereson kaj donis aplaŭdojn al la lerta salto en la triopa danco "Perlo en la Maro", la mildaj kaj energiaj dancmovoj en la duopa danco "La Korsaroj", la melankoliaj rigardoj en la danc-solo "La Morto de la Cigno" kaj la harmonia kunago en la baletto "La Cervo Turnis Sian Kapon". La prezento de la ĉina dancistino Wang Qifeng en la duopa danco "Donkiĥoto" kaj tiu de la angla dancistino Merle Park en la duopa danco gajnis laŭdon de la baletistoj de la du landoj. Wang Qifeng faris korpe horizontalan pozon sur piedpinto sinsekve en tri fojoj, kio vekis ĉe la britaj baletistoj aklamon kaj longan aplaŭdon. Merle Park ravis per sia lerta prezento la rigardantojn. En la sino kaj la brakoj de la kundancanto Wayne Eagling ŝi faris serion da malfacilegaj movoj, kaj bone reaperegis kna-

binon en la sceno de arda amoro ĝis la morto.

Reveninte al Britio, Merle Park funkcios kiel estro de la Brita Reĝa Balet-lernejo. Dum sia restado en Ĉinio ŝi plurfoje vizitis la balet-lernejojn en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono kaj tie lekciis. Ŝi diris: "La vizito bone impresis min. Bone studas viaj estontaj baletistoj. La lernejo garantios liveron de aktoroj al la baletaj trupoj, por heredi la klasikan tradicion kaj disvolvi la nacian stilon." Ŝi kaj Claus Moser, prezidanto de la direktora komitato de la Reĝa Operejo kune proponis ke Ĉinio kaj Britio interŝanĝu balet-studentojn.

### ETERNA AMIKECO

Norman Morrice, estro de la reĝa balet-trupo, kiel aktoro vizitis Ĉinion antaŭ pli ol 20 jaroj, sed la ĉi-foja vizito donis al li freŝajn impresojn ĉiutage. Li diris: "En la moderniga konstruado, Ĉinio neniam malstreĉis sian penadon por konservi siajn antikvajn tradiciojn kaj energie disvolvas la grandajn spiritojn

## KLARAJ FOTOJ FARITAJ DE ĈINA ARTSATELITO

Fotoj faritaj de la scienc-teknika eksperimenta satelito lanĉita de Ĉinio jam estas vaste aplikataj en scienca esplorado, produktado kaj konstruado, inkluzive de prospektorado de nafto, enketo de tertremo kaj geologio, mezurado de maro kaj marbordoj, ekzamenado de havenoj kaj navigvojoj, mezurado kaj desegnado de mapo kaj topografio kaj pririgardado de antikvaj restaĵoj.

En la pasinteco oni bezonis multe da jaroj por prospektori mineralojn kaj nafton en vasta minregiono. Uzante la telesensajn materialojn

donitajn de la satelito, oni povas unue fari grandarean ĝeneralan esploradon por konigi al si la tuton kaj poste fari detalan ekzamenon en la gravaj lokoj, dank' al tio blindeco kaj unuflankeco povas esti evititaj kaj la homfortoj, materialoj kaj mono multe ŝparitaj.

La artsatelitaj fotoj pri tertremo kaj geologio estas klaraj kaj la donitaj informoj abundaj. Kiam oni uzis tiujn fotojn en analizado de faŭlta strukturo en la regiono de Pekino, oni trovis, ke la efiko estas bona.

Dank' al la uzado de tiuj fotoj, la koncernaj departementoj havis klaran scion pri la leĝoj de la movado de ŝlimofluo en la Flava Rivero kaj la riveroj Luanhe kaj Haihe kaj pri iliaj interrilatoj.

## SURROKAJ BILDOJ DE PRIMITIVAJ PASTISTOJ EN LA REGIONO ALTAJO

En la pasintaj du jaroj ĉinaj arkeologoj trovis en la regiono Altaĵo, Xinjiang, surrokajn bildojn faritajn de primitivaj paŝtistoj. El ili oni povas koni la nomadan vivon antaŭ pli ol mil jaroj.

Inter la centoj da bildoj, iuj estis ĉizitaj, dum aliaj pentritaj per okro. La bildoj videblas en paŝtejoj kaj mezalta aŭ malalta regiono de Altaĵo, ambaŭflanke de valoj, en montkavernoj kaj sur krutaĵoj proksime al la montvojoj. Iuloke troviĝas impona kolekto de surrokaj bildoj.

La donitaĵoj pruvis, ke tiuj bildoj estis faritaj de paŝtistoj saĥuĝe-aj, hunaj, tuĝue-aj kaj mongolaj.

de la ĉina nacio.” Parolante pri la sukcesa prezentado, li diris, ke antaŭ ĉio li devas danki la orkestrojn de la Pekina kaj Ŝanhaja Balet-trupoj pro ilia bonega akompano kaj la ĉinajn scenejajn laborantojn pro ilia brila kunlaboro.

La intimaj rilatoj estis jam komencitaj de la maljuna generacio de ĉinaj kaj britaj baletistoj. Margot Fonteyn de la reĝa balet-trupo estis plej brila baletistino. Ŝi studis baleton iam en Ŝanhajo. Nun maljuna, ŝi vivas en sia vilao idilian vivon. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi veturis al Ŝanhajo kaj, akompanate de ĉinaj amikoj, ŝi rigardis la apartamenton antaŭe loĝatan de ŝi kaj la malnovan sidejon de la teatro Lanxin, kie ŝi prezentis baleton. La vojaĝo al la malnovaj lokoj esprimis ŝian sopiron al la ĉina popolo.

La muzika direktanto de la reĝa baletto Ashley Lawrence laŭdis, ke la ĉina orkestro ludis serioze, ĝiaj membroj estas talentaj. Li diris kun emocio: “Estas granda perdo por muzikisto plurmonata forlaso de muzikilo, sed post dekjara kaoso (la kultura revolucio inter 1966 kaj 1976), vi ankoraŭ havas sian nivelon. Vi memoras eĉ iujn detalojn kiam mi trejnigis la orkestron en la pasinta jaro. La kunlaboro kun la ĉina orkestro profundigis nian interkomprenon kaj amikecon. Tio estas valora rikolto.”

Estas hazarde, ke la tago, en kiu la Kultura Buroo de la Provinco Guangdong faris adiaŭan festenon al la britaj gastoj, koincidis kun la datreveno de la naskiĝtago de la brita reĝino Elizabeta la Dua. Tiam gaja atmosfero regis en la halo. En la fes-

teno ĉiuj ĉeestantoj tostis por Kenneth MacMillan, majstro-koregrafo de la trupo, kiu tiutage ricevis titolon de “Lordo de la Reĝ-Familio”.

La membroj de la Brita Reĝa Balet-trupo ĉiuj unufoje vizitis Ĉinion. Ili opiniis ke la longe dezirata vizito estas neforgesebla por la tuta vivo. Ĉiuj britaj gastoj adiaŭis Ĉinion kun bedaŭro. Lesley Collier, varme premante la manon de ĉina amiko, diris: “Nia turneo en via lando estis mallonga, tamen nia amikeco ekzistos por ĉiam.”



JEN APERIS, POST «RAKONTOJ PRI AFANTI»,  
ALIA SAME INTERESA LIBRETO TAŬGA KIEL  
POSTKURSA LEGAĴO:



# SAGŌ-SAKO

Ĉinaj Popolaj Rakontoj

Ĝi enhavas 14 mallongajn rakontojn pri Balagenca (Mongolo), Agu Dumba (Tibetano), Hoĝa Nasar (Kazaĥo), Aldil Kusa (Kazaĥo) kaj Buho (Jaŭo). Ĉiuj estas interesaj kaj montras la saĝecon de la herooj.

Esperantigita de Fan Yizu  
Polurita de Geoffrey Sutton  
Ilustrita de Tian Yuan kaj Jin Ming

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo  
Numero: 10-Es-1778P

Formato: 11×18cm. 78pĝ.

Prezo: £0,50 US\$0,95

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Perantoj de EPC



aŭ: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN),  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Saluton, Harbin!

de LI PING

**U**NU el miaj amikoj estas komponisto. Li verkis kelkajn komponaĵojn pri somero de Harbin, kiuj vaste cirkulas kaj estas ofte ludataj en koncerto aŭ radio. Antaŭ ol mi forlasis Pekinon, mi renkontis lin. Informiĝinte, ke mi oficejoĝos al Harbin, li neniom kaŝis sian envidion. “Ĉi-jare mi ne povas viziti ĝin,” li diris kun vespiro, “transdiru mian saluton al Harbin.”

Irinte el la stacio mi tuj ekŝatis la urbon, kvankam mi ne povis klare komuniki miajn unuajn impresojn. Samkiel homo, ĉiu urbo havas sian propran karakteron. Nu, kio estas la karaktero de Harbin? Mi ne povas ĝuste eldiri, sed mi vere ekŝatis la urbon.

Harbin, ĉefurbo de Heilongjiang-provinco, situas ĉe la meza parto de Songhua-rivero. La formo de la provinco sur mapo similas al flugonta cigno, kaj la urbo Harbin figuras perlon sur la kolo de la cigno. Antaŭ 800 jaroj la loko estis vilaĝo nomata Arĝin kaj servis kiel politika centro de la nacieco Njuĝen, la prapatro de la manĉura nacieco. Post centoj da jaroj, en la komenca tempo de la nuna jarcento ĝi ekhavis la skalon de urbo.

Simile al arĝenta rubando, Songhua-rivero fluas malrapide de okcidente orienten, en la nordo de la urbo. La rivero kun

ĉefa navigvojo 4 metrojn profunda larĝas je 800-1 500 metroj en la urbo. Sur ĝi povas veturi ŝipo 1 500-tonela. En la urbo la jara navigperiodo daŭras ĉ. 205 tagojn, de la dua tagdeko de aprilo ĝis la unua tagdeko de novembro.

Estas plezurige promeni laŭ la rivero. Ĉe la suda bordo de la rivero kuŝas la parko Stalin, kie ĉarmas eksterordinare la neĝblankaj marmoraj skulptaĵoj akompanataj de arboj, gazonoj kaj florbedoj. Oni diris al mi ke antaŭe en la parkoj de la urbo estis nur dekelkaj skulptaĵoj, sed ĉi-somere la nombro jam superis 60. La skulptaĵoj troviĝas en parkoj, ambaŭflanke de stratoj kaj ĉe enirejoj de oficejoj kaj


lernejoj. Plejparto de la farintoj ne estis profesiaj skulptistoj, sed amatoroj inter oficistoj, laboristoj kaj studentoj.

Ĉe la rivero staras Kontraŭinunda Monumento, la simbolo kaj gloro de la urbo. Konstruita en 1958, la monumento memorigas pri la venko super la senprecedenca inundo en 1957. Sur la monumento estas reliefe skulptitaj figuroj de la tiea popolo batalanta kontraŭ la inundo. Ĉe la piedo de la monumento kuŝas du cisternoj. La akvo en la malalta markas la rekordan akvoniivelon de la rivero en 1932, kiam la rivero breĉiĝis kaj inundis plejparton de la urbo, kaj dekoj da miloj da popolanoj falis en teruran suferon. La alta cisterno

*Fremdlandaj turistoj sur la rivero Songhua*



La Kontraŭinunda Monumento apud la rivero Songhua



markas la akvonivelon de la rivero en 1957, je 58 centimetroj pli altan ol tiu en 1932, sed ĉi-foje, dank' al la kuna penado, la popolo venkis la inundon kaj la urbo restis sekura.

Harbinanoj ĉiam kun fiero parolas pri la Sun-insulo, kiu troviĝas trans la rivero, kontraŭ la parko Stalin, kaj estas fama pitoreskejo kaj somerumejo kun areo de pli ol 3 000 hektaroj. Sur la insulo troviĝas ĝardenoj de rozoj, siringoj kaj fruktarboj. Sur la suda parto de la insulo estas somerumejo, kie staras aro post aro da domoj en aparta formo, kaj sur la norda estas la parko Sun-insulo. La restoracio Sun-insulo tuj ĉe la riverbordo similas al plezurŝipo ankrita ĉe doko. Se oni prenas manĝon en la dua etaĝo de la restoracio, oni povas ĝui la belan pejzaĝon de Songhua-rivero, frandante lokajn pladojn.

Tamen kiam mi surpaŝis la insulon, min trafis malespero, ĉar mi trovis, ke ĉirkaŭe estas nenio eksterordinara. Dank' ai klari-

go de mia amiko, mi sciigis pri la vero. En ĉiuj festoj kaj ferioj tie kolektiĝas miloj kaj dekmiloj da homoj por ĝui la belan naturan pejzaĝon. Tie ili naĝas, remas kaj ankaŭ piknikas. Ĉu sur duno, ĉu sur gazono oni duope aŭ triope sternas tukon kaj metas sur ĝin bongustajojn kaj bieron. Hazarde, ĝuste el sub la arboj antaŭ mi flugis belsona kanto «Sur Sun-insulo» komponita de mia amiko:

*En bela tago de somer'  
abundas lum',*

*Per ĉarmoj logas nin jen la  
Insulo Sun'!*

*Kaj kun fiŝhoka stango kaj  
kun ĉio por tendum',*

*Jen ni venas al l' Insulo  
Sun'.*

Oni diris al mi ke ĉi-somere en la urbo abrupte multiĝis turistoj. Antaŭe tie estis nur du-tri doko, sed nun estas 8, kaj la nombro de la pramboatoj jam atingis centojn, kiuj tamen ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon. Laŭ lia takso ĉiutage tien eks-

kuras 60 000-70 000 homoj, kaj en festoj ofte 200 000 homoj.

Je la tagiĝo ekkuras al la insulo la unua pramboato, plena de pasaĝeroj el kiuj preskaŭ ĉiuj estas fiŝkantoj. En Harbin pli ol 5 000 homoj havas atestilon pri fiŝkado. Pro la fiŝkomanio estis jam elĉerpitaj ĉiuj fiŝhokiloj en du grandaj vendejoj de la urbo. Estas interese ke en la urba fiŝhoka konkurso kun pli ol 180 partoprenantoj iu emerita laboristino gajnis la ĉampionecon post unu tagnoka fiŝkado.

Mi ĝuis la ĉarmon de la rivero en la plezurŝipo "Cigno". En la ŝipo estis ankaŭ membroj de vojaĝgrupo de FR Germanio, kiuj plejparte estis maljunuloj, viglaj kiel junuloj. Sur la ferdeko ili trinkis bieron, ĝoje babilis, fotis sin kaj kelkiam mansalutis vojaĝantojn sur aliaj boatoj. Iu el ili diris al mi, ke al li tre plaĉas Harbin. Mi demandis al li la kialon. Post momenta pripenso li diris: "Vere, la pejzaĝo estas alloga, tamen laŭ mi, plej allo-

gaj estas la ĉi-tieaj loĝantoj, sinceraj, fervoraj kaj gastamaj. Nun mi sentas min kiel hejme.”

Tiam resonis ĉe mi la vortoj de direktoro Yang de la Internacia Hotelo de Harbin: “Post rekonstruo nia hotelo superis la 3-stelan nivelon, sed la ekipaĵoj ne estas ĉio. Homo estas objekto de nia servo kaj ni devas fari, ke ĉiu gasto sentu sin kiel hejme.”

Posttagmeze de tiu tago mi vizitis la Infanan Parkon. Tie la plej alloga estas la Infana Fervojo, kiu estas oficiale lanĉita la 1-an de junio, 1956. La 2-kilometra fervojo ĉirkaŭas la parkon kaj havas du staciojn “Harbin” kaj “Pekino”. Tirate de malgranda dizela lokomotivo, la trajneto havas sep vagonojn, kaj povas transporti 200 pasaĝerojn. Ĝi bezonas 12 minutojn por unu rondiro. Ĉiujn laborojn de la fervojo prizorgas geknaboj de malpli ol 13 jaroj. Iu eksterlandano diris ke tia fervojo ekzistas ankaŭ alilande, tamen sole en Harbin funkcias fervojo mas-trumata ekskluzive de geknaboj.

Mia akompananto rakontis al mi interesan okazaĵon ĉe la trajneto: Foje haste saltis el vagono iu japana turisto, kiam ankoraŭ ne tute haltis la trajneto. Li rapidis al la lokomotivo por vidi, kiel lerte la knabo-lokomotivisto kondukas la trajneton. Poste li emocie brakumis lin kaj rajdigis lin sur sian nukon. Li diris: “Komence mi ne kredis ke la trajneto estas stirata de knabo. Sed nun mi tute konvinkiĝis. Ankaŭ mi estas lokomotivisto, tamen li veturigas pli lerte ol mi.”

Malgranda ĉefkonduktoro Deng Wei estas bela kaj ĝentila 12-jara knabino. En lernejo ŝi

estas elstara lernantino. Kiam mi demandis, por kio ŝi volonte servas al aliaj en la postlecionaj horoj, ŝi flustris al mi kun dolĉa rideto: “Ĉar mi estas timema, kaj en la laboro mi povas hardi min.”

Harbin estas nova urbo kun maŝina kaj movoforta industrio kiel la centro. La Generatora Fabriko de Harbin estas la plej granda en la tuta lando. Post sia establiĝo en 1951 la fabriko akiris ĝojigajn sukcesojn en produktado de grandaj generatoroj kaj hidraŭlikaj turbinoj. Plejparto de la generatoroj instalitaj en la grandaj hidroelektrejoj de nia lando estis liverita de tiu fabriko. La tri 300 000-kilovattaj generatoroj muntataj en la Hidroelektrejo Baishan kiun mi vizitis antaŭ nelonge estas ĝiaj produktaĵoj.


Troviĝante inter gigantaj maŝinoj en altegaj fabrikdomoj oni

sentas sin malgrandaj kvazaŭ liliputanoj en la romano “Vojaĝo de Gulivero”. Sed ĝuste la homoj kreis ĉion ĉi tion kaj lumigis ĉiujn lampojn sur la tero, kiam la suno subiras.

Kiam mi forlasis la Generatoran Fabrikon de Harbin, falis nokta vualo kaj eklumis ĉiuj stratlampoj. Mi haste direktis min al la Kultura Domo, kie estis tuj komenciĝonta la Koncerto «Harbina Somero». Tra la pordo de la domo brile iluminita, eniris paroj kaj paroj da junaj geamantoj brako en brako. Transpaŝinte kelke da ŝtupoj de la ŝtona perono kune kun la homfluo mi haltis en ia hezito. Mi turnis min kaj rigardis la urbon vualitan de la nokto. Mi rememoris la peton de mia amiko, kaj mi diris kun emocio:

“Saluton, Harbin!”

(Daŭrigota)



2

VOJAGO LAU  
SONGHUA-RIVERO

# Fama urbo Harbin apud la rivero

Fotoj de Yan Jin



Skulptita cigno en parko apud la rivero

Surakva klubejo






Parto de Harbin

Laborejo de la Harbina Fabriko de Elektra Motoro


Foto de LIU SHAOQIANG








Promenejo



Fajnspinejo de la Harbina Lina Fabriko  
Foto de WANG DEYING

Songhua-rivero rigardata de la Suna Insulo



# PENTRAĴOJ DE LI KUCHAN



«Kormoranoj»

Farita en 1982

«Somervezo»

Farita en 1982



替目 遇洞 庭燒 臘渡 在波 云見



心柔 祝聯 待時友

一九七七年六月一日寫於京都

八十老人 老神記



815N

# LA GRANDA

# MURO — MIRAKLO EN LA MONDO

*Ĉu vi volas  
koni ĝiajn pasintecon  
kaj nunan staton?*

**BV. LEGI ARTIKOLOJN EN  
“EPĈ”, 1984.**

